UN 75-jara:

Malkontentiga mondorganizo sen alternativo

kaj la historia rolo de la Esperanto-movado en la UN-sistemo

De Andreas Künzli (Svislando)

Ilia celo estas sekurigi la mondan pacon. Sed Unuiĝintaj Nacioj, kiuj estis fonditaj antaŭ 75 jaroj, ne povis eviti multajn krizojn, militojn kaj genocidojn, eĉ se la homaro devis lerni el la tragikaj spertoj de la unua kaj dua mondmilitoj de la 20a jarcento.

La 26an de junio 1945 – la Dua Mondmilito en la Pacifiko ankoraŭ ne finiĝis - 50 landoj subskribis la *Ĉarton de la Unuiĝintaj Nacioj*.[1] La unua ĝenerala sekretario de UN fariĝis *Trygve Lie* el Norvegio. Li estis akceptebla kaj por la Okcidento kaj por Sovetunio. En 1951 li estis reelektita en tiu ĉi ofico fare de la Ĝenerala Asembleo kontraŭ la volo de Sovetunio, sed li rezignis la 10-an de novembro 1952 pro frustriĝo. *Dag Hammarskjöld* el Svedio, kiu fariĝis lia posteulo, substrekis, ke Unuiĝintaj Nacioj ne estis fonditaj „por nin venigi al la ĉielo, sed por savi nin de la infero".

Sed la historio de UN komenciĝis eĉ kelkajn jarojn pli frue. Post la fiasko de la Ligo de Nacioj, la usona prezidento Franklin D. Roosevelt faris duan provon krei organizon por atingi pacon dum la dua mondmilito,[2] kaj kunlaboris kun la brita ĉefministro Winston Churchill por redakti la *Atlantikan Ĉarton*. La nomo de la organizo estis unuafoje menciita en dokumento de la 1-a de januaro 1942, en la *Deklaro de la Unuiĝintaj Nacioj*. Ĉi tiu deklaraĵo estis subskribita de 26 ŝtatoj, inter ili Usono, Britio, Sovetunio kaj Ĉinio, kiuj baziĝis sur la Atlantika Ĉarto. Dum ankaŭ Usono eniris la militon, la subskribintoj promesis daŭrigi la batalon kontraŭ la aksaj potencoj Germanio, Italio kaj Japanio kaj ne fari apartan pacon kun ili. Tiu koalicio nun funkciis sub la nomo „Unuiĝintaj Nacioj". Inter la subskribintoj troviĝis ankaŭ okupataj landoj kiel Ĉeĥoslovakio, Belgio, Nederlando kaj Danio, sed ankaŭ Aŭstralio kaj la aliaj brite regataj teritorioj same kiel landoj en Latinameriko kiel Argentino, Kostariko kaj Salvadoro. N-ro 51 estis Pollando, kvankam en tiu momento en Varsovio ankoraŭ ne ekzistis registaro, kiu estis agnoskita de ĉiuj aliaj; sed Sovetunio jam instalis sian reprezentanton, dum la legitima ekzila registaro ankoraŭ troviĝis en Londono.

En la Moskva Konferenco de ministroj pri eksterlandaj aferoj en 1943 la estontaj venkintaj potencoj parolis favoro al la starigo de „internacia organizo por atingi la pacon". Ĉi tiu celo estis konfirmita de Roosevelt, Stalin kaj Churchill la 1-an de decembro 1943 dum la Teherana Konferenco.

Nur kiam la polaj partioj interkonsentis pri valida registaro, la pola reprezentanto povis subskribi la Ĉarton en la 15-a de oktobro 1945. Kuriozaĵo estis, ke ankaŭ la tiamaj sovetiaj respublikoj Belorusio kaj Ukrainio estis invititaj partopreni la fondon de UN kiel apartaj membroj. Stalin, kiu mem eniris la historion kiel unu el la plej grandaj amasmurdistoj, postulis tion per la argumento, ke tiuj du landoj aparte suferis pro la germana okupacio dum la milito. Tio signifis, ke inter 1945 kaj 1991 Sovetunio estis reprezentata per tri voĉoj en UN. La origina postulo de Sovetunio, ke ĉiuj dek kvin respublikoj estu agnoskitaj kiel membro-ŝtatoj en UN, estis tamen rifuzita de Usono.

[1] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Ĉarto_de_la_Unuiĝintaj_Nacioj, https://www.un.org/en/sections/un-charter/un-charter-full-text (plena teksto en la angla lingvo).
[2] En Sovetunio la dua mondmilito komenciĝis nur en junio 1941 per la atako de la germana armeo kaj estis nomata „Granda Patrolanda Milito".

La Ĉarto ekvalidis la 24-an de oktobro 1945. Sovetunio insistis, ke ŝanĝoj en la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj estu unuanime aprobitaj de la kvin konstantaj membroj de la Sekureca Konsilio.

Grava elemento de la UN-Ĉarto estas la universaleco de la **homaj rajtoj**, difinitaj en la artikolo 1, alineo 3 de la Ĉarto. En la preamblo de la UN-Ĉarto oni antaŭvidis la principon de la „respekto de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, sendepende de la raso, sekso, lingvo aŭ religio estas pliaj celoj.“ Oni emfazis la „kredon je la fundamentaj rajtoj de la homo, je la digno kaj valoro de la homa personeco, je la samrajteco de viro kaj virino kiel de ĉiuj nacioj, ĉu grandaj aŭ malgrandaj“. Oni parolis pri „kreado de kondiĉoj, sub kiuj justeco kaj la respekto al la devoj el traktatoj kaj aliaj fontoj de la popoljuro povas esti certigataj“ kaj estis konvinkita, ke „la socia progreso kaj pli bona vivnivelo en pli granda libereco“ povas esti „antaŭenigata“. La vorto „paco“ aperas 52-foje en la Ĉarto de UN. La aparta kreo de la katalogo de universalaj homaj rajtoj estis intencita jam antaŭ la fonda konferenco de UN en San Francisco en 1945, sed ĝi estis prokrastita. Anstataŭe, la Komisiono pri Homaj Rajtoj de UN, tiama suborgano de la Ekonomia kaj Socia Konsilio (EKOSOK), konsistanta el 18 reprezentantoj de la ŝtatoj, estis petita ellabori internacian kodon pri homaj rajtoj. Ĉi tiu devis origine konsisti el deklaro, deviga kontraktaro kaj rimedoj por ĝia efektivigo. La **Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj (UDHR)**, aprobita la 10-an de decembro 1948, estis konsiderata kiel mejloŝtono en la klopodo defendi la homajn rajtojn. Sed la konflikto de la Malvarma Milito prokrastis la adopton de la kontraktaro, kiu estis aprobita kaj adoptita nur en 1966.

La **Ĝenerala Asembleo** (UNĜA), kiu estas la plenkunveno de la membro-ŝtatoj, kiuj povas delegi al la kunsido ĝis po 5 membroj, unuafoje kunvenis la 10-an de januaro 1946 en la Centra Halo de la Londona Westminstro, kun delegitoj de 51 ŝtatoj. Necesas konsideri, ke la Ĝenerala Asembleo de UN fakte ne estas parlamento, sed nur asembleo de diplomatiaj oficialuloj senditaj de la registaroj de la membro-ŝtatoj de UN sen rekta demokratia legitimeco per elektoj. Tial la nomado de la Ĝenerala Asembleo de UN kiel „monda parlamento“ estas misgvida.[3]

La konstitucia kunveno de la **Sekureca Konsilio** (UNSK), integra organiza ĉeforgano krom la Ĝenerala Asembleo, konsistanta el kvin konstantaj (aŭ ĉefaj) membroj (Britio, Ĉinio, Francio, Sovetunio/Rusio, Usono), kiuj havas la vetorajton, kaj dek nekonstantaj membroj, okazis la 17-an de januaro 1946. Ĝi kaj la sekvaj 23 sesioj okazis en Church House en Londono, kun postaj kunsidoj en Hunter College en Bronx, Hotelo Henry Hudson en la Kvina Avenuo en Manhatano, kaj en la fabriko Sperry Gyroscope en Lago-Sukceso, antaŭ ol la konsilio okupis en 1951 sian nunan hejmon, la ĉefsidejon de UN, ĉe la Orienta Rivero en Manhatano.

Laŭ artikolo 24 I de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, la membro-ŝtatoj devas doni al la Sekureca Konsilio la „prioritatan respondecon por la konservado de la monda paco kaj internacia sekureco“. Kontraŭe al la rezolucioj de la Sekureca Konsilio de UN,[4] tiuj de la Ĝenerala Asem-bleo de UN ne estas devigitaj al la internacia juro, sed ili povas havi politikan pezon, ĉar ili re-prezentas decidon de plimulto de la membro-ŝtatoj kaj tiel do povas kontribui al la disvolviĝo de la deviga kutima juro. Dum aliaj organoj de UN do povas fari nur rekomendojn, la Sekureca Konsilio povas fari decidojn laŭ la ĉapitro VII de la Ĉarto kun deviga efiko por la membro-ŝtatoj, ekzemple preni rimedojn „okaze de minaco aŭ rompo de la paco kaj agoj de agreso“. Malgraŭ siaj eksterordinaraj kompetencoj, la Sekureca Konsilio ne rajtas, laŭ la reganta opinio, kontraŭdiri la agnoskitajn jurajn normojn de la internacia juro. Tamen, la decidoj de la Sekureca Konsilio ne estas submetataj al efektiva jura kontrolo.

La **vetorajton** en la Sekureca Konsilio de UN havas nur la kvin konstantaj membroj de la Sekureca Konsilio de UN: Britio, Ĉinio, Rusio (heredanto de Sovetunio), Usono kaj Francio. La vetoo permesas al la konstantaj membroj de la Sekureca Konsilio malakcepti la rezoluciproponon de la SK, kiun faris iu(j) el ĝiaj membroj, sendepende de la apogo, kiun ĝi ricevis de aliaj membroj. La UN-Ĉarto ne mencias eksplicite la rajton de la vetoo, kies funkcieco estas internacie kontestata (vd. sube). La valideco de la decidoj de la SK estas reguligitaj en paragrafo 3, artikolo 27 de la Ĉarto.[5]

[3] Liston de la kunsidoj de la UNĜA vd. sub https://en.wikipedia.org/wiki/President_of_the_United_Nations_General_Assembly.
[4] Liston de la rezolucioj de la UNSK vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Liste_der_UN-Resolutionen.
[5] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/United_Nations_Security_Council_veto_power.

Koncerne la funkcion kaj esencon de la vetorajton, kiu estas internacie kontestata, subtenantoj konsideras ĝin grava rimedo de la internacia stabileco, kontrolilo por militaj intervenoj kaj sekurigilo kontraŭ la usona hegemono. Kritikistoj opinias, ke la vetorajto estas la plej maldemokratia elemento de la UN-sistemo same kiel la ĉefa kaŭzo por la pasiveco ĉe la persekutado de militkrimoj kaj krimoj kontraŭ la homaro kaj homeco kaj ke ĝi malhelpas la aktivecon de UN kontraŭ la lezoj de la homaj rajtoj fare de ŝtatoj kiel Ĉinio, Rusio, Israelo k.a.

Retrospektive, en la praktiko de UN do montriĝis, ke la konstantaj membroj, precipe la plej influaj, decidaj kaj malamikaj grandpotencoj, ĉefe Usono kaj Sovetunio/Ruslando, daŭre utiligis la konstruaĵon de la Sekureca Konsilio por defendi siajn proprajn interesojn kaj protekti aliancanojn. Se aperis konflikto kaj la bazaj interesoj de unu el tiuj grandpotencoj estis tuŝitaj, ĉiu el ili havis la eblon kontraŭstari kaj bloki iun proponon per sia vetorajto. Kaj tion ili faris kutime, vigle, ofte kaj faras regule ĝis nun. Ĉi-rilata ĉampiono estas Sovetunio/Rusio kun 116 vetooj ĝis nun, sekvata de Usono (81), Britio (29), Francio kaj Ĉinio (po 16).[6] Lastatempe, Ĉinio obstine rifuzas rezoluciojn de la Okcidento, kiuj provas kritiki aŭ kondamni la lezadon de la homaj rajtoj en tiu lando kaj tiel evitas kondamnon fare de la Sekureca Konsilio. Do, ĉiu rifuzas la kritikon de la aliaj. Per tia rigida blokado povas esti malhelpata ankaŭ la solvado de krizoj kiel en Sudano (Darfur-krizo), Mjanmaro (lezado de homaj rajtoj en la kazo de la rohinĝoj), Sirio aŭ Israelo, kie aŭ Ĉinio aŭ Ruslando aŭ Usono kutime blokas pozitivan proponon de aliaj per sia vetoo por eviti proprajn malavantaĝojn aŭ „perdi la vizaĝon“ precipe ĉe la propra popolo, kvankam ĉiuj scias kaj komprenas, ke tiaj krizoj estas urĝe solvendaj per komuna klopodo. Por ŝanĝi ĉi tiun ege malfavoran situacion, kiu estas dankata al la nacia egoismo kaj cinika opor-tunismo de la regantoj, necesus baza reformado de la sistemo de la Sekureca Konsilio. Sed ĝuste la vetorajtaj konstantaj membroj ne estas interesataj pri reformoj, al kiuj ni ankoraŭ revenos pli poste.

De la kreado de UN en 1945 ekzistis ĝis 1955 okcidenta plimulto en la Unuiĝintaj Nacioj. Nur limigita kvanto da ne-okcidentaj nacioj aliĝis al UN. La jaro 1955 markis la finon de la usona hegemonio en la Ĝenerala Asembleo. Ĉi tio okazis, ĉar pli da ekskoloniaj nacioj fariĝis sendependaj ŝtatoj, kiuj estis akceptitaj de UN. La novaj ŝtatoj ofte nur tiam komencis kompreni, kion signifas esti sendependa ŝtato, kiam ili estis puŝitaj en la organizon, kie oni ofte igis ilin elekti inter Okcidento kaj Sovetunio. Montriĝis, ke tiuj ŝtatoj, kiuj liberiĝis de la koloniismo, estis ĉiam pli malfermaj al sovetiaj, t.e. kontraŭ-okcidentaj pozicioj, tiel ke en la 1970-aj jaroj la interkonsiladoj en Unuiĝintaj Nacioj ĝenerale fariĝis ĉiam pli malamikaj al Okcidento kaj speciale al Usono, kiel pruvas la por-sovetiaj kaj kontraŭ-usonaj voĉdonoj en la Ĝenerala Asem-bleo. Ĉi tiu malekvilibro estis respegulata de la nombro de vetoaj voĉdonoj kaj nature tute ne povis plaĉi al la usonanoj, kiuj praktike iom post iom perdis la hegemonion en la monorganizo.

Tiamaniere, Sovetunio gajnis multajn novajn aliancanojn kaj klopodis puŝi sian politikon, kiu ne estis ĉiam pozitiva kaj honesta, je sia favoro. Ekzemple, Sovetunio komence protestis kontraŭ la membreco de Hindio kaj Filipinoj, kies sendependeco tiam estis plejparte teoria (estante esence kolonioj de Britio kaj Usono).

Alia demando estis la reprezentado de Ĉinio en UN. Ĉi tiu debato komenciĝis en 1949. La Komunisma Partio de Ĉinio transprenis la kontinentan parton de la lando, dum la naciistoj de Sun Jat-Sen translokiĝis al la insulo Tajvano. La ĉina mandato en Unuiĝintaj Nacioj estis tenata de la naciisma registaro de la Ĉina Respubliko, (Tajvano) sed ekestis konflikto pri la demando kiu ĉina registaro tenu ĝin. Sovetunio subtenis la komunisman partion, kaŭzante konflikton kun la Okcidento. La Sekureca Konsilio partneris kun Usono kaj malakceptis la komunisman registaron de la Ĉina Popola Respubliko kiel legitima, kaj malhelpis ĝin eniri la Unuiĝintajn Naciojn ĝis 1971. En oktobro de ĉi tiu jaro la Ĝenerala Asembleo aprobis rezolucion por rekoni Ĉinan Popolan Respublikon kiel solan legitima reprezentanton de la ĉina popolo, kio kondukis al tio, ke **Tajvano** ne estas oficiale reprezentata en UN de tiam, kvankam ĝi evoluis kiel aparta ŝtato.

Grava turnopunkto de la rilatoj kun Sovetunio okazis en januaro 1950, kiam la sovetiaj reprezentantoj protestis kontraŭ la okupado de la ĉina seĝo fare de la Ĉina Respubliko (do Tajvano). Jakov

[6] La liston de la vetooj vd. sub https://en.wikipedia.org/wiki/List_of_vetoed_United_Nations_Security_Council_resolutions.

Malik, la sovetia reprezentanto, forlasis Unuiĝintajn Naciojn kaj anoncis, ke la sovetianoj bojkotos pluajn kunsidojn en la Sekureca Konsilio. Sed tio estis tre malsaĝa ideo. Dum la foresto de la sovetiaj reprezentantoj la SK povis voĉdoni por la interveno de militaj fortoj de UN en la komenciĝonta Korea milito. Kiam la rusoj konsciis pri sia fatala eraro, ili revenis en aŭgusto 1950 kaj aktive kunlaboris en internaciaj kaj regionaj organizaĵoj de UN. Ĝis hodiaŭ Ruslando ofte voĉdonas kongrue kun la decidoj de Ĉinio en la SK kiel kontraŭpezo kontraŭ la Okcidento, ekzemple en la siria konflikto.[7] En Okcidento oni konsideras tiun sintenon kiel kaprican malhelpadon kaj intencan sabotadon de la streboj savi la mondan pacon fare de Ruslando.

Malvarma Milito

Inter 1946 kaj 1989 Unuiĝintaj Nacioj staris sub la signo de la t.n. „Malvarma Milito“. „Malvarma Milito“ estas nomata la konflikto, kiu eksplodis kaj furoris inter la okcidentaj potencoj sub la gvido de Usono kaj ĝiaj okcidentaj aliancanoj kaj la tiel nomata „Orienta Bloko“, kiu estis gvidata de Sovetunio. La Malvarma Milito aperis kiel kunpuŝiĝo inter du antagonismaj politikaj, ekonomiaj, sociaj, ideologiaj kaj armeaj sistemoj de la kapitalismo kaj komunismo. Ligita kun la „Malvarma Milito“ estis la milita armado de ambaŭ sistemoj ĉefe per nukleaj armiloj.

Kiel elirpunkto de la „Malvarma Milito“ estas konsiderata la proklamo de la tiel nomata „Doktrino de Truman“ fare de la usona prezidanto Harry S. Truman de la 12-a de marto 1947. La fono de ĉi tiu deklaraĵo estis la tiama krizo ĉirkaŭ Irana: En 1945 kaj 1946 Sovetunio provis akapari la provincojn de Irano, loĝatajn de kurdoj kaj azeroj, por establi tie por-sovetiajn ŝtatojn. Josef Stalin ankaŭ planis instali komunisman registaron en Teherano. En printempo 1946 Truman minacis Stalinon per gravaj konsekvencoj, inkluzive de la uzo de nukleaj armiloj, se li ne retiras siajn soldatojn el Irano. Temis ankaŭ pri la posedo de la nafto: Por Truman ne ekzistis dubo, ke la kontrolo pri la irana nafto fare de Sovetunio kaŭzos ŝanĝon de la ekvilibro de la potenco en la mondo kaj povus rezultigi amasan damaĝon al la kreskanta okcidenta ekonomio.[8]

Moskvo konsideris, ke la „Malvarma Milito“ komenciĝis pli frue, nome per la parolado de Winston Churchill de la 5a de marto 1946 en Fulton, Missouri. En tiu parolado Churchill esprimis sian profundan suspekton pri la estontaj intencoj de Sovetunio. Kvankam li ne kredis, ke Moskvo deziras militon, li estis tamen konvinkita, ke ĝi celas vastigi sian influon de la potenco kaj komunisma ideologio. Li uzis la nocion de la „fera kurteno“, kiu tranĉas Eŭropon, malantaŭ kiu troviĝas la sovetia sfero, kvazaŭ la imperio de la malbono. Por li la ekzisto de tiu fera kurteno estas tre maltrankviliga fakto, kaj li parolis pri ombro, kiu falis sur la mondon. Malgraŭ ĉia timo li esperis, ke sub la tegmento de UN eblos havi bonan interkomprenon kun la rusoj.[9]

La reago de Stalin, kiu aperis en la sovetia gazetaro la 14-an de marto en formo de intervjuo, estis nekutime akra. Stalin nomis la paroladon de Churchill „danĝera akto“ kaj komparis la briton kun Hitlero, rigardante lian paroladon kiel preparadon de milito kontraŭ Sovetunio, kaj akuzis lin provi trudi la superregadon de la „anglosaksa raso“ al la mondo. Fakte, jam komence de februaro 1946 Stalin faris paroladon en la Granda Teatro, kie li trovis neniujn afablajn vortojn por la okcidentaj aliancanoj de la kontraŭ-hitlera koalicio.[10]

Estis do klare, ke la estontaj rilatoj inter Usono kaj Brito unuflanke kaj Sovetunio alflanke ne staros sub la signo de la amikeco. Kvankam ambaŭ sperpotencoj tamen neniam gvidis efektivan militon dum la “Malvarma Milito”, sed esence nur minacis unu la alian per tia, la konflikto atingis tre minacan karakteron en tri momentoj, kiam la malvarma milito alproksimiĝis al la la ebleco de „varma“ milito inter la superpotencoj: okaze de la Berlina blokado de 1948/49, de la Kuba Krizo en 1962 kaj de la disputo pri mezgrandaj misiloj en la tempo inter 1979 kaj 1982/83. Inter ĉi tiuj fazoj estis periodoj de malpli intensa konflikta etoso aŭ eĉ okazis ioma malstreĉiĝo. Krom tio, ekzistis pluraj militoj, kiuj

[7] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Soviet_Union_and_the_United_Nations.
[8] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Truman-Doktrin.
[9] Vd. https://www.nato.int/docu/speech/1946/s460305a_e.htm.
[10] Vd. https://www.bbc.com/russian/blogs/2016/03/160314_blog_vox_historicus_fulton_stalin_response, https://history.wikireading.ru/51343.

kvazaŭ anstataŭis la militojn inter la grandpotencoj: temis pri la Korea milito (1950-53), la Vietnama milito (1955-75) kaj la Afgana milito (1979-89).

La **Korea milito**, en kiu Truman ne hezitis minaci per la aplikado de nukleaj armiloj, kondukis al la disduiĝo de la korea duonisulo laŭ du antagonismaj ŝtatoj, kun bone foritikigata kaj kontrolata limo inter ili, simile kiel inter GDR kaj FRG. En la norda parto, kiu estis apogata de Sovetunio, instaliĝis kruela komunisma reĝimo de la dinastio Kim. En la sudo, kiu fariĝis kvazaŭ satelito de Usono, funkcias moderna okcidenttipa ŝtato kun altgrade prosperanta ekonomio. Oficiale, la milita stato inter ambaŭ ŝtatoj ne estas nuligita ĝis hodiaŭ. Dum Koreio restis duigita, Vietnamio, kiu same estis divita en norda kaj suda ŝtatoj, povis esti reunuigita en unu ŝtato en julio 1976, tamen sub komunisma kontrolo. Tiel, tutan Vietnamion trafis la influa sfero de Sovetunio, kun fatalaj sekvoj por la vjetnama popolo. Cetere ankaŭ en la vietnama milito Usono intencis lanĉi nuklean bombon kontraŭ tiu lando. La ekonomia embargo de Usono kontraŭ Vjetnamio ne estis nuligita, kaj nur kiam la komunisma partio de Vjetnam enkondukis ekonomiajn reformojn, la rilatoj de Vjetnamio kun la Okcidento normaliĝis.

La „Malvarma Milito“ konsistis ankaŭ en tio limigi la influon de la alia tendaro tutmonde. La termino Orient-Okcidenta konflikto estis uzata ankaŭ kiel sinonimo por ĉi tiu epoko de la 20-a jarcento.[11]

Lige kun la „Malvarma Milto“ estis fonditaj NATO kaj la Varsovia Pakto. **NATO** estas organizo fondita 24-an de aŭgusto 1949 per la „Traktato de la Norda Atlantiko“ kiel defendo-alianco, sed ankaŭ kiel milit-politika organizo de Belgio, Danio, Francio, Britio, Islando, Italio, Kanado, Luksemburgio, Nederlando, Norvegio, Portugalio kaj Usono. La fondo de NATO baziĝis sur la Nord-Atlantika Traktato laŭ artikolo 51 de la UN-Ĉarto. Laŭ tio, NATO do estas intime ligita kun la UN-sistemo. La organizo vidas sin ne nur kiel defendan aliancon, sed ankaŭ kiel milit-politikan organizon de 30 eŭropaj kaj nordamerikaj membro-ŝtatoj, inkluzive Turkion, kun la celo de la propra sekureco kaj tutmonda stabileco.[12]

La **Varsovia Pakto** estis fondita en 1955 per la Varsovia Traktato pri amikeco, kunlaboro kaj reciproka helpo (mallonge: Varsovia Traktato) kiel reago al la fondo de NATO esence kel infano de la Malvarma Milito kaj formis la ekvivalenton al la Nordatlantika Pakto, al kiu la Varsovia Pakto idee, difine kaj strukture similis okulfrape. Laŭ ĝia artikolo 4 la membro-ŝtatoj de la Varsovia Traktato certigis unua al la alia reciprokan militan helpon kaze de atako al unu aŭ pli el la partoprenantaj ŝtatoj (per tio estis pravigita ekzemple la interveno de la armeoj de la Barsovia Pakto en Ĉeĥoslovakio en 1968). Kun la falo de la Fera Kurteno la Varsovia Pakto oficiale dissolviĝis en 1991.[13]

La **Konsilio por reciproka ekonomia helpo (COMECON)** estis fondita en 1949 kiel socialisma ekvivalento al la Marŝala plano, anoncita en marto 1947 de prezidento Truman,[14] kaj al la Organizaĵo por Eŭropa Ekonomia Kunlaboro (OEEC). La konsilio ekzistis ĝis 1991.

Eŭropa Unio (EU) estis fondita en 1951 de Belgio, Francio, Germanio, Italio, Luksemburgo kaj Nederlando kiel „Eŭropa Komunumo por karbo kaj ŝtalo“, komprenante sin esence kiel ekonomian asocion. En 1965/67 la organizo pluevoluis kiel „Eŭropa Komunumo“ kaj per la „Traktato de Maastriĥto“ de 1992/93 ĝi transformiĝis al „Eŭropa Unio“, al kiu aliĝis Kipro kaj Malto, poste ankaŭ Aŭstrio, Finnlando kaj Svedio. Per la „Lisbona Traktato“ ĝi trovis sian duman finformiĝon en 2007-9 kiel supernacia kaj interregistara organizo kun 27 membro-ŝtatoj kaj 24 oficialaj lingvoj kaj parte kun komunuma monunuo, la eŭro, kiu estis enkondukita en 1999/2002, anstataŭante la malnovajn naciajn valutojn.

La historio de la sukcesoj kaj fiaskoj de UN en milito kaj paco

Franklin D. Roosevelt, la „inventinto“ de UN, esperis – esence kontraŭ ĉia historia sperto – fondi la organizon en postmilita mondo, en kiu ĉiuj konfliktoj pace solviĝos. Solvi ĉiujn krizojn de la mondo

[11] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Kalter_Krieg, https://de.wikipedia.org/wiki/Wettrüsten
[12] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/NATO.
[13] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Warschauer_Pakt.
[14] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Plano_Marshall.

kaj homaro UN tamen ne kabaplis. Pli cinikaj samtempuloj, inkluzive de la aliancanoj de Roosevelt, Stalin kaj Churchill, estis pli interesataj sekvi sian kutiman potencpolitikon ene de la nova strukturo, kio estis malbonaŭgura signo por la estonteco.

Sed ekzistis kelkaj epizodoj, kiuj povis esti konsideritaj kiel sukcesaj kaj esperaj. En decembro 1955 la antaŭaj „malamikaj ŝtatoj", t.e. la aliancanoj de Germanio, nome Rumanio, Bulgario, Hungario, Finnlando, Italio kaj Aŭstrio kaj ankaŭ la ŝtatoj Irlando, Portugalio kaj Hispanio, kiuj estis neŭtralaj dum la dua mondmilito, estis akceptitaj en la sinon de Unuiĝintaj Na-cioj. Sed tiu sukceso estis facila, ĉar ĉiuj landoj strebis al la integriĝo en UN. Kiam la krizoj fariĝis konkretaj kaj malfacile solveblaj, UN restis ofte senpova, ekzemple rilate la sufokadon de la **hungara ribelo** en 1956 fare de sovetiaj tankoj, por mencii faman fruan ekzemplon. La hungaroj tiam devis amare konstati, ke neniu povas helpi al ili eviti la sovetian agreson kaj ke la homaj rajtoj estas nura teorio. La saman sperton faros ĉeĥoj kaj slovakoj dum la „Praga Prin-tempo" en 1968, kiam ili protestis ĉe UN en Novjorko por haltigi la agreson de la sovetia bloko. Ofte la kondamno de iu agreso fare de UN aŭ unuopaj membro-ŝtatoj restis sen konkretaj pozitivaj sekvoj kaj do estis nur platona. Kvankam en tiuj jaroj la Okcidento sendube staris je la flankoj de Hungario kaj Ĉeĥoslovakio, perarmea enmiksiĝo en tiujn konfliktojn ne eblis por eviti eĉ pli grandan konflikton inter Sovetunio kaj aliaj landoj. Do, la „doktrno de Truman" de 1947, laŭ kiu Usono devis helpi al „liberaj popoloj" (en la komunisma mondo), kiuj estis „agresataj de ekstere", ne funkciis, ĉar oni estis devigita praktiki t.n. realan politikon kaj gluti la bufon.[15]

Post kiam la **krizo ĉirkaŭ la Sueza-kanalo** finiĝis, la Ĝenerala Asembleo decidis en novembro de 1956 sendi la pacisman forton UNEF I al la **Sinaja Duoninsulo**. Pro la vetoo de Francio kaj Britio en la Sekureca Konsilio kontraŭ la rezoluciproponoj de Usono kaj Sovetunio por fini la konflikton, Dag Hammarskjöld submetis al la ŝtatoj novan koncepton por atingi pa-con. Sovetunio, gvidata de Nikita Ĥruŝĉov, minacis Francion kaj Brition per la „apliko de per-forto por neniigi la agresantojn" por resta-rigi la pacon en la Proksima Oriento kaj ne hezitis paroli pri tio, ke li detruos la okcidentajn ĉefurbojn per nukleaj armiloj. Similan minacon oni siatempe aŭdis de Hitlero. Sed ĉar konfliktantaj membro-ŝtatoj rajtis retiri sian konsenton dum iu pacoperaco. Egiptio praktikis ĉi tiun rajton en 1967: ĝiaj trupoj estis retiritaj el Sinajo, sed la **Ses-Taga Milito** inter **Israelo** unuflanke kaj **Egiptio, Jordanio kaj Sirio** aliflanke eksplodis baldaŭ poste kun daŭraj negativaj sekvoj por la regiono. La 19-an de junio 1967, naŭ tagojn post la venko de Israelo en la Ses-Taga Milito, la israela kabineto decidis proponi pacon al Sirio kaj Egiptio. Tra usonaj diplomatiaj kanaloj Israelo proponis la redonon de la Golan-montaro al Sirio kaj de la Sinajo al Egiptio kondiĉe, ke ambaŭ landoj agnoskos la rajton de Israelo ekzisti kiel nacio kaj ŝtato kaj rezignos pri pluaj atakoj. Post la malakcepto de la israela pacoferto kaj la kategoria rifuzado de ĉiuj interparoloj kaj pacaj klopodoj fare de la Araba Ligo, la israela registaro retiris la propran pacoferton en oktobro 1967.

La akcepto de la „**Malkoloniiga Ĉarto**" de la 14a de decembro 1960 fare de la plimulto de la Ĝene-rala Asembleo de UN malfermis al la afrikaj kaj aziaj landoj la vojon al la „rajto je la aŭtonomeco", kio kondukis en la sekvaj jardekoj al la ŝtata sendependiĝo de preskau ĉiuj tiuj landoj, kiuj estis akceptitaj kiel novaj membroj de UN.

Tragika incidento okazis en 1961. Dum civila milito, en kiu la provinco Katanga volis disiĝi de la Res-publiko de **Kongo** (nuna Demokratia Respubliko Kongo), Dag Hammarskjöld persone provis peradi en la interna milito. Kiam lia aviadilo kraŝis, li mortis la 18an de septembro 1961. Lia posteulo fariĝis *Sithu U Thant* el Birmo (nuna Mjanmaro).

Raportoj pri **malsatoj** amasiĝis en triamondaj landoj ekde la fino de la 1950-aj jaroj. UN tiam deklaris la 1960-ajn jarojn kiel **„unuan jardekon de la evoluigo"**. Per tiu iniciato UN fariĝis la ĉefa aganto de la internacia evolupolitiko. Grandparto de la financoj kaj dungitoj de UN estis investitaj por disvolvi ĉi-rilatajn solvojn. En la evolulandoj oni planis enkonduki la vivnivelon de la industriaj landoj. Tamen, la Pearson-raporto de la Monda Banko en 1969 evidentigis, ke la diferenco inter la riĉaj kaj malriĉaj landoj ankoraŭ longe daŭros.

Por povi dediĉi sin pli konkrete al la solvado de konkretaj problemoj estis fonditaj specialaj subor-ganizaĵoj de UN, ekzemple la Instituto por trejnado kaj esplorado UNITAR en 1963 kaj la unua

[15] La historio de la hungara ribelo estas priskribita sub http://www.planlingvoj.ch/Hungario1956.pdf.

Monda Komerca Konferenco UNCTAD en printempo 1964 en Ĝenevo, la eŭropa sidejo de UN. Sekvis UNDP-evoluprogramoj de fondusoj kiel UNCDF kaj UNFPA por financi diversajn evoluprojektojn en diversaj landoj. Samtempe, UNIDO estis integrita en UN kiel speciala organizaĵo por la disvolviĝo de la industrio. En 1969 UNDP prezentis la Jackson-raporton pri la kunlaboro inter evoluigaj organizaĵoj, kiu fariĝis ilia valida komerca bazo.

La plej gravaj militaj scenejoj en la 1960-aj jaroj estis la militoj en **Vjetnamio** (1955-75) kaj **Alĝerio** (1954-62). Ĉar la grandpotencoj estis enmiksitaj en ĉi tiun konflikton kaj nek Norda nek Suda Vjetnamio estis reprezentataj en UN, la mondorganizo ne fariĝis aktiva por trovi pacan solvon.[16]

La milito en Alĝerio, kiun en 1954 komencis la marksisma-naciisma organizaĵo FLN, kiu aplikis terorismajn rimedojn, povis esti finita en marto 1962 per la interkonsentoj de Évian, kiuj rezultigis la sendependecon de Alĝerio disde Francio sub la gvidado de la sama FLN.[17]

Novaj pactrupoj estis senditaj al **Nov-Gvineo** (UNSF) en 1962 kaj al **Kipro** (UNFICYP) en 1964. La trupoj en Kongo kaj Nov-Gvineo estis retiritaj en 1964. La unua sankcio de UN estis adoptita en 1966 kontraŭ la blanka minoritata registaro en **suda Rodezio** kiel nova instrumento por puŝi pacajn interesojn kaj humanajn postulojn sen uzi armilojn. La sankcio inkluzivis vastan ekonomian embargon, kiu estis nuligita nur en 1979.

Nova dimensio de la komunismaj reakcio kaj subpremado estis atingita per la konstruado de la **Berlina Muro** la 13an de aŭgusto 1961 fare de la orientgermana SED-reĝimo, kun la konsento de la sovetia estro Nikita Ĥruŝĉov, kiu praktike enprizonigis la tutan popolon de „Germana Demokratia Respubliko“ (GDR), kiu estis satelita ŝtato de Sovetunio. Krom ideologia, la decido fermi la orientan parton de Berlino kaj konstrui muron ĉirkaŭ okcidenta Berlino havis tute ´praktikan´ aspekton. Inter 1945 kaj 1961 2,7 milionoj da homoj elmigris de Orienta Berlino, parto de Germana Demokratia Respubliko (GDR), al Okcidenta Berlino, kaŭzante gravan krizon sur la hejma labormerkato. GDR-estro Walter Ulbricht argumentis, ke la granda nombro da elmigrintoj forlasantaj Orientan Berlinon minacas la ekziston de la GDR. En la fruaj monatoj de 1961 Ulbricht premis Ĥruŝĉov-on fermi la limon inter orienta kaj okcidenta Berlino. Ĥruŝĉov komprenis la zorgon de Ulbricht sed timis, ke ebla interveno de la okcidentaj potencoj malstabiligos orientan Berlinon. La havigo de tuta Berlino al la kontrolo de GDR John F. Kennedy, tiama usona prezidento, ne povis akcepti, kion li klare diris al Ĥruŝĉov en Vieno dum pintkonferenco en junio 1961, kiu i.a. trakts la „Berlinan demandon“ kaj kie li komprenigis al li, ke li faros neniun kompromison pri okcidenta Berlino, kiun li konsideris okcidenta tereno.[18] Ĉar la usonanoj ne volis cedi okcidentan Berlinon al GDR, la sovetianoj verŝajne venis al la konkludo, ke ĝi devos esti izolita pere de muro konstruoata ĉirkaŭ ĝi. Kvankam ankoraŭ en junio 1961 GDR-estro Walter Ulbricht diris en gazetara konferenco, ke „neniu havas la intencon konstrui muron“.

La sistema subpremado de la libereco(j) en tiu „socialisma“ ŝtato estis konsiderata de la monda komunumo, precipe en Okcidento, kiel baza lezo de la homaj, civitanaj kaj politikaj rajtoj. Ne nur en Berlino ekzistis tia muro, sed la tuta landlimo inter GDR kaj FRG estis fermita per senprecedence fortikigata sistemo de bariloj, kiuj estis ekipitaj per diversaj armiloj, kiuj povis mortigi homojn, kiuj volis fuĝi tra tiuj fortikaĵoj al la alia flanko de la limo. Ĝis 1989 ĉe la Berlina Muro pereis minimume 140 (entute 173) homoj, kiuj volis transpasi ĝin, kaj ĉe la limo inter FRG kaj GDR mortis entute 371 homoj.[19] La fortikigitaj limoj inter GDR kaj FRG kaj sur la korea duoninsulo estis tutmonde rigardataj kiel simbolo de la divido de landoj, de la Malvarma Milito kaj de la komunisma teroro kontraŭ la propra popolo.

Post kiam Usono starigis en januaro 1959 nukleajn raketojn en Britio, Italio kaj Turkio, Sovetunio atente observis ĉi tiun evoluon kaj establis diplomatiajn rilatojn kun Kubo en majo 1960, kiu estis regata de la komunisto Fidel Castro. Kun la ekonomie potenca Sovetunio kiel protektanto Fidel Castro esperis akiri pli da politika influo en Latin-Ameriko. Sed Usono mal-akceptis la provon de Kubo disvastigi la komunismon sur tiu kontinento.

[16] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Vietnamkrieg.
[17] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Algerienkrieg.
[18] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Vienna_summit#The_Berlin_question.
[19] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Innerdeutsche_Grenze#Grenztote.

En oktobro 1962 la „Malvarma Milito“ atingis per la t.n. **„Krizo de Kubo“** novan kulminon. Post kiam la okcidentajn sekretservajn atingis ekde junio 1962 informoj pri la starigo de sovetiaj raketaj bazoj en Kubo, CIA, la sekreta servo de Usono, malkovris pere de fotoj, faritaj de esploraviadilo super Kubo, instalaĵojn por starti sovetiajn raketojn. La 8-an de septem-bro 1962 sovetia varŝipo alvenis en Havano; ĝi enhavis mezgrandajn misilojn SS-4, sed ne malŝarĝis ilin en la haveno. La 15-an de septembro en la Atlantiko usonanoj fotis alian sovetian varŝipon („Poltava“), kiu estis ŝarĝita per armea ekipaĵo kaj estis survoje al Kubo. Dum la krizo estis trak-tata sekrete, okazis diversaj diplomatiaj klopodoj en centraj kaj sudamerikaj landoj por subteni la usonan pozicion en la Organizo de Amerikaj Ŝtatoj (OEA) kaj ĉe Unuiĝintaj Nacioj (UN). En sia televida elpaŝo, la usona prezidento John F. Kennedy informis la mondan publikon pri la sovetiaj raketoj en Kubo kaj anoncis la komencon de la ŝipa blokado por la 24-a de oktobro. Li alvokis la sovetian ŝtatan registaron de Nikita Ĥruŝĉov retiri la raketojn el Kubo kaj minacis per nuklea kontraŭbato okaze de sovetia atako. De tiu momento la „kuba krizo“ estis publika. En la Seku-reca Konsilio de UN okazis polemika interŝango de argumentoj inter la usona kaj sovetia repre-zentantoj. La 28-an de oktobro Ĥruŝĉov cedis kaj konsentis forigi la raketojn de Kubo. Rekom-pense, Usono konsentis ne invadi Kubon. Krome, kaj tio ne fariĝis publika, la usonaj raketoj estis forigitaj en Turkio, kion Moskvo konsideris taktika sukceso por la propra geostrategia avantaĝo. La retiro de la sovetiaj raketoj estis anoncita de Hruŝĉov en Radio Moskvo. La krizo, kiu daŭris 13 tagojn kaj ŝajne kondukis la homaron al la rando de tria mondmilito, probable nuklea, estis finita. En konferenco de historiistoj okazinta en 2002 la tiama estro de la sovetiaj armeaj trupoj deklaris, ke 40 mil soldatoj de la Ruĝa Armeo kaj 42 raketoj estis instalitaj en Kubo, inkluzive de taktikaj atombomboj, kies uzado jam estis rajtigita. Ĉirkaŭ 80 nukleaj bomboj troviĝis en Kubo dum la krizo. La usonanoj poste konfesis, ke ili subtaksis la fakton, ke la mezgrandaj misiloj en Kubo efektive estis ekipitaj per nukleaj armiloj. La krizo havis tamen kelkajn pozitivajn rezultojn sur la kampo de la kontrolado de la nukleaj armiloj kaj de la malstreĉiĝo de la rilatoj inter la nukleaj grandpotencoj.[20]

En novembro 1963 en la **Deklaro pri forigo de ĉiuj formoj de rasa diskriminado** estis kondamnitaj persekutado, apartigo kaj Apartheid-politiko en la tutmonda komunumo. En decembro 1966 la interkonsentoj pri homaj rajtoj (Socia pakto kaj Civila pako de UN), kiuj estis ellaboritaj de la Komisiono pri Homaj Rajtoj, estis adoptitaj de granda plimulto. Tamen tiuj paktoj ekvalidis nur en 1976.

En 1965 estis unue adoptita la **Konvencio kontraŭ Rasa Diskriminacio**, kiu estis sekvata de la Civila kaj Socia Pakto en 1966. En 1967 laborgrupo de UN konsistanta el eminentaj juristoj estis taskita esplori la homrajtan situacion de la Apartheid-sistemo en Sudafriko kaj raporti pri ĝi al la Komisiono pri Homaj Rajtoj. Grava novaĵo estis, ke tiu laborgrupo estis fondita sen la konsento de Sudafriko, kaj due ĝi povis aŭskulti aŭ rifuzi la plendojn de individuoj. En UN-rezolucioj la lezoj de la homaj rajtoj povis esti eksplicite nomitaj kiel tiaj. Ĉi tiu permesis al la Komisiono nomi specialajn kaj sendependajn raportistojn, kiuj estis taskita raporti pri la murdoj fare de geriloj en Ĉilio kaj Bolivio. Nuntempe ekzistas 50 tiaj specialaj raportistoj, kiuj okupiĝas pri diversaj temoj en diversaj landoj. Alia rmedo de la homrajta sistemo de UN estas la naciaj homrajtaj institucioj.

En 1968, proklamita kiel **Jaro de la Homaj Rajtoj** kaj 20 jarojn post la adopto de la UDHR, la unua monda konferenco pri homaj rajtoj okazis en Teherano, kie la membro-ŝtatoj rekonfirmis sian devontigon por internaciaj homaj rajtoj, sed ankaŭ konstatis, ke ankoraŭ estas multaj farendaĵoj por atingi la nivelon de la efektiviĝo.

* * *

La jaro 1968 eniris la historion de la homaro kiel tre speciala jaro.

En multaj landoj 1968 estas la kulmino de la maldekstremaj studentaj kaj civitanrajtaj movadoj de la 1960-aj jaroj, kiuj estis ankaŭ konataj kiel la 68-movado. La movadaj eventoj kulminis en Usono en formoj de la protestoj kontraŭ la Vjetnama milito kaj la nigrula civitanrajta movado, kies gvidanto Martin Luther King estis murdita en aprilo de tiu jaro, en Francio ili alprenis la formon de la majaj ribeloj, en la Federacia Respubliko ili aperis kiel studenta movado, ktp. Ribeloj okazis en la tuta

[20] Pli detale pri tio vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Kubakrise.

mondo, inter alie ankaŭ en Pollando, Meksiko, Japanio kaj Ĉeĥoslovakion, kie la „Praga printempo“ estis disbatita de trupoj de la Varsovia Pakto.

Kiam la „Praga printempo“ atingis sian kulminon en aŭgusto, la 21-an de aŭgusto 1968 trupoj de la Varsovia Pakto invadis Ĉeĥoslovakion por sufoki tiun movadon, kiu volis reformi la socialismon en tiu lando. Ankoraŭ en la sama vespero de la atako la Sekureca Konsilio de UN kunvenis laŭ la postulo de ses membro-ŝtatoj por kritiki la agreson de Sovetunio kaj ĝiaj aliancanoj kontraŭ tiu lando. 10 ŝtatoj voĉdonis por la kondamno, 2 kontraŭ kaj 3 sindetenis, inter alie Hindio, kiu tamen esprimis sian bedaŭron pri la okazaĵoj. Ĉar Sovetunio, kiu nature protestis kontraŭ la kondamno, reagis per vetoo, la koncerna rezolucio estis malvalida kaj la ĉi-rilata debato prokrastita. Klarigante, ke pri ĉi tiu temo ne ekzistas kialo por debato, ĉar temas pri afero inter la socialismaj landoj, la sovetia ambasadoro ĉe UN alvokis ĉiujn ŝtatojn „respekti la principojn de la suvereneco kaj sendependeco kaj strikte atenti, ke la rekta kaj nerekta agreso kontraŭ ŝtatoj kaj popoloj estas malpermesata“ (!!!). Estis klare, ke ajna diskuto kun la sovetianoj en rilato kun tiu temo estis neebla, ĉar ili tuj tordis la faktojn, inversigis la lancon, rifuzis ĉian kulpon kaj sabotis la koncernan debaton per sia kaprica kontraŭa sinteno. La sovetia ambasadoro firme esprimis sin ankaŭ kontraŭ la vizito de U Thant en Prago por atingi, ke la arestitaj ĉeĥoslovakaj politikistoj estu liberigitaj. Jiří Hájek, la oficanta ĉeĥoslovaka ministro pri eksteraj rilatoj, flugis de Belgrado al Novjorko por protesti ĉe UN kontraŭ la okupacio de Ĉeĥoslovakio fare de trupoj de la Varsovia Pakto.

Per sia kruda armea interveno en Ĉeĥoslovakio la sovetianoj kaj ties aliancanoj do ne nur lezis la principojn de la internacia juro kaj de la UN-Ĉarto, sed ili kondukis ankaŭ la koncernajn paragrafojn de la traktato pri la Varsovia Pakto al absurdo. Nome, la artikolo 1 de la Varsovia Traktato de la 14a de majo 1955 devigis la aliancanojn rezigni pri la apliko de ĉiuspecaj minaco kaj perforto.

La „Moskva protokolo“, kiun la gvidantoj de la ĉeĥoslovaka KP poste devis subskribi sub sovetia premo, enhavis punkton, laŭ kiu „la registaro de Ĉeĥoslovakio estas instruita strikte kontraŭi la debaton pri la situacio en Ĉeĥoslovakio en la Sekureca Konsilio aŭ alia organo de UN kaj kategorie peti la forigon de ĉi tiu tagordero.“ Same kiel la hungara ribelo de 1956, ankaŭ la ĉeĥoslovaka revolucio de Aleksandr Dubĉek kaj liaj kunbatalantoj pli kaj pli forgesiĝis en la nacia publika konscio de tiuj popoloj, ĉar en la landoj de la socialisma bloko, en kiuj sekvis politika, ekonomia kaj socia glacitempo, la poststalinismaj regantoj subpremis kaj persekutis ĉiujn civitanojn, kiuj publike parolis aŭ skribis pri la evento de 1968. Sennombraj ĉeĥoslovakoj forlasis sian patrujon kiel senŝtataj rifuĝintoj kaj trovis ŝirmon en la najbaraj okcidentaj landoj, ĉefe Aŭstrio, Germanio kaj Svislando, kie ili rekomencis sian vivon en libereco kaj fariĝis civitanoj de tiuj landoj, kie ili ofte faris sukcesan profesian karieron kiel kuracistoj kaj inĝenieroj.[21]

* * *

Menciinda kazo por tiu tempo, kiu hodiaŭ estas preskaŭ forgesita, estas **Biafro** kaj la tiea senprecedenca humaneca malsat-katastrofo. Post du sangaj puĉoj en **Niĝerio** en la jaro 1966 kontraŭ du registroj, Ojukwu, la armea reganto de la orienta regiono de Niĝerio, deklaris ĉi tiun parton de la lando, kie ĉefe vivis la tribo Igbo, sendependa en la 30-a de majo 1967, nomante ĝin Respubliko de Biafro. Dum la Igbo-tribo ĝenerale bonvenigis la deklaron de la sendependeco, ĝi estis nete malakceptita de pli malgrandaj etnoj en la koncernata regiono, kie oni timis esti marĝenigita kaj subpremata de ŝtato regata de la Igbo-tribo. Fakte, nur Tanzanio, Gabono, Zairio, Ebura Bordo kaj – kiel la sola ne-afrika lando – Haitio rekonis Biafron kiel sendependan ŝtaton. La unua atako de niĝeriaj trupoj okazis la 6-an de julio 1967, kiam ili transiris la riveron Niĝero kaj invadis Biafron, per kio komenciĝis la Biafra Milito. La konflikto daŭris ĉirkaŭ 30 monatojn kaj finiĝis en januaro 1970 per la kapitulaco de Biafro. Almenaŭ unu miliono – iuj taksis eĉ du milionojn aŭ pli – da homoj pereis en tiu milito. La rimedoj prenitaj de la niĝeria flanko kiel la ekonomia blokado kontraŭ Biafro kaŭzis ĝeneralan malsatkrizon ĉe la civila loĝantaro, same kiel diversajn atakojn kontraŭ Igbo-civiluloj, kiuj kune kun la masakroj de 1966 estis parte klasifikitaj kiel genocido kontraŭ la Igbo-popolo. La humaneca katastrofo en Biafro manifestiĝis en la ŝokaj bildoj pri deformitaj malsataj infanoj, kiuj atingis la eksteran mondon, kaj estis la kialo por la starigo de la asocio „Kuracistoj Sen Limoj”. La Biafra Res-publiko ekzistis ĝis la 15-a de januaro

[21] La tuta historo de la „Praga printemo“ estas priskribita sub http://www.planlingvoj.ch/Prago1968.pdf.

1970 kaj finfine reintegriĝis en Niĝerion post la milito. Hodiaŭ, Radio Biafra Londo-no, la Organizaĵo „Bilie Homaj Rajtoj“ kaj la „Konsilio de Indiĝenaj Homoj de Biafro“ strebas restarigi tiun ŝtaton. Plue ekzistas aktiva subtera „Movado por la Aktualigo de la suverena ŝtato Biafra“ (MASSOB) por reatingi la sendependon de Biafro.[22]

* * *

La 24-an de oktobro 1970 UN laŭtlegis sian deklaraĵon pri la principoj de la internacia juro por marki sian 25-an datrevenon. Per tio oni substrekis siajn postulojn rilate la respektadon de la homaj rajtoj kaj koncerne la sendependecon de la koloniaj ŝtatoj. Konsiderante la kreskantan evoluabismon inter nordo kaj sudo, oni proklamis la „duan jardekon de la evoluigo“.

1971 estis proklamita kiel „Internacia Jaro de la batalo kontraŭ rasismo kaj rasa diskriminacio“. Pro la Apartheid-politiko de la blanka malplimulta registaro **Sud-Afriko** estis ekskludita de kunvenoj kaj voĉdonoj de la Ĝenerala Asembleo en 1974, kaj armila embargo ekvalidis en 1977. Ambaŭ decidoj estis nuligitaj nur en 1994, post kiam la Apartheid-reĝimo estis likvidita.

Kiam en decembro 1971 *Kurt Waldheim* el Aŭstrio estis elektita kiel kvara ĝenerala sekretario de UN, li praktikis „trankvilan, preventan diplomation“ kaj ekstreme aktivan vojaĝan aktivecon, kiu kondukis lin inter alie al Sudafriko por diskuti pri la malfacila situacio en **Namibio**. En junio 1972 li peradis en la kipra demando kaj en julio esprimis sin kontraŭ la usona bombado de Nord-Vjetnamio, kio nature kolerigis la usonanojn. Li ankaŭ incitis la ĉagrenon de Israelo kaj Usono, kiam li bonvenigis la elpaŝon de Jasser Arafat en la Ĝenerala Asembleo de UN en novembro 1974. Dum lia oficperiodo estis adopttaj la rezolucioj, kiuj kondamnis la israelan militan agreson kontraŭ Libano (1973)), la israelan logigan politiko en la okupataj teritorioj (1979). Alia rezolucio de UN kondamnis la cionismon kiel rasismon (1975), sed ĝi estis retirita en 1991. En lia oficperiodo okazis ankaŭ la milito de Jom Kippur de 1973 ankaŭ falis dum sia oficperiodo, dum la sinteno de Waldheim kaj de la Sekureca Konsilio de UN estis akre kritikita, ĉar ili ne kondamnis la atakojn de Sirio kaj Egiptio, pro tio ke Sovetunion kontraŭis senprokrastan armisticon; tiu sinteno ŝanĝigis nur post kiam la milito farifis pli favora al Israelo. Lia kandidatiĝo por tria oficperiodo estis sabotita en decembro de 1981 per vetoo de la Ĉinio.

Pri la memkompreno de Unuiĝintaj Nacioj Waldheim klarigis, ke „ili ne estas monda registaro, kaj ke la ĝenerala sektetario de UN ne estas ĝia ĉefministro. Ni ne havas ekzekutivan povon. Ni havas nur la moralan povon. Kiel ĝenerala sekretario mi havas neniun super mi. Sed ĉefministro havas la prezidenton de la republiko, la ŝtatestron kaj antaŭ ĉio la parlamenton, kiuj donas instrukciojn. (…) Mi havas neniun [super mi]. Mi estas la plej lasta instanco.“[23]

La okulfrapa sinteno de Waldheim kiel ĝenerala sektetario de UN rilate al Israelo ne restis sen demandoj kaj supozoj pri la kialoj. Antaŭ ol Waldheim en julio 1986 estis elektita kiel prezidento de Aŭstrio, eksplodis akra internacia diskuto pri lia rolo dum la nazia tempo kaj dum la dua mondmilito kaj kion li sciis pri diversaj eventoj en Jugoslavio kaj Grekio. Kiel ano de la germana armeo Waldheim partoprenis la okupacion de la Sudeta Lando kaj Francio. Ekde junio 1941 li partoprenis en la germana milito kontraŭ Sovetunio kaj estis vundita ĉe Orjol. Post sia resaniĝo li estis sendita al la ĉefa komando de la 12-a armeo al Balkanio. Inter alie li servis kiel tradukisto por itala montara divizio en Montenegro, kiu batalis kontraŭ jugoslaviaj partizanoj. Poste li servis en iu bataltaĉmento en Bosnio, kiu same kontraŭbatalis jugoslaviajn partizanojn. En julio 1942 Waldheim ricevis la ordenon de la „krono de la reĝo Zvonimir en arĝento kun kverkaj folioj“ de la faŝisma Ustaŝa reĝimo de Kroatio „pro kuraĝa batalado sub malamika fajro“. En aŭgusto 1942 Waldheim fariĝis membro de la generala stabo de la 12-a armeo en Arsakli proksime de Saloniki en norda Grekio sub generalkolonelo Alexander Löhr (kiu postmilite estis kondamnita kiel militkrimulo kaj ekzekutita de Jugoslavio). En decembro 1942 Waldheim fariĝis ĉefleŭtenanto. Intertempe li servis ankaŭ en Albanio. En oktobro 1943 li fariĝis unua oficiro en la generala stabo por „specialaj taskoj“ proksime de Ateno. La ĉefsidejo transloĝiĝis tien ekde la fino de julio 1943. Waldheim, kiu ricevis altajn distingojn de la germana armeo, partoprenis

[22] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Biafra.
[23] Vd. la DVDn *Waldheims Walzer* de Ruth Beckermann (2020), ekde min 10, kiu rakontas la historion de la akuzoj kontraŭ Kurt Waldheim lige kun certaj oficoj dum la dua mondmilito en Balkanio kaj supozataj scioj, kiujn li prisilentis en sia aŭtobiografio.

kunvenojn, preparis raportojn pri la aktuala situacio de la malamiko kaj raportojn pri pridemandadoj de militkaptitoj. Li ankaŭ sciis pri militkrimoj kaj deportadoj de judoj al koncentrejoj kaj ekstermaj lagroj, sen posedi la rajton por doni ordonojn. Malkovrinte malnovajn arkivajn dokumntojn, la usonanoj kaj precipe la reprezentantoj de la Monda Juda Kongreso riproĉis al li, ke li prisilentis tiujn aferojn en sia aŭtobiografio. Ĉio tio havis gravajn sekvojn por li, kiam li estis prezidento de Aŭstrio. En aprilo 1987 Usono metis lin sur specialan liston de nedeziratajn personoj, kio fakte egalis al malpermeso por Waldheim viziti Usonon. Tial li ankaŭ ne plu estis invitita de la okcidentaj ŝtatoj kaj ricevis nur kelkajn ŝtatajn vizitojn, plejparte de la Orienta Bloko, aŭ invitojn de iuj arabaj kaj islamaj ŝtatoj. Lia vizito al Saddam Hussein en 1990 okaze de la sukcesa liberigo de 97 aŭstraj kaj svisaj ostaĝoj estis akompanita de akraj protestoj. La rilato inter Aŭstrio kaj Israelo restis streĉita ĝis 1992. En junio 1987 la aŭstria registaro starigis internacian komisionon de historiistoj, kiu ĝis februaro 1988 venis al la konkludo, ke Waldheim havis „neniun personan kulpan konduton“ kaj „neniun partoprenon en militkrimoj“, sed li havis konojn pri ili kaj faciligis kelkajn tiajn krimojn per siaj „raportoj pri la situacio de la malamiko“, do li tamen havas ian moralan kulpon. Krom tio oni riproĉis al li, ke li „klopodis forgesigi sian armean kaj militan tempon“ kaj „bagateligi“ ĝin, kiam tio ne plu estis ebla. Waldheim insistis pri sia senkulpeco, kvankam la prezidanto de la Juda Monda Kongreso, Bronfman, konsideris lin „parto de la nazia murdmaŝino“. Waldheim plendis kontraŭ li, sed poste retiris la plendon. Tiel la skandalo ĉirkaŭ Waldheim ŝvelis ĝis la fino de sia mandato kiel prezidento de Aŭstrio. Ĉar li restis izolita politikisto, li rezignis pri nova kandidatiĝo en 1992. Aŭstrio certe suferis rilate sian internacian reputacion, sed la tuta historio ĉirkaŭ Waldheim havis la avantaĝon, ke en tiu lando finfine okazis pli forta publikaj okupiĝo kaj interesiĝo pri la nazia pasinteco, kies prilaborado longtempe estis prokrastita, ĉar multaj aŭstroj preferis viŝi tiun malagrablan temon sub la tapiŝon.[24]

* * *

Per la subskribo de la „Baza Traktato“ de 1972 inter Federacia Respubliko Germanio (FRG) kaj Germana Demokratia Respubliko (GDR), la okcidentgermana registaro rezignis pri sia pretendo de la ekskluziva rajto reprezenti la tutan germanan popolon, kio malfermis al ambaŭ germanaj ŝtatoj la vojon al la membriĝo en UN. Nura membreco de Okcidenta Germanio ne estis ebla pro la sovetia kontraŭstaro.

La kreskanta nombro de sendependaj afrikaj kaj aziaj UN-ŝtatoj kaŭzis superpezon de voĉdonoj de evolulandoj en la Ĝenerala Asembleo. Jam en la 1960-aj jaroj la **„Grupo de la 77“** estis formita, kiu per la subteno de Ĉinio kaj Sovetunio povis pli kaj pli profiliĝi. La postulo de tiu grupo starigi novan mondan ekonomian ordon kondukis en 1974 kontraŭ la voĉoj de la okci-dentaj industriaj landoj al la adopto de la „Ĉarto de la ekonomiaj rajtoj kaj devoj de la ŝtatoj por redukti la dependecon de la sudo kaj al justa distribuo de la bonfarto“.

Por promocii la **egalecon de la virinoj** ankaŭ diversaj iniciatoj akiris gravecon en la 1970-aj jaroj. La unua Monda Virina Pintkunveno, kiu okazis en Meksikurbo en somero 1975, markis la komencon de la „Jardeko de la Virinoj de UN“. La fonduso por la virina disvolviĝo de UNIFEM estis starigita jaron poste. En 1979 la „Konvencio pri la forigo de virina diskriminacio“ estis adoptita. Pacmisioj estis senditaj al **Sinajo** (UNEF II) en 1973, al la montaro **Golan** (UNDOF) en 1974 kaj al **Libano** (UNIFIL) en 1978. Pro la turka invado de **Kipro**, la misio de UNFICYP estis pligrandigita en 1974 por kontroli la 180 kilometrojn longan bufran zonon („Verda Linio“).

En 1976 forpasis **Mao Zedong**, gvidinto de la ĉina komunisma revolucio, kiu laŭ estimoj kaŭzis ĝis 80 milionoj da mortviktimoj, kiuj pereis pr diversaj kaŭzoj. Malgraŭ tio li estis adorata kaj festata en la tuta mondo, kaj lia „Biblio“, kiu estas manlibro konsistanta el citaĵoj kaj mallongaj eseoj, aperis en eldonkvanto de pli ol unu miliardo da ekzempleroj en multaj lingvoj, inter alie en Esperanto.[25] Kune kun Hitler kaj Stalin Mao estas konsiderata kiel la plej granda amasmurdisto en la historio de la homa-ro. Malgraŭ tio lia bildo daŭre ornamas la bankbiletojn de Ĉinio, kie li estas adorata de la komunistoj kaj ankaŭ de granda parto la popolo kiel patrono de la popola respubliko.

[24] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Kurt_Waldheim.
[25] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Das_Schwarzbuch_des_Kommunismus.

Oni povas dume konkludi, ke la koloniismo/imperiismo, komunismo kaj nacisocialismo, kiuj estas aliaj nomoj kaj formoj de ekstrema naciismo, kaŭzis la plej multajn mortviktimojn en la historio de la homaro. Praktike ĉiuj gvidaj nacioj kaj ŝtatoj portas kulpon kaj respondecon en la historio. La nombro de mortviktimoj ne estas konata, sed verŝajne temas pri kelkcent milionoj da homoj.[26]

Alia komunisma peripetio ripetiĝis en **Kamboĝo**, kie en 1975 la **„Ruĝaj Kmeroj“**, kiu estis maoisma naciisma gerila movado, akaparis la povon kaj enkondukis teroran reĝimon, kiu daŭris ĝis 1979. La preskaŭ kompleta forpelado de la loĝantaro de la ĉefurbo Phnom Penh kul-minis en genocido en Kam-boĝo, kiu kaŭzis 1,7-2,2 milionojn da mortviktimoj, inter ili multaj anoj de etnaj kaj religiaj minoritatoj. En decembro 1978 Vjetnamio lanĉis grandan ofensivon en Kamboĝo kun 14 divizioj kaj la subteno de 15 mil kamboĝanoj, kiuj fuĝis de la Ruĝaj Kmeroj, kaj en januaro 1979 instalis registaron laŭ propra gusto. **Pol Pot**, la gvidanto de la „Ruĝaj Kme-roj“, malaperis en la subtero. En 1992-93 UN instalis „Transiran administracion en Kamboĝo“, kiu estis deklarita kiel pacmisio sub la titolo UNTAC, kiu havis la taskon restarigi civilan kaj demokratian ordon en tiu lando. Provoj de aktivuloj de okcidentaj homrajtaj asocioj akuzi Pol Pot-on antaŭ la Internacia Kortumo en la 1980-aj jaroj malsukcesis, ĉar Tajlando rifuzis lian transdonon kaj Pekino kaj Vaŝingtono kontraŭis ĝin. La 15-an de aprilo 1998 Pol Pot eksciis, ke la „Ruĝaj Kmeroj“ intencis transdoni lin al Phnom Penh, kie li devis esti akuzita pro krimoj kontraŭ la homaro. La saman tagon lia edzino trovis lin morta en la lito. La kaŭzo de lia morto estis oficiale deklarita kiel korinfarkto.[27]

Kiam en la 1970-aj jaroj Sovetunio modernigis sian nuklean armilan arsenalon, konstruante raketojn de la tipo RSD-10 Pioner, nomatajn en Okcidento SS-20, NATO reagis per la starigo de novaj nukleaj raketoj de la tipoj Pershing II kaj BGM-109 Tomahawk. Tio signifis plian etapon en la nuklea armado inter la du grandpotencoj.[28] Kvankam la sovetiestro Breĵnev kon-stante palavris pri paco, por la Okcidento la agresema karaktero de komunisma Sovetunio estis evidenta. La esenco de la senprecedenca usona armado estis repuŝi la sovetiajn ambiciojn en la mondo. Ĝi okazis kvazaŭ en la senco de la memdefendo kaj servis al la konservado de la propra hegemonio en la mondo kaj el la vidpunkto de la Okcidento do estis absolute necesa. Krom la demonstrado al Sovetunio, ke en Okcidento la homoj vivas pli bone ol en la sovetieca socialismo, la grandskala armado estis la sola efika rimedo, kiu helpis atingi tiun celon.

En 1979 la usona prezidento Carter kaj la sovetia ŝtatestro Breĵnev subskribis la SALT-II-traktaton por limigi la strategian armadon, sed Usono ne ratifis ĝin. Kiam NATO, decidis kompletigi la armadon, la sovetia armeo invadis Afganion en decembro 1979 kaj kaŭzis novan gravan krizon en la regiono, kiu daŭris 10 longajn jarojn kaj kiu pro la postsekvoj ĝis hodiaŭ ne estas tute finita. La ĉefaj protagonistoj de la sovetia milito en Afganio estis neniu alia ol la sovetiaj „malmoluloj“ Breĵnev, Andropov kaj Gromyko, la famaj „falkoj“ en la sovetia politburoo, kiu plejparte konsistis el malsanaj marasmaj maljunuloj, kiuj iom post iom perdis la lucidon kaj kontrolon pri la situacio en la vasta lando kaj en la sovetia bloko. Dum longa tempo Breĵnev vidis sin kaj estis ´vendita´ kiel pacapostolo de la komunisma mondo, kiu celis bonajn rilatojn kun la Okcidento, sed tiu fasado perdis sian sencon kaj kredindecon. La invado kaj okupado de Afganio fare de Sovetunio rikoltis fortan kritikon de triamondaj landoj. Dum la afgana reĝimo estis apogata nur de Sovetunio, Hindio kaj GDR, la t.n. ĝihadismaj muĝahidoj, kiuj provis forpeli la sovetiajn trupojn el la lando, estis subtenataj de tuta aro de ŝtatoj kiel Usono, Pakistano, Saŭdarabio, Egiptio, PR Ĉinio, FRG kaj eĉ Israelo.[29] La klopodoj de la grandpotencoj redukti la streĉitecon en la mondo dume estis interrompitaj, kaj la ĝenerala pesimismo atingis novan kulminon.

La **packontrakto inter Israelo kaj Egipta** estis subskribita la 26-an de marto 1979 en la usona ĉefurbo Vaŝingtono de la israela ĉefministro Menaĥem Begin kaj de la egipta prezidento Anvar as-Sadat. La usona prezidento Jimmy Carter subskribis la packontrakton kiel atestanto. La pactraktato estis preparita de la intertraktoj kaj de la traktato de la 17-a septembro 1978 en Camp David, Mary-

[26] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Kolonialismus, https://de.wikipedia.org/wiki/Kommunismus, https://de.wikipedia.org/wiki/Nationalsozialismus.
[27] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Rote_Khmer.
[28] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/RSD-10, https://de.wikipedia.org/wiki/NATO-Doppelbeschluss.
[29] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Sowjetische_Intervention_in_Afghanistan, https://de.wikipedia.org/wiki/Krieg_in_Afghanistan, https://eo.wikipedia.org/wiki/Muĝahidoj.

land, Usono, kiu baziĝis je la rezolucio 241 de la Sekureca Konsilio de UN. Krom la reciproka agnosko, la traktato antaŭvidis la finon de la milita stato ekzistanta ekde 1948 inter ambaŭ ŝtatoj. Ĝi ankaŭ determinis, ke Israelo redonu la Sinajan duoninsulon kune kun la naftofontoj kaj la tieaj strategiaj punktoj, malkonstruu la israelajn loĝlokojn kaj forigu la judan loĝantaron de tiuj zonoj. Egiptio estis la unua araba ŝtato, kiu oficiale agnoskis Israelon diplomatie. Jordanio sekvis en 1994 per propra pac-kontrakto. La Araba Ligo reagis per la ekskludo de Egiptio el sia sino kaj reakceptis ĝin nur en 1989. Krome, Egiptio kaj ĝia prezidanto incitis la koleron de la islamistoj kaj de la plej multaj aliaj arabaj ŝtatoj, ĉar Egiptio rompis tabuon per la agnosko de Israelo. Kiel ĉefa konsekvenco Sadat estis mortigita de islamistoj du jarojn poste.

Kiam la politika krizo en **Pollando** akriĝis, la samaj moskvaj hegemonoj, kiuj lanĉis la militon en Afganio, evidente havis ankaŭ la intencon perarmee interveni en Pollando laŭ sama maniero kiel en GDR 1953, Hungario 1956 kaj Ĉeĥoslovakio 1968 por sufoki la opozician movadon de la grupo „Solidareco“. Anstataŭ tio ili igis generalon Jaruzelski, kiu tiam estis la ĉefo de la pola komunisma partio (kaj la plej malŝatatan homon en Pollando), proklami la militan staton en la 13a de decembro 1981. Tankoj tamen cirkuladis sur la stratoj de Varsovio.[30] La homaro estis ŝokita kaj la komunismo en Pollando estis definitive detruita. En 1983 Lech Wałęsa, la heroa gvidanto de la kontraŭ-komunis-ma movado „Solidareco“, ricevis la Nobelan Pacpremion.

* * *

La 1-an de februaro 1979 la ŝijaisma ajatolao Ruhollah Ĥomejni revenis de la franca ekzilo en Parizo al Teherano, kie li proklamis la „Islaman Respublikon“ en **Irano**, kiu fariĝos nova problemŝtato por la internacia komunumo kaj unu el la plej brutalaj diktaturoj en la moderna historio de la homaro sur la bazo de la islama Ŝario laŭ ŝiisma interpreto. Ekde tiu „islama revolucio“ la iamaj bonaj rilatoj de Persio kun la okcidentaj ŝtatoj senprokraste trans-formiĝis al malferma malamikeco, kiu estas firme ankrita en la ŝtata ideologio de Irano, precipe en la kazoj de Usono kaj Israelo. La perdo de Irano post la falo de la ŝaho de Persio signifis por Usono perdon de la influo en la regiono. Per sia politiko Irano tamen plejparte izoliĝis en la ekstera politiko, sed samtempe establis sin kiel regiona grandpotenco en Mezoriento. Koncerne la politikan sistemon de Irano, kiu estas klasifikita kiel „aŭtoritatisma reĝimo“, la homrajta asocio „Freedom House“ taksis ĝin en 2012 „ne libera“, pro gravaj sistemaj mankoj sur la kampoj de la politikaj kaj civilaj rajtoj. En la internacia Indekso pri Demokratio Irano rangas sur la 151-a el 167 pozicioj. Krom tio, en 2011 Irano troviĝis sur la 120-a el 182 rangoj en la percepto de la Indekso pri korupto. Ankaŭ „Amnestio Internacia“ raportadas pri daŭraj amasaj lezoj de la homaj rajtoj en granda skalo. Post la islama revolucio serio de mortigoj komenciĝis kontraŭ disidentoj kaj opoziciaj politikistoj eksterlande, kiuj estis deklaritaj kiel malamikoj de dio. Ĉi tiu serio kulminis inter 1989 kaj 1996 kaj rezultigis pli ol 160 viktimojn. La viktimoj inkluzivis inter alie la nevon de la ŝaho, Ŝariar Ŝafik, kiu estis mortigita en 1979 en Parizo, Ali Akbar Tabatabai (mortigita en 1980 en Betesda), generalo Gholam Ali Oveisi (mortigita en 1984 en Parizo), Abdul Raĥman Ghassemlou, prezidanto de la Demokratia Partio Kurdistano-Irano (mortigita 1989 en Vieno), Kazem Rajavi, aktivulo pri homaj rajtoj (mortigita en 1990 en Ĝenevo). Ĉefa simbolo por tiu murda politiko de Teherano estis la fatvo kontraŭ Salman Ruŝdie, fama aŭtoro de la libro „Satanaj versoj“. La mortkondamno prononcita de Ĥomejni estis konfirmita plurfoje kaj ĝis nun (2016) ne estis revokita. El okcidenta vidpunkto, la irana „dia ŝtato“ do pli similas al la infero ol al la paradizo. Post kiam la elekto de la nova regestro Mohammad Ĥatami en la jaro 1997 vekis esperojn pri plibonigo de la homrajta situacio en Irano, ĝi denove draste malboniĝis sub la regado de prezidento Maĥmud Aĥmadinejad, kiu kulminis en la perforta subpremado de la protestoj post la prezidantaj elektoj de Irano en 2009. Lige kun la „milito kontraŭ la terorismo“ Usono (Bush filo) metis Iranon sur la liston de la „kanajlaj ŝtatoj“. Raporto de la Konsilio pri Homaj Rajtoj de Unuiĝintaj Nacioj, kiu estis petita de la Sekureca Konsilio de UN esplori la homajn rajtojn en tiu lando, skribis pri neŝanĝitaj kaj multnombraj lezoj de la fundamentaj homaj rajtoj en Irano fine de marto 2011. Precipe ekzistis kreskanta nombro da ekzekutoj, amputoj, arbitraj arestoj, maljustaj procesoj, torturo kaj fitraktado de defendantoj de la homaj rajtoj, advokatoj, ĵurnalistoj kaj opoziciaj aktivuloj. La esperoj ligitaj kun la elekto de Hassan Ruhani kiel nova prezidento en 2013 iom faciligis la politikan situacion. Sed la espero, ke la politikaj kaj ĉiutagaj liberecoj estos

[30] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Kriegsrecht_in_Polen_1981%E2%80%931983.

garantiataj kaj ke multaj politikaj malliberuloj estos liberigitaj, estis rapide seniluziigitaj. Ŝirin Ebadi, kiu en 2003 ricevis la Nobelan pacpremion, akre kritikis la bilancon pri la homaj rajtoj sub Ruhani kaj riproĉis al la irana registaro mensogi rilate la liberigon de politikaj malliberuloj. Ebadi kaj Amnestio Internacia ankaŭ notis la fakton, ke la nombro de ekzekutoj atingis rekordan nivelon dum la oficperiodo de Ruhani kaj avertis la internacian komunumon, ke ĝi ne trompiĝu de lia reputacio kiel modera reformanto, kiun li evidenta ĝuas.

Alia problemo de Irano estas ĝia nuklea programo, pri kiu la iranaj gvidantoj asertas, ke ĝi servas sole al la kompletigo de la energia produktado kaj provizado de la lando. Tamen, Irano estas suspektata okupiĝi pri la evoluigo de nukleaj armiloj. Sed la registaro neis tiun aserton kaj argumentas, ke la nuklea programo servas nur al paca uzado. La unua alvoko por la konstruado de nukleaj armiloj venis de la irana ajatolao kaj entreprenisto Rafsanĵani en 1988, kiu estis prezidento de Irano 1989 ĝis 1997.[31]

La rezolucoj de UN rilate Iranon koncernis precipe ĝian nuklean programon. Rezolucio 1747 de la Sekureca Konsilio de UN pri la irana nuklea programo, proponita de de Francio, Germanio kaj Britio, estis unuanime adoptita en marto 2007. La rezolucio emfazis la bezonon entrepreni politikajn kaj diplomatiajn klopodojn en la disputo kun Irano por atingi intertraktitan solvon kaj bonvenigis la tiurilatajn iniciatojn de Ĉinio, Francio, Germanio, Britio, Usono kaj de ĉi-rilata reprezentanto de Eŭropa Unio. En tiu rezolucio estis ankaŭ dirite, ke tia solvo devas certigi, ke la irana nuklea programo servas ekskluzive al la paca uzo de la nuklea energio. Post la voĉdono en la Sekureca Konsilio la ministro pri eksterlandaj aferoj de Irano rifuzis la rezolucion, per kiu la SK celas misuzi la instancon por „trudi kontraŭleĝan, nenecesan kaj nepravigeblan rimedon kontraŭ la paca nuklea programo de la Islama Respubliko Irano“ kaj kvalifikis la decidon de la SK kiel ne pravigitan per la UN-Ĉarto, kun Irano konsideras kiel lezon de artikolo 25 de la Ĉarto de UN, kiu garantias al la membro-ŝtatoj la rajton je propra disvolviĝo kaj klerigo.[32]

La konflikto inter la orienta kaj okcidenta blokoj, kiu akceliĝis pro la rapidigo de la grandskala armado de la superaj potencoj, kaj ankaŭ ilia enplektiĝo en la **Unua Golfa Milito** (1980-88!)[33] kaj aliaj militscenejoj (Afganio, Kamboĝo kaj Nikaragvo) denove paralizis la decid-povon de la Sekurecan Konsilion. La kvina ĝenerala sekretario *Javier Pérez de Cuéllar*, kiu venis el Peruo kaj ekoficis en 1982, kritikis la mankantan pretecon de la membroj interveni en internaciajn konfliktojn. Lia kritiko koncernis ankaŭ la tro unuflankan solvon de konfliktoj kaj la interkonsentojn ekster la organizo, kio faris Unuiĝintajn Naciojn dubinda forumo por kredindaj pacaj intertraktoj. Krom tio, la kreskanta pliŝuldiĝo de la evolulandoj kaj la rifuzo de multaj membro-ŝtatoj ĝustatempe plenumi siajn devigajn kontribuojn, kaŭzis la plej malbonan financan krizon en la historio de UN. Pro siaj altaj militkostoj precipe Usono kiel la plej grava financisto apenaŭ plenumis siajn financajn devojn al la organizo.

La raporto de la tiama sveda ĉefministro Olof Palme, kiu estris sendependan komisionon de UN pri la aferoj de la malarmado kaj internacia sekureco, estigis multajn novajn internaciajn pac-iniciatojn, kiuj konservis la temon de la senarmigo sur siaj tagordoj.

1983 estis proklamita de UN kiel „Jaro de la Monda Komunikado“, 1986 kiel „Internacia Jaro de la Paco“ kaj 1995 kiel „Jaro de la Tolero“.

Piednota kuriozaĵo de tiu tempo okazis en Karibio, nome la invado de la insuleto **Grenado** fare de usonaj trupoj en oktobro 1983. De 1958 ĝis 1962 Grenado, situanta norde de Venezuelo, estis parto de la Okcidenta Hinda Federacio. En 1974 Grenada sendependiĝis sub ĉefministro Eric Gairy, kiu havis bonajn rilatojn kun Usono kaj Britio. Sub brita administrado la aktivaj kaj pasiva voĉdon-rajto por virinoj estis enkondukita la 1-an de aŭgusto 1951. Gairy regis ĉiam pli diktatorece kaj sub-tenis la sekretan policon por subpremi kontraŭulojn. La registaro de Gairy estis renversita en 1979 en senbrida revolucio de iu maldekstrema grupo sub Maurice Bishop, kiu politike celis blokan neŭtra-lecon kaj bonajn rilatojn kun Usono, Sovetunio kaj Kubo samtempe. Sed la rilatoj kun Usono mal-boniĝis rapide post 1981, kiam Ronald Reagan fariĝis pre-

[31] Pli detale pri tio vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Iranisches_Atomprogramm.
[32] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Resolution_1747_des_UN-Sicherheitsrates.
[33] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Erster_Golfkrieg.

zidento de Usono, kiu enkondukis bojkoton kontraŭ Grena-do. Sociaj reformoj (inkluzive de senpaga sanservo kaj konstruado de novaj lernejoj) certigis la popularecon de Maurice Bishop ĉe la loĝantaro. Sub lia administrado, konsorcio gvidata de brita kompanio komencis konstrui flughavenon kun la celo stimuli la turismon. Ankaŭ la situacio de la homaj rajtoj pliboniĝis, kvankam, kiel jam okazis sub Gairy, liberaj elektoj ne okazis. En puĉo de 1983 Bishop estis anstataŭigita de siaj de internaj partiaj rivaloj per vicĉefministro Bernard Coard kaj poste eĉ mortigita de armeanoj. Post la puĉo kontraŭ Bishop la Ĝenerala Guberniestro de Grenado, Paul Scoon, kiu funkciis kiel ŝtatestro de Grenado kiel reprezentanto de la reĝino Elizabeto IIa, kaj la Organizo de Orientkaribiaj Ŝtatoj petis al Usono interveni, kvankam la tiama brita registaro de Mar-garet Thatcher ne deziris tion. Do, la 25an de oktobro 1983 Usono lanĉis invadon de Grenado kadre de la operaco „Urĝa Furiozo“ kun la rezulto, ke la maldekstra registaro estis renversita. Verŝajne Vaŝing-tono timis troan proksimecon de Grenado al Kubo kaj Nikaragvo, du aliaj komunismaj aliancanoj en la regiono. La jura legitimeco de la interveno estis internacie kontestata kaj kritikata inter alie de Britio kaj Kanado same kiel de la Ĝenerala Asembleo de UN. La invado de Grenado estis uzata en la sovetia kaj komunisma tendaro kiel kontraŭ-argumento, kiam la Okcidento kritikis la sovetian invadon de Afganio. Kompreneble, ambaŭ kazoj ne estis kompareblaj. Depost 1984 la elektoj en Grenado estas konsideritaj kiel liberaj, kaj la situacio normaliĝis sur la insulo.[34]

La interna amilito en **Srilanko** estis armita konflikto, kiu daŭris de 1983 ĝis 2009, en kiu tamilaj separistoj, precipe la organizaĵo „Liberigaj Tigroj de Tamil Eelam“ (LTTE), batalis por la sendependeco de la insula nacio de Srilanko. LTTE postulis, ke la tamilaj loĝlokoj en la nordo kaj oriento de la sinhale dominata insulo estu transformitaj en sendependan ŝtaton „Tamil Eelam“. Post pli ol 25 jaroj la milito finiĝis la 18-an de majo 2009 per la kompleta milita venko de la srilankaj registaraj trupoj super la tamila naciliberiga movado. La nombro de mortintoj dum la milito inter 1983 kaj 2009 estis kalkulita per ĉirkaŭ 80 ĝis 100 mil homoj.[35]

* * *

Se paroli pri krudaj monstraj diktaturoj kaj drastaj lezoj de la homaj rajtoj en la „Tria Mondo“, oni certe devas mencii la prezidentojn de Haitio, **François Duvalier**, kaj de **Filipinoj**, **Ferdinand Marcos** , kiu regadis tiun insularon. Indas pli detale okupiĝi pri tiuj kazoj.

Ekde 1957 la politika potenco en **Haitio** troviĝis en la manoj de la familio **Duvalier**, unue de la patro **François** kaj poste de la filo **Jean-Claude.** François Duvalier, ĝenerale konsiderata kiel marioneto de la armeo, venkis en la elektoj en 1957 per pli ol 70% de la voĉoj. Kvankam estis konstatitaj iuj malregulaĵoj en ĉi tiu baloto, oni ne dubis, ke ĝia rezulto konformis al la volo de la popolo. Post unua puĉprovo en la mezo de 1958 prezidento Duvalier forigis siajn politikajn kontraŭulojn en la armeo kaj faris ĉion aŭ por submeti la armeon sub sian kontrolon aŭ elŝalti ĝin. Post kelkaj jaroj li sukcesis submeti ĝin komplete sub la ŝtata gvidado. Por malebligi pliajn puĉojn kontraŭ si, li movis la arsenalon de la armeo al la prezidenta palaco. Por la persona protekto de la prezidenta respondecis estis starigita speciala gvardio kun apartaj kompetencoj. En 1959 li kreis propran milicon, nomatan VSN (Volontuloj de la Nacia Sekureco) por sekurigi sian potencon ekster la ĉefurbo. La membroj de ĉi tiu trupo fariĝis konataj kaj estis timataj en Haitio kiel „Tontons Macoutes“. Ĉar la pli malaltaj ranguloj de ĉi tiu sovaĝa grupo ricevis neniujn oficialajn salajrojn, ili estis devigitaj perlabori sian vivon per krimaj agadoj, ekzemple ĉantaĝo. Sian rivalon Clément Barbot Duvalier ordonis mortigi, kiam li igis danĝera por li. Duvalier proklamis novan konstitucion kaj gajnis la baloton de 1961 sen kontraŭa voĉo. *The New York Times* nomis tiun baloton la plej granda voĉdona fraŭdo en la historio de Latinameriko. Duvalier bazis sian potencon sur la nigraj malsuperaj kaj mezaj klasoj, kiujn li instigis kontraŭ la supera klaso de la mulatoj. Kiam ili provis malstabiligi la regadon de „Papa Doc“, kiel Duvalier estis moke nomata, kaj multaj komercistoj fermis siajn butikojn, Duvalier permesis al la homoj prirabi ilin. La sekvo de la subpremo, korupto kaj manko de perspektiva vivo estis, ke la talentuloj kaj inteligentuloj amase forlasis la landon. Duvalier travivis ne malpli ol naŭ provoj de puĉoj kontraŭ sia oficperiodo, kiuj estis subpremitaj per brutala perforto. Liaj sekvaj reprezalioj kostis la vivon de multaj sen-

[34] Lau https://de.wikipedia.org/wiki/Grenada#US-Invasion_1983.
[35] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Bürgerkrieg_in_Sri_Lanka.

kulpaj homoj, dum la efektivaj kulpuloj ne estis persekutataj aŭ punataj. Oni estimas, ke ĉirkaŭ 30 mil homoj fariĝis viktimoj de tiuj bandoj. Ankaŭ al atakoj el la vicoj de la armeo kontraŭ si Duvalier kruele reagis. Kiam bomboj eksplodis proksime al la prezidanta palaco en 1967, 20 membroj de la prezidenta gvardio estis ekzekutitaj. La 22-an de junio 1964 Duvalier fariĝis oficiale dumviva prezidento de Haitio, enkondukante bizaran personan kulton. Li komparis sin sinsekve kun Lenin, Jesuo Kristo kaj Jean-Jacques Dessalines - la fondinto kaj imperiestro de Haitio de 1804 ĝis 1806, kaj vidis sin kiel enkorpiĝon de Haitio mem. Kiel iuj el siaj antaŭuloj Duvalier ofte disvastigis la onidiron, ke li eble reenkondukos la monarkion kun imperiestro. Duvalier, kiu estis konsiderata kiel modela kleptokrato, rigardis la ŝtaton kiel sian privatan posedaĵon. John F. Kennedy premis lin per riproĉoj de korupto kaj per propagandado de lia bildo kiel sangavida diktatoro. En pluraj okazoj li intencis alproksimiĝi al Sovetunio, kion la usonanoj nature nervoze observis. En 1962 helpvaroj ne plu estis oficiale senditaj al Haitio. Ĉar UN ne faris sian financan subtenon dependa de la demando pri la sangavideco aŭ koruptemo de Duvalier kaj ne severe kontrolis la monfluon al Haitio, granda parto de la monsumoj estis senditaj al eksterlandaj bankoj, inter alie en Svislando. Oni parolis pri 300 ĝis 800 milionoj da usonaj dolaroj, de kiuj 7,6 milionoj estis trovitaj en svisaj bankoj, kiuj fine redonis la monon al la haitia ŝtato. La federacia tribunalo de Svislando konsideris la klanon de Duvalier kiel kriman organizaĵon. Post la morto de Kennedy la rilato inter Duvalier kaj la usona registaro ŝanĝiĝis, kiu subtenis lin de nun. En la Dominika Respubliko laboris 20 mil haitiaj laŭsezonaj laboristoj laŭ neelteneblaj kondiĉoj kaj por mizeraj salajroj, de kiuj Duvalier mem enkasigis parton. Ĉi tiu praktiko ofte estis perceptata kaj nomata en eksterlando kiel moderna sklaveco. En aprilo 1963 Haitio eskapis armean atakon flanke de sia najbara ŝtato, la Dominika Respubliko. Post atako kontraŭ du el liaj infanoj Duvalier sendis la „Tonton Macoutes“ kontraŭ iu ajn, kiu ŝajnis esti suspektinda al li. Unu el la suspektatoj fuĝis en la ambasadejon de la Dominika Respubliko en Port-au-Prince, kiun Duvalier ordonis ataki. Juan Bosch, la dominika prezidento, senprokraste minacis per milita interveno en Haitio. Kiam post la invito de Bosch usonaj militŝipoj aperis antaŭ la haitia marbordo, tio preskaŭ kaŭzis la fuĝon de Duvalier el la lando. Bonŝance por Duvalier, Bosch baldaŭ estis mem detronigita en milita puĉo en Sandomingo. Inter alie Duvalier lanĉis ankaŭ kampanjon kontraŭ la opoziciaj komunistoj, kiuj estis devigitaj ekziliĝi aŭ estis mortigitaj. En 1969 komunismaj agadoj estis konsideritaj kiel krimo kontraŭ la ŝtata sekureco kaj povis esti punitaj per la mortpuno. Duvalier kontrolis la landon ĝis 1971, kiam „Papa Doc“ forpasis. Lia 19-jaraĝa filo, **Jean-Claude Duvalier** (nomata „Baby Doc“), devis fariĝi lia posteulo. Tiucele, antaŭ sia mort la patro speciale reduktis la minimuman aĝlimon por fariĝi prezidento de 40 al 20 jaroj. Kiam li heredis la oficon de la patro, oni ankaŭ ŝanĝis lian aĝon de 19 al 21 jaroj, do oni falsis la ciferon. Kelkajn tagojn post la konstitucia amendo pri la aĝlimo de la prezidento, la maljuniĝanta diktatoro lasis sian filon „konfirmi“ de la popolo en referendumo kiel posteulo de prezidanto. En tiu referendumo la loĝantaro voĉdonis favore al Jean-Claude Duvalier kiel posteulo de la patro denove sen kontraŭa voĉo. Por malebligi al haitiaj opoziciuloj renversi la haitian diktaturon, usonaj militŝipoj aperis antaŭ la haitia marbordo kaj tiel helpis certigi la glatan transiron de la potenco de la patro al la filo.[36]

Do, post kiam lia patro do fopasis la 21-an de aprilo 1971 (oficiale li mortis pro cerba infarkto), la filo transprenis la postenon de prezidento. Ĉar li malmulte sciis kaj interesĝis pri politiko kaj pri sia lando entute, Jean-Claude Duvalier, naskita en 1951, transdonis la ŝtatajn aferojn al sia pli maljuna fratino, kaj la ceremoniaj devigoj estis ofte plenumitaj de lia patrino Simone Ovide Duvalier. La griza eminentulo malantaŭ Duvalier estis Luckner Cambronne, ministro pri internaj aferoj, kiu jam karieris sub lia patro. Li respondecis por diversaj amasmurdoj kaj aliaj krimoj en Haitio (por kiuj li neniam estis jure persekutita), prizorgis la sekurecajn problemojn kaj la glatan transdonon de la povo de la patro al la filo. Duvalier filo mem vivis plejparte la bonan vivon de amuziĝanto en la socio de junaj riĉuloj.

En la komenco „Baby Doc“ iniciatis iujn reformojn, ekzemple malstreĉigon de la gazetara cenzuro, amnestiojn por politikaj malliberuloj kaj reformon de la justico, sed finfine ne multe ŝanĝiĝis kompare kun la diktaturo de lia patro. Ankaŭ li fidis al la bandoj de „Tontons Macoutes“, la fifama kaj same timata haitia milico. Li ĉirkaŭigis sin per egoismaj konsilistoj kaj flatemaj amikoj, pri kies riĉiĝo kaj misuzo li silentis. Liaj ĉefaj enspezoj originis de la enspezoj de la tabaka administrado, kiu kon-

[36] Lau https://de.wikipedia.org/wiki/François_Duvalier.

trolis la tabakan monopolon de Haitio. Tiuj enspezoj poste kompletiĝis per aldonaj enspezoj el entreprenoj kontrolataj de li, tiel ke lia jara enspezo superis 100 milionojn da usonaj dolaroj, dum la popolo pli kaj pli mizeregis. Per la vizito de la papo en marto 1983 kaj lia publika kritiko pri la situacio en Haitio, la malkontento de la loĝantaro komencis kreski. En oktobro 1985 komenciĝis tumultoj en Haitio. Duvalier respondis per dek-procenta redukto de la maksimumaj prezoj por bazaj manĝaĵoj, sed ankaŭ per la fermo de sendependaj radiostacioj, per policaj kaj armeaj operacoj kaj restrukturado de la registaro. Tamen ĉi tiuj rimedoj havis neniun sukceson kaj pliakrigis la ĝeneralan situacion. Sekve, la usona registaro sub Ronald Reagan ŝanĝis sian politikon kaj premis Duvalier, por ke li aŭ efektivigu demokratiajn reformojn aŭ forlasu la landon. Sed Duvalier nete ignoris ĉi tiujn postulojn. La 7-an de februaro 1986 Duvalier estis eksoficigita kaj senpotencigita. Li fuĝis al Francio. La 27-jara regado de la la koruptega Duvalier-familio kostis al la lando ĉirkaŭ 30 mil vivojn.

La sekva epizodo estis ne malpli interesa ol la antaŭa. Nova prezidento de Haitio fariĝis **Jean-Bertrand Aristide**, klera teologo kaj membro de la ordeno de la salesianoj de Don Bosco, kiu estis opoziciulo dum la diktaturo de Duvalier jam antaŭ 1986. Sed lia prezidenteco estis malfacila. La 11-an de septembro 1988 li eskapis mortigon fare de subtenantoj de la forpelita diktatoro Jean-Claude Duvalier, nome de la „Tonton Macoutes“, en sia preĝejo, kie pereis dek tri vizitantoj. Lia politika agitado kaj malferma kritiko pri la haitia politiko de Vatikano kondukis al lia eksigo el la salesiana ordeno en decembro 1988. En septembro 1991 armea puĉo gvidata de generalo Raoul Cédras devigis lin fuĝi tra Venezuelo al Usono. Post la usona interveno en 1994 li estis reenpostenigita kiel prezidento. En la sama jaro li rezignis pri sia pastreco. Aristide estis reelektita kiel prezidento en novembro 2000 kaj komencis sian duan oficperiodon en februaro 2001. Lia oficperiodo staris jam en la komenco sub la akuzoj pri elekta manipulado. Pro misadministrado kaj korupto formiĝis rezistado en la provincoj, kiu estis parte instigita de la fortoj kaj mortigaj bandoj de la iama diktatoro Duvalier. Samtempe aperis per-fortemaj homoj, kiuj malkaŝiĝis kiel apogantoj de Aristide, kvankam li neis ilian ekziston. Ekde novembro de 2002 okazis tumultoj similaj al interna milito, kiuj intensiĝis en 2003. Kvankam Aristide estis komence subtenata de parto de la pli malriĉaj popultavoloj, la venko de la ribeluloj en multaj regionoj kaj urboj kaj baldaŭ ankaŭ en la ĉefurbo de Haitio malstabiligis la politikan situacion kaj disfaligis la internan ordon. Internacia zorgo pri la situacio kondukis al interveno de Francio kaj Usono en februaro 2004 en Haitio, kiu estis internacie vaste aprobita. La 29-an de februaro 2004 Aristide forlasis Haition per usona aviadilo. Laŭ Usono li libervole abdikis kaj iris en la ekzilon, sed Aristide klarigis, ke li estis devigita de Usono forlasi sian landon. Tiurilate li parolis pri puĉo kaj daŭre konsideris sin legitima prezidento de Haitio. Post du semajnoj da restado en la Centra Afrika Respubliko, Aristide aperis la 16-an de marto 2004 en Jamajko. Sed la nova haitia registaro konsideris la ĉeeston de Aristide en la Karibio malstabiliga kaj provoka. Post kiam la Komunumo de Karibaj Ŝtatoj oficiale petis Sudafrikon en majo 2004 permesi al la senpotencigita ŝtatestro eniri la landon, la sudafrika registaro anoncis, ke post konsulto kun la registaroj de Francio kaj Usono Aristide estos provizore akceptita. Do, la 30-an de majo 2004 Aristide forlasis Kingston, la jamajkan ĉefurbon, kun sia edzino kaj du filinoj kaj iris en la ekzilon en Sudafriko. Post la granda tertremo en Haitio Aristide anoncis en 2010 en Sudafriko, ke li revenos al Haitio por „helpi rekonstrui la landon“. Li alvenis en Port-au-Prince la 17-an de marto 2011, du monatojn post la alveno de sia antaŭulo Jean-Claude Duvalier, kiu reiris al sia hejmlando pro la sama kialo. La 20-an de marto 2017 la aŭtomobiloj de Aristide estis pripafitaj, kiam li revenis kiel atestanto en proceso koncerne lavadon de mono, sed li ne estis vundita, kvankam la intenco mortigi lin estis evidenta. Cetere, oni estimas, ke Aristide mem havas privatan posedaĵon de 40 milionoj da usonaj dolaroj.[37]

Du tagojn post lia alveno en Haitio Duvalier estis arestita de la polico en iu luksa hotelo en la ĉefurbo kaj kondukita al la prokurorejo por pridemandado. Tamen li povis forlasi la prokurorejon kiel libera homo, sed nur devis resti disponebla al la juĝistaro. Laŭ unu el liaj advokatoj la arestado de Duvalier malkongruis kun la haitia konstitucio. La ŝtata prokuroro tamen iniciatis enketon kontraŭ Duvalier pro korupto, fraŭdo kaj ŝtelado je la kosto de la haitia ŝtata kaso. En 2013 Duvalier atestis pri sia reĝimo antaŭ iu esploranta juĝisto. Poste li estis akuzita pro krimoj kontraŭ la homaro (aŭ homeco). Kondamno tamen neniam estis prononcita. Li estis devigita al doma arestado, sed tamen la haitia registaro donis al li diplomatian pasporton kaj permesis al li ĉeesti diversajn oficialajn festojn kiel gasto.

[37] Lau https://de.wikipedia.org/wiki/Jean-Bertrand_Aristide.

La oficanta prezidento Michel Martelly anoncis, ke li ŝatus subteni interparolojn kun la antaŭaj prezidentoj Aristide kaj Duvalier pri helpo por rekonstruadi Haition. Sed Martelly signalis, ke li estis pli proksima al Duvalier ol Aristide, kiu fariĝis tragika heroo, dum Duvalier estis kvazaŭ rehabilitita, kvankam multaj familioj de viktimoj konsideris tion ofenda. Laŭ la klarigo de iuj konfiduloj de Duvalier li komprenis siajn erarojn en la maljunaĝo kaj tial petis pardonon de la popolo de Haitio. Jean-Claude Duvalier forpasis la 4-an de oktobro 2014 en sia hejmo pro korinfarkto.[38]

Kiel prezidento de Haitio oficas de februaro 2017 **Jovenel Moïse**, iama ĝenerala sekretario de la Haitia Ĉambro de la Komerco kaj Industrio (CHIC). Pri konekto kun la Duvalier-reĝimo nenio estas konata. Sed en januaro kaj marto 2019 ekaperis du enketaj raportoj de la haitia kortumo koncerne fraŭdon de la financoj, kiuj estis destinitaj por la konstruado de vojoj, pontoj kaj merkataj haloj, kiuj neniam estis konstruitaj. Unu el la ricevantoj de la mono estis la firmao de Moïse, Agritrans. Raporto aperinta en septembro 2019 akuzis Moïse-on, aliajn membrojn de la registaro kaj grupon de privataj entreprenistoj pri korupto. Dume la malkontenteco de la haitianoj pri la drasta malriĉeco, altiĝo de prezoj kaj malsukceso de la aŭtoritatoj kaj la polico ne finiĝis. En kunpuŝiĝoj dum iuj manifestacioj pereis pli ol 40 homoj; seriozaj akuzoj estis faritaj kontraŭ la polico, ĉar gi laŭdire estas enmiksita en multaj gravaj kazoj.[39]

Ferdinand Marcos regadis la **Filipinojn** en la okcidenta Pacifika Oceano de decembro 1965 ĝis februaro 1986 kiel prezidento, de 1972 kiel diktatoro post la proklamo de la milita stato pro atenco kontraŭ la ministro pri defendo. Ĉirkaŭ 30 mil homoj (inkluzive membrojn de la opozicio, studentojn, ĵurnalistojn kaj sindikatistojn) estas retenitaj en armeaj tendaroj, privataj armiloj estis konfiskitaj. La Kongreso estis fermita kaj la lando estis regata de prezidentaj dekretoj. Opoziciaj gazetoj kaj radiostacioj estis fermitaj. La ministro pri defendo, Juan Ponce Enrile, kiu aliĝis en 1986 al la opozicio de Corazon Aquino, poste agnoskis, ke la atenco kontraŭ li estis falsita. La 21-an de aŭgusto 1983, la eminenta Marcos-kritikisto Benigno Aquino, kiu vojaĝis al Usono en 1980 por medicina operacio, estis mortpafita dum sia reveno sur la flughaveno de Manila de ne-identigita(j) murdisto(j). Pro la kreskanta opozicio okazis prezidentaj elektoj en februaro 1986. La ĉefa rivala kandidato estis Corazon Aquino. La elektoj estis okazigitaj sub la observado de la usona kaj tutmonda amaskomunikilaro. Kvankam elektaj observantoj kaj amaskomunikiloj malkovris amasan elektan fraŭdon, la Nacia Asembleo, kiu estis lojala al Marcos, deklaris lin gajninto de la baloto. Iom poste la ministro pri defendo, Enrile, kaj la vicĉefo de la ĝenerala armeo, Fidel Ramos Marcos, alvokis Marcos eksiĝi. La 25-an de februaro 1986 Corazon Aquino estis oficiale enoficigita kiel prezidentino de la Fili-pinoj. La soleca cere-monio okazis en la prezidenta palaco, kie ankaŭ Marcos kaŝiĝis. Sed ankoraŭ en la sama vespero li kaj lia familio laŭ konsilo kaj helpo de la usonanoj fuĝis al Guamo tiun saman vesperon, poste ili vojaĝis al Havajo, kie Marcos forpasis en septembro 1989. Kelkajn jarojn poste lia vidvino revenis al la Filipinoj, kie ŝia edzo povis esti solene entombigita. La listo de krimoj kaj lezoj de la homaj rajtoj de Ferdinand Marcos estas longa kaj vasta, tiel ke ĝi ne povas esti detaligita ĉi tie. Al li estis riproĉitaj inter alie la penumo de sennombraj lezoj de la homaj rajtoj; Amnestio nombris 70 mil enprizo-nigitajn, 34 mil torturitajn kaj 3240 mortigitajn homojn. Sed la nombroj estas verŝajne pli altaj. Krom ĉi tiuj, ĝis 10 mil Moro-islamanoj estis mortigitaj en masakroj fare de la filipina armeo kaj aliaj kvazaŭ-armeaj grupoj.[40]

En 1975 Ferdinand Marcos establis la Nacian Komisionon pri la Rolo de Filipinaj Virinoj (NCRFW) kun gvidlinio 633 kiel reago al la „Virina Jardeko“ proklamita de UN. Imelda Marcos transprenis la prezidantecon kaj realigis ĉefe landajn programojn kadre de projektoj de UN. Provoj inkludi virinajn organizoĵn en la laboron plejparte malsukcesis, ĉar multaj el ili rifuzis esti asociitaj kun la registaro de Marcos. Imelda ankaŭ estis la patronino de la Komisiono pri Loĝantaro, kiu dsidonis la pilolon kontraŭ gravediĝo en la forte katolikaj Filipinoj por malhelpi plian kreskon de la loĝantaro.[41]

[38] Lau https://de.wikipedia.org/wiki/Jean-Claude_Duvalier.
[39] Lau https://en.wikipedia.org/wiki/Jovenel_Moïse.
[40] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Ferdinand_Marcos#Human_rights_abuses.
[41] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Imelda_Marcos.

La aktuala prezidento de la Filipinoj nomiĝas **Rodrigo Duterte**, iama urbestro de la miliona urbego Davao City sur la insulo Mindanao, de kie li originas. Ankaŭ li reprezentas tre specialan, fakte senprecendecan kazon. En la tago kiam li ekoficis la 30an de junio 2016 kiel nova prezidento de la Filipinoj. li proklamis la militon kontraŭ konsumantojn kaj komercistoj de drogoj kaj alvokis en publika parolado en mizerkvartalo en Manilo grandskale mortigi konsumantojn kaj komercistoj de drogoj kaj aliaj krimuloj. Sekve, pli ol 2000 drogaj komercistoj kaj konsumantoj estis mortigitaj en la Filipinoj en julio kaj aŭgusto. Laŭ indikoj de la filipina polico, estis nombritaj 402 mortoj ĉirkaŭ 5500 arestoj nur en julio. Ĉirkaŭ 600 mil homoj sin mem anoncis. La murdoj estis plenumitaj parte de la polico kaj armeanoj, kiuj ricevis la ordonon mortpafi la homojn sen averto. (eksterjuĝa ekzekuto). Inter la (nekonataj) pafistoj trovigis ankaŭ homoj, kiuj ne apartenis al la sekurecaj taĉmentoj. Laŭ aktivuloj de homrajtaj asocioj, -aktivistoj, la plimulto de la mortigitoj koncernis algrandajn drog-komercistojn, dum la „granda fiŝo“ estis protektitaj. Neniu volis respondeci por la mortigoj.

La internacia komunumo reagis senhelpe. La tiama ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, Ban Ki Moon, kondamnis tiun „militon kontraŭ drogoj“ nur du semajnojn post la inaŭguro de Duterte, kaj deklaris la eksterjurajn mortigojn kontraŭleĝaj kaj kiel lezadon de la fundamentaj homaj rajtoj. Sed Duterte emfazis, ke li ne haltigos la kampanjon ĝis kiam la lasta drogestro kaj la lasta komercisto kapitulacis kaj estas en la malliberejo. Rezulte, pli ol 200 NRO-oj publikigis komunan deklaron, alvokante UN-on kaj la Internacian Konsilio pri la kontrolo de narkotikoj (INCB) devigi la Filipinojn konformi al internaciaj juraj normoj. La usona prezidanto Barack Obama nuligis planitan renkontiĝon kun Duterte, kiu devis okazi rande de la G-20-pintkoferenco en Hangzhou, post kiam li estis insultita de Duterte, kiu diris en la lingvo Tagalog, ke lia patrino estas putino. Alia kulmino de la primitiva konduto de Duterte okazis, kiam en parolado dum la Monda Ekonomia Forumo en Davoso (Svislando) la 30an de septembro 2016 Duterte li diris, ke li satus likvidi la drogulojn en la Filipinoj same kiel Hitlero likvidis la judojn. Post protestoj, Duterte tamen esprimis bedaŭron pro la komparo kun la holokaŭsto. Duterte estis inter la unuaj eksterlandaj reprezentantoj, kiuj estis invititaj de la nova usona prezidento Donald Trump fine de aprilo 2017 post „tre amika telefon parolado“. Dum la COVID-19-pandemio Duterte alvokis en publika mesaĝo de aprilo 2020 alvokante la filipinan policon mortpafi pafi homojn, kiuj ne obeas la elirajn limigojn en la lando. Centoj da homoj estis enŝlositaj en troplenigitaj ĉeloj aŭ hundaj kaĝoj. Krome, Duterte deklaris la staton de la krizo dum tri monatoj, certignte al si specialaj rajtoj, kiuj ebligas arbitrajn arestojn.[42] Do, temas pri tre speciala tipo de „politikisto“, pri kiu oni ne scias, cu li estas fanatika kaj memproklamita adepto de la „leĝo-kaj-ordo“-politiko, aŭ ĉu li estas terura gangstro, kiu satas amase mortigi krimulojn sen jura proceso, kvankam lauprofesie li estas juristo kaj advokato kaj apartenis al la opozicio de Corazon Aquino.

* * *

Ankaŭ en Latnameriko laŭvice formiĝis kelkaj ekzemploj de krudaj kaj groteskaj diktaturoj kiel tiuj de Alfredo Stroessner (Paragvajo), Fidel Castro (Kubo), kaj Augusto Pinochet (Ĉilio).

Alfredo Stroessner regadis **Paragvajon** de 1954 ĝis 1989, do krom Fidel Castro li estis la plej longe reganta ŝtatestro de Latinameriko. Stroessner regadis sian landon kiel diktatoro helpe de la Colorado-partio. Ĉar li prezentis sin ekstrema antikomunisto kaj zorgis pri relative prospera ekonomio, li ĝuis la simpation kaj financan apogon de Usono. Lia oficperiodo estis karakterizata, inter alie, de ekstrema kulto de la personeca, grandstila limigo de la libereco de la gazetaro, persekutado, subpremado kaj forigo de ĉia politika opozicio, sistema turmentado, eksterjuraj ekze-kutoj, funkciigo de koncentrejoj, seksa ekspluato de membroj de indiĝenaj etnoj kaj multaj aliaj krimoj. Laŭ oficialaj informoj, ĉirkaŭ 400 homoj „malaperis“ en lia tempo, dum sendependaj taksoj baziĝas je pli ol 3000 mortoj. Ĉirkaŭ du milionoj da paragvajanoj forlasis la landon. Stroessner flegis bonajn kontaktojn kun aliaj sudamerikaj diktatoroj. En 1972 la germana etno-logo Mark Münzel kaj aliaj riproĉis al Stroessner, ke li responde-cas por la genocido kontraŭ la indiana tribo de Aché. Stroessner estis senpotencigita en armea puĉo en februaro 1989. La diktatoro fuĝis al Brazilo, kie li restis ĝis sia morto en 2006. 19 jarojn post la fino de la diktaturo, la „Komisiono por vero kaj justeco“ en Paragvajo prezentis sian finan raporton pri la krimoj de la reĝimo Stroessner. Ĝi deklaris, ke la etna minoritato de Aché estis viktimo de genocido. Surbaze de la evidenteco internacia grupo de advokatoj petis proceson

[42] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Rodrigo_Duterte.

pri genocido ĉe la argentina juĝistaro en 2013, ĉar paragvajaj aŭtoritatoj ne agis. Kadre de la universala jurisdikcio, laŭ kiu krimoj kontraŭ la homaro povas estis persekutataj ankaŭ ekster la loko, kie ili okazis, la argentina juĝisto akceptis la proceson.[43]

Post kiam la ribela movado de **Fidel Castro Ruz** sukcesis faligi kaj forpeli la diktatoron Fulgencio Batista fine de la jaro 1958, li mem instalis diktatoran reĝimon sub la gvido de la Komunisma Partio de **Kubo**. Kiel aŭtoritatisma ŝtatestro li formis la evoluon kaj karakteron de sia lando dum preskaŭ 50 jaroj. Poli-tike, la rolo de Castro estis internacie kontestata. Unuflanke li estis malamata kaj timata de iuj pro la instalado de unupartia sistemo kiel komunisma diktatoro kaj kiel respondeculo por diversaj lezoj de la homaj rajtoj, precipe la elŝaltado kaj enprizonigo de la opozicio kaj subpremado de la politikaj kaj civitanaj liberecoj, kaj aliflanke li estis estimata kaj admirata de aliaj kiel revoluciulo kaj liberiganto de Kubo. Kiel meritoj kaj socipolitikaj atingoj de la tempo de Castro estas konsiderataj la lukto kon-traŭ ĝenerala malriĉeco kaj senalfabeteco en la lando, laŭdata estis la kleriga kaj sansistemo de Kubo, t.e. la enkonduko de senpaga lerneja edukado kaj baza medicina kaj kuracista sistemo por ĉiuj, per kio la kuba modelo diferenciĝis de tiuj de aliaj latinamerikaj ŝtatoj pro sia relative alta nivelo. Tamen, la ekonomio de Kubo restis malforta, malgraŭ la eksporto de sukerkano kaj tabako kaj malgraŭ la kreskanta eksterladand turismo, kaj alfrontis seriozan krizon post la kolapso de Sovetunio, kiu estis ĝia ĉefa varlive-ranto kaj politika protektanto (kontraŭ Usono).[44]

La 11-an de septembro 1973 **Augusto Pinochet** esence partoprenis en la puĉo, kiu estis apogata de Usono, kontraŭ la demokratie elektita marksisma-socialisma prezidanto Salvador Allende. De tiu tago li regis **Ĉilion** diktatorece ĝis marto 1990, unue kiel ĉefo de armea estraro kaj poste kiel prezidento. Li neniam estis elektita demokratie. Dum lia regado okazis grandstila lezado de la homaj rajtoj kun pluraj miloj da mortigitaj personoj, pluraj dekmiloj da turmentitaj kaj alta nombro de malapergitaj civitanoj. Viktimoj estis precipe simpatiantoj de Allende, mal-dekstrismaj politikaj partioj kaj sindikatoj. Publi-kaj konstruaĵoj kiel sportstadioj, konferencejoj kaj lernejoj estis transformitaj al koncentrejoj, kie miloj da homoj estis malliberigitaj. Pinochet aplikis arestadon, turmentadon, mortigon kaj ekziladon de poli-tikaj kontraŭuloj kiel integrajn rimedojn de sia politiko, tiel ke Ĉilion regadas pura teroro. Kontraŭuloj de la reĝimoj estis persekutataj eĉ en eksterlando. Pinchet estis arestita de la brita polico en oktobro 1998 en Londono, sed en marto 2000 li estis liberigita pro malbona sano kaj senprokraste reveturis al Ĉilio. Pinochet estis neniam kondamnita pro krimoj plenumitaj dum sia regado, ĉar li forpasis (en 2006) antaŭ ol la komencita jura proceso kontraŭ li povis esti finita.[45]

Certe okazis ankaŭ grandskalaj lezoj de la homaj rajtoj sub la gvido de diversaj krimaj bandoj kaj poli-tikaj reĝimoj en meza (au norda) Latinamerika, ekzemple en Nikaragvo, Gvatemalo kaj Honduro, sed ankaŭ en Meksiko. Sed la priskribo de ĉiuj tiuj kazoj krevus la kadron de ĉi tiu konciza prezento, tiel ke la traktado de tiu historio eble okazos en alia okazo. Je la fino ni ankoraŭ rigardu al Afriko.

Mobutu Sese Seko, longtempa prezidento de la „Demokratia Respubliko de **Kongo**“ (nomata **Zairio**), kiun li regadis kiel diktatoro inter 1960/65 kaj 1997, akaparis la potencon per puĉo kontraŭ Patrice Lumbumba kaj Joseph Kasavubu. La koloniisma regado de Belgio finiĝis en tiu lando en 1960. De la Okcidento Mobutu estis glorata kiel „savanto de Kongo de la minacanta komunismo“. Dum lia dik-taturo kleptokratia bando krude ekspluatis la landon kaj plenumis sistemajn lezojn de la homaj rajtoj, sen rikolti kritikon de la Okcidento, al kiu Mobutu garantiis senkompromisan lojalecon. Kongo disponas grandan riĉecon de gravaj teraj krudmaterialoj, precipe kupron, de kiu la mondo ege profitis. De 1989 la rilatoj inter Mobutu kaj la antaŭaj protektaj potencoj, Usono kaj Francio, tamen draste malboniĝis. Pro internaj tumultoj kaj kres-kantaj ekonomiaj problemoj Mobutu unue agnoskis opoziciajn partiojn en 1990. Li promesis demokratiajn elektojn kaj starigis transiran registaron, sed li aranĝis ĝin tiel, ke li daŭre konservis la ĉefan potencon en la lando. Kiam en 1992-94 la reĝimo de Mobutu estis kolapsonta, la opozicio finfine preparis la transprenon de la potenco. Sed la interna milito en Ruando, kie oka-zis genocido, kiu kaŭzis ĝis 1 miliono da mortviktimoj, longigis la Mobutu-reĝimon je pliaj tri

[43] Lŭu https://de.wikipedia.org/wiki/Alfredo_Stroessner.
[44] Pri la historio de la situacio de la homaj rajtoj en Kubo vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Human_rights_in_Cuba, https://de.wikipedia.org/wiki/Fidel_Castro.
[45] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Augusto_Pinochet.

jaroj. La reĝimo estis subtenata de Usono (Clinton) kaj Francio, kiuj kontraŭis „eksperimentojn“ en Zairio. La sano de Mobutu plimalboniĝis, kaj dum unu el liaj hospitalaj restadoj en Svislando la ruanda tribo de la tutsi-oj, kiuj estis malamikoj de Mobutu (kaj ĉefaj viktimoj de la ruanda genocido), ĉar li subtenis la flankon de la tribo de la hutuoj, konkeris grandan parton de orienta Zairio. Kiam la registaro de Mobutu aprobis leĝon, kiu elpelis ĉiujn tutsiojn el la lando sub minaco de la mortpuno, ili lanĉis malferman ribelon kaj alianciĝis kun aliaj opoziciaj grupoj. Post malsukcesaj interparoloj pri paco en majo 1997, la ribeluloj konkeris la ĉefurbon Kinŝaso. Laurent-Désiré Kabila fariĝis la nova prezidanto de Zairio. Mobutu forveturis al Maroko, kie li forpasis en septembro 1997.[46]

Idi Amin Dada estis konsiderata kiel simbolo de la brutala regado en si mem, kun nombro de viktimoj inter 300 kaj 400 mil pereintoj dum nur ok jaroj. en oktobro 1962 Ugando liberigis kiel brita kolonio. Rego Mutesa II. fariĝis prezidento kaj Milton Obote unua ĉefministro de la sendependa lando. La 25-an de januaro 1971 Amin akaparis la potencon en **Ugando**, dum prezi-dento Milton Obote ĉeestis kon-ferencon en Singapuro. La tanzania registaro suspektis, ke la puĉo de Amin estis subtenita de Britio kaj Israelo kaj ke okcidentaj landoj klopodis uzi la helpon de Amin por starigi marionetan registaron en Ugando. Efektive CIA provizis Ugandon per bomboj kaj aliaj militaj ekipaĵoj pere de kaŝitaj fir-maoj kaj kaŝe partoprenis en militaj operacoj favore al la ugandaj regantoj en la 1970-aj jaroj. Kelkajn tagojn post la puĉo intelektuloj, altaj oficiroj kaj juĝistoj „malaperis“. Tutaj vilaĝoj, kiujn Obote subtenis, estis detruitaj kaj iliaj loĝantoj murditaj. Laŭ raportoj de atestantoj Amin ĵetis la korpojn de siaj viktimoj al la krokodiloj en la rive-ro Nilo por manĝi, ĉar amasaj tomboj ne povis esti elfositaj en la bezonata tempo. Komence Amin flegis bonajn rilatojn kun pluraj okcidentaj landoj. Sed post kiam Israelo rifuzis liveri armilojn al li, li rompis la rilatojn kun pluraj okcidentaj ŝtatoj kaj pligrandigis la ekonomiajn rilatojn de sia lando kun la arabaj kaj islamaj ŝtatoj same kiel kun la orienta bloko. En Tanzanio, kie Milton Obote troviĝis en la azilo, li subtenis la konstruadon de gerila armeo. Sekve ugandaj trupoj transiris la landlimon al Tanzanio en aŭgusto 1971 kaj provis devigi la registaron de Nye-rere rekoni la reĝimon de Amin. Inverse Tanzanio subtenis invadon de Obote kaj lia gerila armeo en Ugando por povi efektivigi puĉon kontraŭ Amin. Ĉi tiu milito finiĝis la 7-an de oktobro 1972, post kiam Somalio peris la pacon en tiu unua milito inter ambaŭ landoj. Amin konservis la potencon, ĉar la Okcidento daŭre komercadis kun li. Okcidenta Germanio subtenis bonajn rilatojn kun la Amin-reĝimo ĝis 1975, kiu ricevis 22,6 milionojn da markoj. Sed ankaŭ Sovet-unio provizis Ugandon per armiloj. En 1976 Amin lasis proklami sin dumviva prezidento de Ugando. En oktobro 1978 li donis la ordonon invadi Tanza-nion, lanĉante la tiel nomatan duan militon inter Ugando kaj Tanzanio, kaj provokis reagon de Tanzanio. En la kontraŭ-ofensivo de de aprilo 1979 la ĉefurbo Kampala estis konkerita de tanzaniaj trupoj kune kun trupoj de la Uganda Nacia Liberiga Armeo (UNLA). Ĉi tiu operaco praktike finis la oficperiodon de Amin kiel prezidento de Ugando. Unue li fuĝis al Libio kaj poste al Irako. Fine li ekziliĝis en Saŭdarabio, kie la registaro toleris lin, kondiĉe ke li ne okupiĝu pri politiko. Tie la eksa diktatoro, nomata la „buĉisto de Afriko“, mortis post longa periodo en komo en aŭgusto 2003 pro alta sangopremo kaj rena malsana.[47]

La eksa brita kolonio Rodezio ricevis la internacie agnoskitan ŝtatan sendependecon en aprilo 1980 kaj nomiĝis **Zimbabvo**. Ĝia prezidento fariĝis Canaan Banana, ĉefministro **Robert Mugabe**. Tra la jaroj Mugabe komencis gvidi la landon ĉiam pli aŭtokratece kaj diktatorece, ankaŭ kun la helpo de la sekreta servo Centra Inteligenta Organizo, kiu estis transprenita de la antaŭa registaro. Jarŝanĝe de 1987/88 konstituciaj amendoj estis enkondukitaj en Zimbabvo, kiuj, laŭ observantoj, celis longtempe la formadon de socialisme orientita unu-partia ŝtato. Zimbabvo konvertiĝis al prezidenta respubliko kaj la posteno de ĉefministro estis abolita; la oficanto fariĝis prezidanto kun la povoj de registarestro. En 2008 li estis elektita por sesa oficperiodo. De aŭgusto 2008 kolera epidemio disvastiĝis en Zimbab-vo, kio kaŭzis la proklamon de la krizostato en decembro. Ĝis marto 2009 estis nombritaj pli ol 90 mil kazoj de malsano kaj ĉirkaŭ 4030 mortviktimoj. La regado de Mugabe estis markita de malsatego kaj kelkfoje gravaj lezoj de la homaj rajtoj, kiuj kaŭzis la ekskludon de Zimbabvo de la ŝtatkomunumo Commonwealth. Orga-nizaĵoj kiel Amnestio Internacia raportis, ke li lezis la homajn rajtojn de la Ndebele-tribanoj, la opozicia MDC kaj blankaj terposedantoj. Al Mugabe estis neita la eniro al Eŭropa Unio krom la vizitoj al Unuiĝintaj Nacioj kaj Sankta Seĝo-eventoj. Fifama

[46] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Mobutu_Sese_Seko.
[47] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Idi_Amin.

estis la kampanjo de Mugabe kon-traŭ samseksemo, kiun li nomis „nenatura“ kaj „ne-afrika“. Samseksemaj viroj estis por Mugabe „malpli valoraj ol porkoj kaj hundoj“, ili povis esti punitaj per 10 jaroj en malliberejo. Mugabe pravigis tiun kampanjon inter alie. a. per la intenco batali kontraŭ aidoso. La antaŭa prezidento de Zimbabvo, Banana, estis kondamnita al samseksemo kaj fuĝis al Sudafriko, ĉar li timis atencon kontraŭ sia vivo. Mugabe ankaŭ plurfoje atakis la kreskantan seksan egalecon en Eŭropo. La pre-zidantaj kaj parlamentaj elektoj de julio 2013 denove estis akompanataj de seriozaj akuzoj pri fraŭdo kiel falsitaj balotaj listoj kaj malakceptitaj balotantoj. Denove Mugabe kaj lia rivalo Morgan Tsvan-girai konkuris kiel kandidatoj. Ban Ki-moon, ĝenerala sekretario de UN, laŭdis la plejparte pacan disvolviĝon de la elektoj. Mugabe deklaris sin la venkinto, ricevinte ĉirkaŭ 61% de la voĉoj, dum Tsvangirai perdis la baloton per ĉirkaŭ 34%. Mugabe estis ankaŭ elektita prezidento de la Afrika Unio por 2015. Kiel prezidanto de tiu organizaĵo Mugabe rajtis reveni al EU, ĉar lia enira malpermeso estis „provizore“ muligita. En 2017 Mugabe estis nomita „Ambasadoro de la Bona Volo“ fare de la Ĝene-rala Direktoro de la Monda Organizaĵo pri Sano (OMS), Tedros Adhanom Ghebreyesus. Ĉi tio estis akre kritikita de multaj instancoj, inkluzive de la brita registaro kaj la usona organizo Human Rights Watch (HRW). Pro la multaj protestoj en la mondo, la nomumo tamen devis esti nuligita kvar tagojn poste. Ĉirkaŭ Mugabe estis praktikata bizara kulto de la personeco. La ofendo de la prezidento estis malpermesata kaj povis esti severe punita. Post kiam Mugabe, pli ol 90-jaraĝa, montris neniun inten-con retiriĝi de sia posteno, kritiko pri lia administrado venis ankaŭ de la vicoj de la ZANU.partio. La 15-an de novembro 2017 la zimbabva militistaro ekregis la landon. Mugabe eksiĝis la 21-an de no-vembro 2017. Kelkajn tagojn poste la proksima partia amiko de Mugabe dum jardekoj, **Emmerson Mnangagwa**, estis instalita kiel nova prezidanto, proksima amiko de Mugabe. Mugabe forpasis en 2019 en Singapuro. Ĉar Mnangagwa, kiu estis politika aktivulo post la sendependiĝo de Zimbabvo kaj do fariĝis integra ero de la sistemo de Mugabe, estis suspektata pro plenumo de diversaj krimoj en la pasinteco (li estis ĉefo de la sekureca servo, ministro i.a. por justico kaj defendo), en 2002 pria esplorkomisiono de UN rekomendis sankciojn kontraŭ li.[48]

Dum 30 jaroj **Sudano** estis regata de la islamisma diktatoro **Umar Hasan Aĥmad al-Baŝir**, kiu akaparis la povon kun grupo de oficiroj en puĉo de junio 1989, kiu estis subtenata de Irano. Antaŭe Sudano estis regata de (kolonelo) Dĵafar Muhammad an-Numairi, kiu puĉis en 1969 por mem akapari la povon en Sudano. Lia politiko unue baziĝis sur la egipta modelo de Gamal Abdel Nasser, kio helpis efektivigi iujn reformojn laŭ socialisma modelo. La Sudana Socialisma Unio (SSU) estis instalita kiel sola partio en la ŝtato. En 1971 Numairi estis mallonge forpelita okaze de komunisma puĉo, sed poste reinstalita kaj elektita kiel prezidento. En 1972 li finis 17-jaran internan militon inter la sudana registaro kaj la ribeluloj de Sud-Sudano (SPLA) per la Interkonsento de la Adis-Abebo. En 1981 li instalis islamisman reĝimon kaj du jarojn poste enkondukis la Ŝarian juron en la tuta lando, inkluzive de tio, kio nun estas la aŭtonoma Sudsudano. Kontraŭ la Interkonsento de Addis-Abebo li dissolvis la sudsudanan registaron kaj per tio renovigis la internan militon. La armeo sub generalo Swar ad-Dahab utiligis la politikan tumulton en la lando en 1985 por lanĉi novan armean puĉon kaj okazigi elektojn. La Ŝario restis konservata. Numairi estis eksigita de la potenco en 1985 kaj ekziliĝis en Egiptio (li revenis en 1999 por kandidatiĝi por la prezidentaj elektoj en 2000, sed la rezulto malbone finiĝis por li). Sadiq al-Mahdi estis reelektita kiel ĉefministro en 1986. En junio 1989 okazis nova puĉo fare de Umar Hasan Aĥmad al-Baŝir, kiu reenovigis la politikon de Numairi.

Per la helpo de sia „Revolucia Komanda Konsilio por savi la nacion“ (RCC) kaj la Nacia Kongresa Partio al-Baŝir establis subpreman islaman fundamentisman reĝimon kaj militis kontraŭ la sudo de la lando, kie vivas kristanoj kaj diversaj religiaj etnoj. De 1993 al-Baŝir ankaŭ estis formala prezidento de la ŝtato kaj konfirmita kiel tia en la balotoj de 1996 kaj 2000. Usono metis Sudanon sur sian liston de „kanajlaj ŝtatoj“. Sub al-Baŝir Osama bin Laden povis resti en la lando sen problemoj ĝis 1996. Post la terorismaj atakoj de la 7-a de aŭgusto 1998 kontraŭ la usonaj ambasadoj en Nairobi (Kenjo) kaj Dar es Salaam (Tanzanio), Usono faris militajn intervenojn kontraŭ Ĥartumo, ĉar oni suspektis kaŝi-tajn teroristojn en Sudano. Ĉi tiu interveno kaŭzis la rompon de al-Baŝir kun la Okcidento. Post la terorismaj atencoj de la 11-a de septembro 2001 en Usono, al-Baŝir tamen partoprenis en la kontraŭ-terorismaj iniciatoj de Usono. Ekde 2003 al-Baŝir agis kontraŭ separatismaj movadoj en la sudana provinco Darfur, kie pluraj ribelaj grupoj agadis kontraŭ la aŭtoritatisma reĝimo en Ĥartu-

[48] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Robert_Mugabe, https://de.wikipedia.org/wiki/Simbabwe#Koloniale_Herrschaft.

mo. En 2004 la reĝimo de al-Baŝir tamen finis la militon kontraŭ la sudaj provincoj de la lando. Per koncerna pactraktato de januaro 2005 formiĝis komuna transira registaro de norda kaj suda Sudano.

La 14-an de julio 2008 la ĝenerala prokuroro de la Internacia Punkortumo (HKI) en Hago, Luis More-no Ocampo, anoncis, ke al-Baŝir estu arestita pro kialoj de la genocido, krimoj kontraŭ la homaro kaj militkrimoj en la konflikto en Darfuro. Ĉi tiu estis la unua kazo, en kiu la ĉefa prokuroro de la ICC petis areston por oficanta ŝtatestro. La Antaŭprocesa Ĉambro de la ICC publikigis la petitan apelacion en marto 2009. Sed la akuzo de la genocido ne estis enkludita, ĉar mankis sufiĉaj pruvoj, tamen la tribunalo rezervis al si la rajton poste inkluzivi tian akuzon. Nur unu jaron poste en julio 2010 la Antaŭprocesa Ĉambro de la ICC efektive eldonis plian arest-ordonon kontraŭ al-Baŝir pro la kialo de la genocido. Oni riproĉis al li, ke li havis la intencon ekstermi la etnojn Fur, Masalit kaj Zaghawa, ĉar li jam komencis mortigi kaj lezi ilin kaj metis ilin al vivminacaj kondiĉoj. La kritikistoj de la arest-ordono (precipe Ĉinio, Rusio, Araba Ligo, Afrika Unio) nomis la akuzojn de ICC malhelpo por pacaj intertraktoj en Darfuro. En julio 2009 Afrika Unio adoptis rezolucion por ignori la arestordonon por al-Baŝir. En februaro 2011 al-Baŝir anoncis, ke li ne plu kandidatiĝos por la venonta prezidenta elekto. En 2013 li libere vizitis Ĉinion, Iranon, Etiopion kaj Niĝerion kaj neniu arestis lin. En decembro 2014 la ĝenerala proku-roro Fatou Bensouda informis la Sekurecan Konsilion de UN, ke oni devas ĉesigi la esplorojn kontraŭ al-Baŝir pro manko de perspekivo je sukceso. Post kiam li retiris sian deklaron rezigni kiel kandidato por la venonta prezidenta baloto, li tamen prezentis sin al ĝi en aprilo 2015 kaj gajnis ĝin per dubindaj 94 procentoj de la voĉdonoj. Kiam al-Baŝir troviĝis do kiel reelektita prezidento de Sudano en Sudafriko en junio 2015 por partopreni pintkonferencon de la Afrika Unio, la sudafrika Norda Gauteng Alta Tribunalo en Pretorio decidis, ke la sudana ŝtatestro ne rajtas forlasi la landon, ĝis kiam la afero de la arestordono estas klarigita de la Internacia Punkor-tumo en Hago. Malobeante la decidon de ĉi tiu sudafrika tribunalo, al-Baŝir revojaĝis de Sudafri-ko al Sudano, kion la sudafrika registaro verŝajne ne malhelpis. Ĝenerala sekretario Ban Ki-moon reagis per la admono, ke landoj, kiuj agnoskis kiel membroj la Roman Statuton de la Inter-nacia Punkortumo, devas ankaŭ plenumi ĝiajn arestordonojn. Dum en Sudano al-Baŝir estis varme akceptita de siaj subtenantoj, la ICC kondamnis la agojn de la sudafrika registaro per unuanima decido de la juĝistoj. La skandalo kaŭzis konstitucian krizon en Sudafriko.

La 11-an de aprilo 2019 al-Baŝir estis forpuĉita de armeanoj post popolaj protestoj, kiuj komenciĝis en 2018. Al-Baŝir estis malliberigita en prizono de norda Ĥartumo. Dum posta traserĉado de lia domo oni trovis monon en alteco de ĉirkaŭ sep milionoj da eŭroj. La sudana prokuroraro esploris de tiam pri li pro suspekto pri lavado de mono kaj kontraŭleĝa posedo de frem-da mono. En junio 2019 al-Baŝir estis akuzita pro korupto, kulpigita en decembro de la sama jaro kaj kondamnita al dujara punrestado en malliberejo. Lia Nacia Kongresa Partio estis malpermesita en novembro 2019. La 11-an de februaro 2020 la provizora registaro de Sudano anoncis, ke al-Baŝir estos transdonita al la ICC.[49] Cetere, en la sudana „revolucio“ kontraŭ diktaturo kaj tero-ro esence partoprenis la sudanaj virinoj, kiuj longe estis subpremataj de la islamisma reĝimo, kiu similis al la irana modelo.

Bedaŭrinde, la listo de diktatoroj kaj aŭtokratoj, kiuj grandstile subpremas la civilan socion kaj lezas la homajn rajtojn en siaj landoj, ne estas finita. En **Venezuelo** grava ekonomia, politika kaj humaneca krizo ŝvelas de jaroj sub prezidento **Nicolás Maduro**, posteulo de Hugo Chávez, kiu rifuzas abdiki kaj kondukis sian landon al katastrofa situacio. La prezidento de **Turkio**, **Recep Tayyip Erdoğan**, evoluis kiel agresema aŭtokrato laŭ la maniero de Putin, kun kiu li alianciĝis kvazaŭ kun la diablo por venĝi sin je la Okcidento, kiu laŭdire ofendis lin (ofendado de la prezidento estas severe punita en Turkio). Sub lia islamema reĝimo estas persekutataj ĉiuj politikaj kontraŭuloj en sia lando, kiujn li akuzas, ke ili apogis terorismon aŭ puĉis kontraŭ li en 2016. Kelkdekmil politikaj malliberuloj troviĝas en turkaj prizonoj, ankaŭ pluraj jurnalistoj, kie ili parte estas turmentataj por devigi ilin al (falsaj) eldiroj kaj konfesoj; ne tute preciza nombro de homoj malaperis aŭ estis mortigitaj. La bilanco pri la situacio de la homaj rajtoj estas tre malfavora.[50]

[49] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Umar_al-Baschir.
[50] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Menschenrechte_in_der_Türkei, https://de.wikipedia.org/wiki/Liste_von_in_der_Türkei_inhaftierten_Medienmitarbeitern_(nach_2000), https://www.faz.net/aktuell/politik/ausland/tuerkei-laesst-haeftlinge-frei-alle-ausser-politische-gefangene-16725201.html.

Nature ankaŭ en multaj aliaj ŝtatoj, inkluzive de okcidentaj, estis kaj estas plenumita malrespektado kaj lezado de la homaj rajtoj en pli malpli grava grado kaj maniero. Tiujn lezojn observas kaj registras diversaj internaciaj homrajtaj asocioj kiel Amnestio Internacia kaj Human Rights Watch, kiuj ĉiujare publikigas kaj aktualigas siajn raportojn pri ĉi tiu temo.

Al tiu kategorio de la subpremado de la homaj rajtoj apartenas ankaŭ la seniluziigitaj strebadoj de iuj popoloj nacie sendependiĝi kiel la katalunoj, skotoj, nordirlandanoj kaj aliaj, kvankam ili devas enkalkuli fortan kontraŭstaradon flanke de la registaroj de la tutŝtato kiel de tiuj en Madrido kaj Londono, kiel montris la ĉi-koncernaj ekzemploj en la pasintaj jaroj. Sed tiuj problemoj koncernan la internan politiko de la koncernataj ŝtatoj. La kataluna ribelo estis disbatita kaj subpremita de la hispanaj centristoj kaj mememorigis la sufokadon de la ribeloj de la hungaroj en 1956 kaj de la ĉeĥoj kaj slovakoj en 1968 aŭ la subpremadon en de liberecamaj popoloj en Sovetunio kaj Ĉinio. Laŭ fakuloj de la internacia juro, Katalunio ne rajtas forlasi Hispanion, ĉar ĝi jam havas vastajn aŭtonomiajn rajtojn kaj ne suferas sub la sama subpremado kiel dum la tempo de Franco; krom tio, la konstitucio de Hispanio ne antaŭvidas secesion de Katalunio. Simila estas la kazo de Skotlando aŭ de Bavario, kaze ke tiu lando dezirus forlasi Germanion. Ankaŭ la ŝtata sendependiĝo de Kosovo estas internacie kontestata, ĉar la kosovanoj ne estas konsidefataj kiel popolo en la senco de la internacia juro.[51]

* * *

Ĉar UN devis toleri ĉiujn ideologiajn kaj politikajn fluojn ekzistantajn en la mondo, oni, t.e. Usono ne povis simple ordoni la abolon de la komunismo, ĉar la komunistoj certe estus postulintaj aboli la kapitalismon. La sensacia termino „Imperio de la malbono“ (anglalingve Evil Empire) estis uzita de la usona prezidento Ronald Reagan en parolado de la 8a de marto 1983 ĉe la Nacia Asocio de Evangeliistoj en Orlando, Florido, por esprimi, kiel li pensas pri Sovetunio.[52] La patosa retoriko de Reagan estis laŭdire serioze konsiderata de la sovetia ŝtatestro Jurij Andropov kaj de la politburoo de KPSU, kies membroj ne ekskludis la eblon de surpriza usona militatako, kiun tiuj maljunaj stalinistoj ĉiam timis. La sovetia novaĵagentejo TASS skribis, ke la esprimo „imperio de la malbono“ montras, ke la usona prezidento povas pensi „nur en la kategorioj de la konfrontiĝo kaj de la militema, freneza kontraŭkomunismo“. Sed Sovetunio kaj ĝia „socialisma“ sistemo, kiu montriĝis nereformebla, ĉar al la komunistoj mankis la volo por fari tion, degeneris kaj agoniis kaj pli kaj pli, en ĉiuj rilatoj.

Nature, el la vidpunto de la Okcidento kaj precipe de Usono Sovetunio restis grava ĝena faktoro, kiu estis obstaklo elimininda en la mondo. Ĝin necesis kontraŭbatali ideologie kaj ekonomie kaj venki per grandskala kaj senkonkurenca armado, kiel Reagan kaj liaj posteuloj celis, por alporti la finan geo-strategian kaj hegemonian venkon de Usono super la mondo. Malgraŭ siaj propraj nukleaj armiloj, Sovetunio estis ekonomie tro malforta por elteni tiun konkuradon, kiu inkluzivis la militan ekspansion al la kosmo de Usono (SDI-programo), kiu tamen estis internacie forte kontestata kaj kritikata, ĉar ĝi estis projekto riska kaj danĝera kaj ne kovrite de la internacia juro. La sovetia sistemo ne plu eltenis tiun premon, alvenis ĉe sia definitiva ekonomia, politika kaj morala fino. La kaduka sovetia komunis-mo, perforte kaj brutale enkondukita de ideologiaj fanatikuloj kiel Lenin kaj Stalin en 1917 kaj en la 1920-aj jaroj kiel provo renversi la okcidentan „kapitalisman, burĝan“ sistemon per samaj rimedoj, kiu kaŭzis tiom da malbono kaj mizero al multaj popoloj kaj homoj, alvenis al la rando de la kolapso, kiu iĝis neevitebla, ĉar la popoloj volis liberiĝi de tiu pervertigita politika, ekonomia kaj socia sistemo. La historia psikologia problemo de Ruslando, kiu kolapsis kiel naciisma rusa imperio de la caroj en 1917 kaj renaskiĝis kiel komunisma Sovetunio, estis ĝia deziro esti konsiderata kiel mondpotenco samrange kun Usono, kun kiu ĝi komparis sin en la tuta moderna historio ĝis hodiaŭ. Sed ĉar Ruslando neniam atingis la ekonomian kaj sciencan potencon de Usono, ĝi ne estis konsiderata de ĝi kaj de la Okcidento kiel samranga supera mondpotenco kiel Usono, kvankam ĝi disponas pri nukleaj armiloj, sed kiel sub-evoluinta regiona forto, kiu ĉiam celis kopii kaj enkonduki la okcidentan kulturon kaj kies ekonomio baziĝis sur la eksporto de gaso kaj nafto, greno, ligno, vodko kaj kaviaro. Sed multaj varoj produktitaj en Ruslando, ne estas vendeblaj en Okcidento. La ĉefa signifo de Ruslando konsistas en ĝia giganta kontinenta teritorio, kiun ĝi akiris dum la jarcentoj per ekspanio kaj milita koloniigo de la Kaŭkazo kaj de Siberio. Kvankam Ruslando posedas multajn valorajn tertrezorojn, ĝia

[51] Vd. https://www.dw.com/de/es-gibt-kein-recht-auf-abspaltung/a-40806807.
[52] Vd. https://www.youtube.com/watch?v=FcSm-KAEFFA.

popolo restis malriĉa kaj tial estas komparebla kun certaj evolulandoj de Afriko, Azio kaj Latinameriko. La ĉefa kaj esenca diferenco de la rusa civilizo estas la (politika kaj ekonomia) mallibereco de ĝia socio kompare kun la libera socio en Okcidento. Diktaturo, subpremado, persekutado, malliberigo kaj mortigo de politikaj kontraŭ-uloj, sed ankaŭ la provo neniigi aŭ rusigi indiĝenajn etnajn minoritatojn estas esence rusaj ´tradicioj´, kvankam ili ne estas nur tipe rusaj fenomenoj, ĉar tiuj problemoj ekzis-tis/as ankaŭ en aliaj landoj (ekzemple en Francio, Germanio, Italio, Usono k.a.). La mentaleco de la regantoj en la moskva Kremlo estis, sendepende de la politika reĝimo, tradicie karakterizata de skizo-frenio kaj paranojo samtempe, la ekstera mondo estis perceptata kiel malamika kaj eksterlandaj vizi-tantoj de Ruslandoj estis suspektataj kiel spionoj, kiuj estis traktitaj de la rusaj aŭtoritatoj kiel tiaj. Nuntempa Ruslando estas iusence Sovetunio sen komunismo. Sed la kutimoj kaj la pensmaniero restis principe la samaj. Mensogado kaj (sin)trompado estas la plej superaj principoj. La traŭmaton de la dua mondmilito Rus-lando neniam digestis, kaj tio estas ankaŭ komprenebla, same kiel la germana popolo neniam vere digestis ĝin, kvankam la germanoj ne misuzas tiun traŭmaton por politika propagando kiel en Ruslando. Alia elemento de la´psika komplekso´ de la rusoj estas, ke ili opinias, ke dum longa tempo ili estis subpremataj kaj kulpigataj de la tuta homaro pri ĉiu mizero. Tial ili estas konvinkitaj, ke ili devas emancipiĝi kaj rajtas senskrupule fari ĉion, kion aliaj ankaŭ faris kaj faras, inkluzive krimojn. Ili mal-sanas je la venĝa sindromo, kiu kvazaŭ rajtigas ilin perdi ĉiajn moralajn principojn, sur ĉiuj ebenoj. Al tiu sindromo kompreneble apartenas la praktiko rifuzi ĉian kulpon kaj ŝovi la kulpon al ĉiuj aliaj, de la ukrainoj ĝis la germanoj. Tiuj kompleksoj kaj sindromoj faras la rusojn aparte danĝeraj, ĉar ili kredas, ke ili povas agi laŭ propra bontrovo, kie ili influas kaj regas. La popoloj, kiuj estis kontrolataj de la sovetiaj komunistoj, bone konas tiun problemon, dum la homoj en Okcidento ne konas ĝin pro anko de sperto kun rusoj. Do, la rusoj sentas sin kiel eternaj malvenkintoj kaj magajntoj. Tion psikan staton oni ne povas longe elteni kaj tial iom post iom fariĝas pli kaj pli agresema. Kvankam Ruslando montras multajn paralelajn civilizajn trajtojn, kiuj estas konataj ankaŭ en Okcidento, estante ĝia spegulo, Rus-lando devas esti konsiderata iusence kiel la inverso de la Okcidento, kiel reakcia anticivilizo, kiu ĉiam provis kopii kaj imiti la Okcidenton, sed samtempe kontraŭbatali, plej ofte sen sukceso. Malgraŭ sia enorma fizika grandeco Ruslando malmulte kontribuis al la monda kulturo, kaj tiu kontribuo eble limi-ĝas al kelkaj verkoj de la 19-a jarcento, ĉar dum la 20-a jarcento la rusa kulturo estis preskaŭ plene detruita de la komunisma ideologio kaj nuntempe ĝi estas eĉ pli malsignifa. Ankaŭ en la scienco Ruslando, kiu ŝtelis kaj kopiis la tutan teknologion de la Okcidento, inkluzive la atombombon, ludas neniun gravan rolon, same en la internacia kulturo. La homaro ne imitas Ruslandon, kompare kun Usono. Probable la rusoj konscias pri tiu problemo, kiu klarigas parton de ilia malamika kaj agresema konduto rilate al la Okcidento. Malgraŭ ĉio tio Ruslando sentis sin ĉiam morale supera kompare kun la Okcidento. Ĉi tiujn bazajn problemojn de la rusa psikologio oni devas koni kaj kompreni, se en UN kaj ĝiaj gremioj kiel la Sekureca Konsilio la okcidentaj reprezentantoj kunpuŝiĝis kaj devis kunlabori kun rusoj, kies (neraciaj) sinteno kaj konduto por ili ofte restis nekompreneblaj. Eĉ pli enigmaj ol tiuj de la ĉinoj, ĉar en la kazo de la ĉinoj, kiuj estas purrasaj azianoj (kaj kiuj havas – aŭ iam havis – grandiozan artan kulturon), la okcidentanoj ĉiam sciis, ke ili estas alispecaj kaj iel kalkuleblaj. Se Ruslando do volas rikolti la respekton, kiun ĝi postulas de aliaj landoj, ne utilas por tio grandskala subpremado de la civila socio en la propra lando, murdoj al politikaj kontraŭuloj, agresoj kontraŭ najbaroj kaj subteno de reĝimoj kiel la Asad-reĝimo en Sirio.[53]

* * *

La akuta krizo de la „reala“ socialismo evidentiĝis plej malfrue en la unua duono de la 80aj jaroj kaj estis unuavice perceptata de la popoloj en tiuj landoj kiel ekonomia stagnado, kiu simbolis la distancon disde la sociekonomie pli dinamika Okcidento. La plumpa rutineca ideologia pacretoriko de la komunismaj registaroj, kiuj propagandis la superecon de la propra sistemo, kvankam draste mankis varoj por la ĉiutaga uzo, kaj kiuj senutile kovris la realajn problemojn en tiuj landoj, kies veraj dimensioj estis kaŝitaj kaj prisilentitaj al la popoloj, kiuj vivis en tiuj landoj, estis diskreditita kaj elĉerpiĝis, ĉar la popoloj en tiuj landoj deziris pli da bonfarto kaj prospero, pli da persona libereco kaj pli da demokratio.

[53] La konsideroj en ĉi tiu alineo pri Ruslando redonas la personan opinion de la aŭtoro.

En tiu malfacila situacio aperis la surpriza idearo de **Miĥail Gorbaĉov,** kiu fariĝis la nova sovetia ŝtatestro en marto 1985. Lia propono fundamente reorganizi la internaciajn rilatojn kaj forlasi la malnovan „blokan pensadon“, kaŭzis realan revivigon de la Sekureca Konsilio kiel pacorganiza organo. Malmulta subteno tamen ricevis ekzemple la sovetia propono de 1987 pri kreado de „Amplek-sa Sistemo de internacia paco kaj sekureco, kiel pruvis la sindetenoj de la triamondaj landoj. Okci-dentaj amaskomunikiloj raportis en 1987, ke orienteŭropaj kaj aziaj komunismaj landoj, kiuj estis aliancanoj de Sovetunio, ricevis pli da evoluhelpo de Unuiĝintaj Nacioj kompare kun tio, kion Sovet-unio kontribuis. Ĉi tio kontraŭdiris la retorikan subtenon de komunismaj ŝtatoj por la starigo de „Nova Internacia Ekonomia Ordo“, kiu devis transdoni la riĉaĵojn de la riĉa norda hemisfero al la malriĉaj landoj de la suda hemisfero. Sovetunio anoncis en septembro 1987, ke ĝi repagos parton de sia ŝuldo al Unuiĝintaj Nacioj.[54] En 1990 Sovetuno ne plu estis pagipoa kaj bezonis krediton de 5 miliardoj da dolaroj.

La 7-an de decembro 1988 Gorbaĉov prezentis sian paroladon en la 43-a Ĝenerala Asembleo de UN en Novjorko, en kiu li promesis paŝojn de unuflanka malarmado. Kvankam multaj sovetiaj proponoj ne estis efektivigitaj, ili signifis almenaŭ esencan vigligon de la sovetia ekstera politiko, kiu ĉesigis la bojkotan, protestan kaj kontraŭstaran politikon de la pasinteco. Kvankam multaj politikistoj en Okcdento ankoraŭ malfidis la promesojn de Gorbaĉov, ĉar neniu el ili aŭdacis fidi al iu ŝtatestro de la „imperio de la malbono“, lia nekutime malferma sinteno kondukis al rimarkebla redukto de la streĉiĝo en la mondo. Inter alie, Gorbaĉov proklamis la finon de la fifama „Breĵnev-doktrino“, kiu limigis la suverenecon de la socialismaj ŝtatoj, al kiuj li certigis, ke Sovetunio ne plu enmiksiĝos en iliajn internajn aferojn. Tio samtempe signifis, ke Moskvo ankaŭ ne plu pretis „helpi“ al ili, se la socialismo estas en danĝero kiel ekzemple en Hungario en 1956, Ĉeĥoslovakio en 1968 aŭ nun en GDR en 1989, kie la maljunaj membroj de la SED-politburoo de Honecker obstine kontraŭstaris la „novan pensadon“ de la sovetianoj, ĉar probable ili sentis, ke la nova kurso de Gorbaĉov entombigos ilian tradician regadon. La ideoj de Gorbaĉov pri la restrukturado kaj la nova pensado estis aliflanke tre popularaj ĉe granda parto de la GDR-anoj, ĉe kiuj oni povis observi specon de entuziasma „Gorbi-manio“. Sed Honecker konsideris lin politika aventuristo kaj hazardulo, kiu riskas detrui la verkon de generacioj, kiel li diris en interna cirklo. La saman rifuzan reagon lia nova politiko rikoltis en Ĉeĥoslo-vakio, Ru-manio kaj Bulgario, kiuj estis regataj de malnovaj poststalinismaj „betonkomunistoj“, kiuj dezi-ris neniujn reformojn. La periodo de la „glasnosto“ kaj „perestrojko“, kiel nomiĝis la sloganoj de la politiko de Gorbaĉov, kiu postulis ankaŭ pli de demokratio en la interna politiko, fakte rapide kon-dukis al la erozio kaj kolapso de la komunismaj reĝimoj en 1989-91, je la grandaj miro kaj ĝojo de granda parto de la homaro, precipe kiam oni povis observi, ke unu post alia komunisma reĝimo falis en Hungario, GDR, Ĉeĥoslovakio, Bulgario, ktp. praktike sen sango-verŝado. Nur en Rumanio dikta-toro Nicolae Ceauşescu kaj lia edzino estis senprokraste arestitaj kaj mortpa-fitaj de soldatoj post esprimo de la mortpuno fare de urĝa spontana milita tribunalo. En oktobro 1990 GDR estis reunuigita kun FRG (t.e. oficiale aligita al ĝi) kaj malaperis kiel propra ŝtato sur la mondmapo. Ĉeĥoslovakio dividiĝis laŭ ĉeĥa kaj slovaka unuoj, kiuj proklamis sin novaj suverenaj ŝtatoj en Eŭropo kaj aliĝis kiel novaj membroj de UN, poste ankaŭ de Eŭropa Unio kaj NATO. Pro sia esenca kontribuo al la fino de la Malvarma Milito, la germana reunuiĝo kaj la paca transformo en orienta Eŭropo, Gorbaĉov ricevis en 1990 la Nobelan pacpremion. En 1991 ankaŭ Sovetunio mem kolapsis kiel ŝtato kaj Gorbaĉov per-dis sian funkcion kiel ĝia prezidento.[55] Estas kurioze, ke ĝuste en la propra patrujo multaj homoj mal-ŝatas lin ĝis hodiaŭ, ĉar laŭ ili li kulpas pri la detruo de la sovetia imperio kaj pri la kaoso, anarkio kaj ekonomia krizo en la propra lando de la tiama tempo.

Kvankam Reagan estis iama teatra aktoro, li certe estis ĉio alia ol granda idioto, pri kiu oni ofte ŝatis moki, kaj liaj elpaŝoj havis certan efikon. Tiel, kiam la 12an de junio 1987 li aperis en Ber-lino, li diris en ege plaĉa parolado antaŭ la Brandenburga Pordego al la adreso de la sovetia ŝtatestro:

[54] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Soviet_Union_and_the_United_Nations.
[55] Fakte Sovetuio ne kolapsis, sed ĝi estis malfondita laŭ decido de la prezidentoj de Rusio, Belorusio kaj Ukraino, kiuj renkontiĝis okaze de ĉasado de sovaĝaj porkoj en la blankrusa praarbaro la 7an de decembro 1991. Unu sovetia respubliko post la aliaj poste proklamis sian sendependecon (vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Zerfall_der_Sowjetunion#Chronologie_der_Unabhängigkeitserklärungen_auf_dem_Gebiet_der_UdSSR.

„Sinjoro Gorbaĉov, se vi deziras pacon, malfermu ĉi tiun pordegon, faligu ĉi tiun muron!“[56] Necesis atendi ankoraŭ du jarojn. Sed ne estis Gorbaĉov, kiu faligis la Berlinan muron, sed la germana popolo, kiu estis dividita dum 28 jaroj de tiu malbelega muro. Du menciindaj homoj, kiuj ne estis antaŭviditaj por tiu scenaro, anoncis la malfermon de la limo kaj malfermis ĝin: Günter Ŝabovski kaj Harald Jäger.[57] Ambaŭ estis lojalaj civitanoj de sia ŝtato, kiu hermetike enmurigis la propran popolon, kaj nur poste ili komprenis la nein-tencitan grandecon de siaj historiaj faroj.

Sekve de la kolapso de Sovetunio 11 sovetiaj respublikoj – ĉiuj krom la baltaj ŝtatoj kaj Kartvelio – subskribis la „Protokolon de Alma-Ata“ de la 21a de decembro 1991, kiu deklaris, ke Sovetunio ĉesis ekzisti kaj establis la „Komunumon de Sendependaj Ŝtatoj“. La Rusa Federacio heredis la membrecon de Sovetunio en Unuiĝintaj Nacioj, inkluzive de la sovetia konstanta seĝo en la Sekureca Konsilio. Kaj ĉiuj postsovetiaj respublikoj fariĝis novaj memstaraj membro-ŝtatoj de UN.

* * *

Historiaj turnopunktoj estis la UN-rezolucio 598 de julio 1987, en kiu oni adoptis devigan pacplanon por fini la Unuan Golfmiliton, la retiriĝo de la sovetiaj trupoj el Afganio, kiuj invadis ĝin en 1979, ekde 1988, kaj la interkonsento pri armistico inter Irano kaj Irako. Kontroli tiun armi-sticon devis UNIIMOG. En la sekvo ankaŭ multaj aliaj malfermaj regionaj konfliktoj, kiuj ĝis tiam ŝajnis nesolveblaj, ricevis la perspektivon de daŭra solvo. En 1988 kaj 1989 sian laboron komenciĝis la misioj UNGOMAP en la afgana-pakistana landlima zono, ONUCA en Centra Ameriko, UNAVEM I en Angolo kaj UNTAG en Namibio. La ĵus gajnitaj esperoj pri farebla mondpaco estis montritaj en 1988 per la aljuĝo de la Nobela pacpremio al la blukaskaj soldatoj de UN.

Sed la eksplodo de la **Dua Golfa Milito**, kiu komenciĝis la 2an de aŭgusto 1990 per la **iraka atako kontraŭ Kuvajto**, dume ĉesigis tiujn esperojn. La tiama sinteno de la internacia komunumo tamen montris, ke ĝi ne pretas akcepti tian agreson kaj ke ĝi kapablas draste reagi en tia kazo. Nur kelkajn horojn post la komenco de la invado, la Sekureca Konsilio unuanime aprobis rezolucion (660), kiu kondamnis la invadon kaj alvokis la retiron de la irakaj trupoj. La 6-an de aŭgusto la Sekureca Konsilio trudis ekonomiajn sankciojn al Irako. Dek tri membroj voĉdonis por la rezolucio de UN, Kubo kaj Jemeno sindetenis. La ekonomia kaj financa embargo radikale bremsis la eksporton de la iraka nafto. La 9-an de aŭgusto 1990 la Sekureca Konsilio de UN unuanime aprobis novan rezolucion, kiu deklaris la irakan anekson de Kuvajto „malvalida“ kaj postulis la restarigon de la suvereneco, sendependeco kaj teritoria integreco de Kuvajto. La 10-an de aŭgusto 1990 speciala kunveno de la Araba Ligo (escepte de Tunizio) okazis en Kairo. La ŝtatoj de la araba mondo kondamnis la irakan invadon de Kuvajto per dek du voĉoj kontraŭ tri (Irako, Libio kaj PLO), kun kvin sindetenoj (Alĝerio, Jemeno, Jordanio, Maŭretanio kaj Sudano). La Araba Ligo decidis starigi pactrupon por protekti Saŭdarabion kaj la aliajn golfajn lan-dojn. Plej multajn soldatojn disponigis Egiptio, Maroko kaj Sirio. Usono formis unuiĝintan armean aliancon kontraŭ Irako, en kiu partoprenis finfine 34 landoj, krom Britio, Ĉinio kaj Rus-lando. Usono delegis 660 mil soldatojn, kio estis 74% de la tuta armeo. Pro la obstina kontraŭstarado de Saddam Hussein la milito ankoraŭ daŭris pli longe. La 28-an de aŭgusto 1990 la iraka registaro oficiale deklaris Kuvajton la 19a provinco de Irako. La 5-an de septembro la iraka diktatoro proklamis la „sanktan militon“ kontraŭ la usona ĉeesto en la Persa Golfo kaj alvokis puĉi kontraŭ la reĝo de Saŭdarabio, Fahd bin Abdul Aziz Al Saud. La 14-an de septembro irakaj soldatoj enpenetris la okcidentajn ambasadojn en Kuvajturbo. En rezolucio la Sekureca Konsilio de UN kondamnis la atakojn kontraŭ la diplomatiaj misiejoj kaj denove postulis la liberigon de ĉiuj eksterlandaj ŝtatanoj. En la sama tago Francio anoncis, ke ĝi translokados ĉirkaŭ 5000 soldatojn al Saŭdarabio en tankoj, helikopteroj kaj ĉirkaŭ 30 batalantaj militŝipoj. En nova rezolucio de la Sekureca Konsilio de UN de la 29-a de novembro ĉi-lasta rajtigis la membro-ŝtatojn de UN apliki „ĉiujn necesajn rimedojn por subteni kaj efektivigi la rezolucion 660“, se Irako ne retiros siajn trupojn antaŭ la 15-a de januaro 1991. La 24-an de decembro Hussein minacis, ke Israelo estos la unua celo de atako, se la koaliciaj trupoj atakos lian landon. La 12-an de januaro 1991 la usona Kongreso decidis forpeli la irakajn trupojn el Kuvajto per militforto. Per 250 kontraŭ 183 voĉoj en la Ĉambro de la Reprezentantoj kaj per 52 kontraŭ 47 voĉoj en la Senato la reprezentantoj de la popolo rajtigis la prezidenton de Usono (George Bush patro) fari

[56] Vd. https://www.youtube.com/watch?v=Ts3KzfIYVmQ, https://www.youtube.com/watch?v=5MDFX-dNtsM.
[57] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Günter_Schabowski, https://de.wikipedia.org/wiki/Harald_Jäger.

ampleksan militan operacon por apliki la Rezolucion 678 de UN. La 27-an de februaro 1991 Kuvajto estis liberigita.[58]

Eble ĉi tie estas la okazo mallonge trakti ankaŭ la problemon de Palestino, kiu havas longan kaj komplikan historion. Palestino estis proklamita kiel ŝtato la 15-an de novembro 1988 en Alĝero fare de la Palestina Liberiga Organizo (PLO), kies longjara ĉefo estis Jasser Arafat (1929-2004), kiu estis konsiderata jen kiel teroristo, jen kiel naciliberiga batalanto aŭ kiel gerilo. La fondintoj de la Palestina ŝtato postulis la Okcidentan Jordanlandon, okupatan de Israelo ekde 1967, kaj la Gazan Sektoron, kun Orienta Jerusalemo kiel ĉefurbo de la nacia teritorio. Ĉar la proklamo okazis en tempo, kiam la PLO estis en ekzilo en Tunizio kaj praktikis neniun kontrolon pri la postulataj areoj, la paŝo havis komence nur simbolan signifon. Tamen antaŭ 1990 preskaŭ 100 ŝtatoj rekonis la Palestinan ŝtaton. Hodiaŭ ĝi estas agnoskita de 138 ŝtatoj. Fakte, PLO havis ekde 1974 la internacie agnoskitan „observan statuson“ ĉe Unuiĝintaj Nacioj kiel „reprezentanto de la palestina popolo“. Ekde 1998 ĝi povis partopreni en debatoj de la Ĝenerala Asembleo, kvankam sen voĉdonrajto. Palestino estas membro de Unesko ekde la 31-a de oktobro 2011. La 29-an de novembro 2012 la statuso de la PLO-delegacio kiel Pales-tina Ŝtato ricevis la pli altan statuson de „nemembra observanta ŝtato“, laŭ la UN-rezolucio 67/19. La ĉi-koncerna peto de la palestina prezidento Mahmud Abbas ricevis en la ĉi-koncerna voĉdonado 138 favorajn kaj 9 kontraŭajn voĉojn, 41 ŝtatoj sindetenis (ekzemple Germanio) kaj 5 ne ĉeestis. Israelo reagis per la daŭrigo de la loĝiga poltiko en la kontestataj sektoroj. La agnosko de la palestina ŝtateco tamen restis kontestata. La altigo de la statuso tamen ne signifis anstataŭaĵon de la rektaj intertraktoj inter la konliktantaj partioj. Sed tia statuso tamen ebligis al la Palestina Ŝtato peti procesojn ĉe la Internacia Kortumo (ICJ) kaj la Internacia Punkortumo (CPI). Krome, Palestino povis aliĝi al la Roma Statuto (2009), al la Ĝeneva Konvencio (2014), al la Haga Landmilita Regularo kaj al 13 aliaj konvencioj de UN. Israelo reagis al ĉi tiu diplomatia ofensivo per ekonomiaj sankcioj.[59]

Kiel malfacile disvolviĝis la reala establado de la Palestina ŝtato montris la pacprocezo de Oslo, kiu komenciĝis en 1993 en formo de serio de interkonsentoj inter palestinanoj kaj Israelo por solvi la konflikton en la Proksima Oriento. La pacprocezo ricevis ĉi tiun nomon, ĉar la unuaj sekretaj intertraktadoj inter la konfliktantaj partioj PLO kaj Israelo okazis en Oslo kun norvega perado. La disvolviĝon de la tuta procezo eblas nur koncize resumi ĉi tie. La 13-an de septembro 1993 la ministroj pri eksterlandaj aferoj Maĥmud Abbas (Palestino), Ŝimon Peres (Israelo), Warren Christopher (Usono) kaj Andrej Kosyrev (Ruslando) subskribis la „Deklaraĵon de la principoj pri provizora memregado" (Oslo I) en la ĉeesto de Jicĥak Rabin, Jasir Arafat kaj Bill Clinton. Ĉi tio signifis mejlo-ŝtonon en la pacprocezo, ĉar ambaŭ flankoj oficiale rekonis unu la alian por la unua fojo, t.e. la israe-lanoj akceptis PLO-n kiel oficialan reprezentanton de la palestinanoj, kaj PLO devigis sin forigi el sia ĉarto aŭ statuto ĉiujn menciojn, kiuj enhavis la celon neniigi Israelon. La „Protokoloj pri ekonomiaj rilatoj“ inter Israelo kaj la Palestina Aŭtori-tato estis subskribitaj en Parizo la 29-an de aprilo 1994. Per la „Interkonsento pri Gaza kaj Jeri-ĥo“, subskribita en Kairo la 4-an de majo 1994, la palestinanoj ricevis por la unua fojo aŭtono-mian teritorion. En Taba (Egiptio), Rabin kaj Arafat subskribis en la 24-a de septembro 1995 la „Provizoran Interkonsenton pri la Okcidenta Jordanlando kaj la Gaza Sektoro“ (Oslo II). Per tio la palestinanoj ricevis aŭtonomiajn registarajn kompetencojn por ĉirkaŭ tri procentoj de la teri-torio de la Okcidenta Jordanlando (kun pli ol 80% de la palestina loĝantaro de ĉi tiu lando). Ĉirkaŭ kvarono de la teritorio devis esti dividita inter la Palestina Aŭtoritato kaj Israelo (Zono B). En la ceteraj 73% la israelanoj devis konservi la solan kontrolon.

Pro la progresigo de la pacprozeco en la Proksima Oriento en 1994 Rabin ricevis la Nobelan pacpremion kune kun sia tiama ministro pri eksterlandaj aferoj, Ŝimon Peres, kaj la tiama estro de PLO, Jasir Arafat. La 4-an de novembro 1995 ĉefministro Rabin estis mortpafita en Tel-Avivo de la dekstrula juda studento Jigal Amir. La posteulo de Rabin estis Ŝimon Peres. Li daŭrigis la pacpolitikon de Rabin kaj komencis intertraktadojn pri la konstanta statuso en Taba komence de 1996.

Post serio de sangaj atakoj kontraŭ israelanoj, Benjamin Netanjahu de la dekstra konservativa Likud-partio fariĝis nova ĉefministro de Israelo kun eta plimulto en la novaj elektoj de la 29-a de majo 1996 kaj tuj reintensigis la israelan politikon de la juda loĝigo en la kontestataj regionoj. Pro tio li estis

[58] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Zweiter_Golfkrieg.
[59] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Staat_Palästina.

kritikata, ke li preskaŭ haltigis la pacprocezon. Dum la oficperiodo de Netanjahu, estis la t.n. Wye-Interkonsento, la 23an de oktobro 1998. Ĝi antaŭvidis la transdonon de plia teritorio al la palestinanoj kaj la liberigon de palestinaj malliberuloj, sed ĝi estis nur parte efektivigita. En decembro 1998 Netanjahu estis maloficigita de la israela parla-mento kiel ĉefmi-nistro, ĉar la maldekstro en lia registaro kritikis, ke li ne plenumis la Wye-Interkonsenton sufiĉe rapide kaj amplekse, dum la dekstra flanko malakcep-tis la interkonsenton entute. Ehud Barak de la israela Laborista Partio estis elektita por fariĝi nova ĉefministro de Israelo, la 17-an de majo 1999. La 4-an de septembro 1999 nova interkonsento estis subskribita en Ŝarm el-Ŝeik, Egiptio, en kiu pliaj teritorioj estis transdonitaj al la Palestina Aŭtoritato kaj portempa haltigo de la juda logigo estis interkonsentita (Wye II).

En julio 2000, perata de Usono, okazis kunveno de Barak kaj Arafat, nomata Camp David II, kun plej lasta provo trovi interkonsenton pri konstanta statuso. Tamen, la 25-an de julio la intertraktoj estis interrompitaj sen interkonsento. Ambaŭ flankoj poste donis la kulpon pri la fiasko unu al la alia. La eksplodo de la dua Intifado en la 29-a de septembro 2000 malproksimigis la finan solvon de la konflikto. Nova provo revivigi la pacprocezon estis farita nur en junio 2002.[60]

* * *

La 1990-aj jaroj estis karakterizataj de la kolapso de la komunismo en la landoj de la Orienta Bloko kaj de la pliiĝo de etnaj konfliktoj, el kiuj kelkaj rezultigis sistemecajn malob-servojn de la homaj rajtoj. Ĝis nun la pacpolitiko de UN estis limigita al la solvado de interŝtataj konfliktoj, laŭ ĝia Ĉarto. Konsiderante la dimension de la diversaj konfliktoj kaj la publikan premon pr premi ilin, UN nun estis devigita relativigi sian principon de la „neenmiksiĝo en la internajn aferojn de la ŝtatoj“. La granda rifuĝado de la kurdoj en norda Irako, la interna milito en Somalio, kiu estis akompanata de granda malsato, la „etna purigado“ en la iama Jugoslavio kaj la genocido en Ruando estas nur kelkaj ekzemploj, kiuj faris „humanecan intervenon“ neevitebla. Tamen multaj internaj problemoj de UN kondukis al seniluziiga konkludo: neade-kvata antaŭa kono de la etnaj proprecoj, logistikaj kaj denove financaj postuloj kaj internaciaj diferencoj rilate la efikecon kaj legitimecon de tiaj pacoperacoj kaŭzis multajn paneojn kaj perdojn ĉe la dungitaro. Entute la nove akirita publika konfido je UN kiel organizo ŝanceliĝis.

Dum la 1990-aj jaroj estis aranĝitaj 35 novaj – plejparte mallongperspektivaj – misioj, inkluzive de 16 en Afriko, 6 en Mezameriko, 4 en Azio kaj 9 en Eŭropo. La antaŭe strečita budĝeta situacio kun elstaraj ŝuldoj de proksimume 750 milionoj da dolaroj, altiĝis al 2,2 miliardoj da dolaroj fine de 1996, el kiuj 1,6 miliardoj estis ŝulditaj nur al pacaj misioj. Ĉi tio ankaŭ klarigis la limigitan kapablon de la plejparte libervole financitaj organizaĵoj agi en la ekonomiaj kaj sociaj sektoroj.

La longaj 1990-aj jaroj estis ankaŭ karakterizataj de seniluziiĝo. Dum okazis la Monda Konferenco pri Homaj Rajtoj en 1993 militkrimoj estis faritaj malpli ol mil kilometroj for en Balkanio, kies trista kul-mino estis la genocido de Srebrenica en 1995. En 1994, kvinono de la populacio en Ruando fariĝis viktimo de alia genocido en Afriko. En ambaŭ kazoj, la Unuiĝintaj Nacioj estis senpovaj kaj eĉ retiris siajn blukaskajn fortojn el la krizoregiono.

En repritaksado de la aferoj de UN, kiu okazis en 1995, oni identigis misjuĝojn kaj nerealajn postulojn kaj atendojn, kiuj estis faritaj dum la gvidado de la egipto *Boutros Boutros-Ghali*, sesa ĝenerala sekre-tario de UN, kiu estis elektita en 1992, same kiel mankantan pretecon de la kunlaboro precipe inter la plej influaj membro-ŝtatoj. Kelkaj ideoj pri nova speco de „preventa diplomatio“ kaj „rapida reaga sistemo“ tamen estis daŭrigataj. Per la ĉi-lasta la membro-ŝtatoj estis alvokataj teni siajn armean kaj civilan personaron laŭeble „je konstanta dispono“ por plenumi la taskon interveni en iun ajn konflikton en kazo de neceso. Por administradi ĉi-tiun sis-temon estis instalita la internacia registro UNSAS.

Sur la kampo de la evoluiga politiko oni konstatis, krom la konstanta financa krizo, iom sovaĝan kaj malfacile superrigardeblan kreskadon de organizaĵoj kaj programoj, kiuj estis karakterizataj de duobla laboro kaj neklaraj respondecoj kaj kompetencoj. Ankaŭ la „kvara jardeko de la

[60] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Oslo-Friedensprozess.

evoluigo“ devis esti kvalifikita kiel malsukceso, ĉar la diferenco inter riĉuloj kaj malriĉuloj de ĉi tiu mondo ne mal-, sed pligrandiĝis.

Kiam komence de la 1990-aj jaroj en la respublikoj de **Jugoslavio** eksplodis sangaj bataloj, kiuj havis plurajn diversajn kaŭzojn kaj daŭris dum la tuta jardeko, nova refalo en malnovajn tempojn ŝajnis esti atingita. Ĉi tiuj militoj inter serboj, slovenoj, kroatoj kaj bosnianoj, poste ankaŭ albanoj de Kosovo, en kiujn praktike ĉiu respubliko de Jugoslavio estis enmiksita, kondukis al la disfalo de tiu komuna ŝtato kaj la pli malpli frua proklamo de la sendependeco de la unuopaj respublikoj **Slovenio, Kroatio, Ser-bio, Bosnio-Hercegovino, Montenegro kaj Makedonio**, kiuj fariĝis ankaŭ novaj membroj de UN. Kruela estis la milito precipe en Bosnio kaj Hercegovino, kie katolikaj kroatoj, islamaj bosnianoj kaj ortodoksaj serboj amase buĉis unu la aliajn kaj detruis iliajn valorajn kulturajn heredaĵojn. La simbolo de tiu orgio estis la detruado de la malnova turka ponto de Mostar, kiu en tiu tempo ankoraŭ ne troviĝis sur la Unesko-listo de mondaj kulturaj heredaĵoj. La tragika kulmino de tiu milito estis la masakro de julio 1995 en la ĉirkaŭaĵo de Srebrenica, en kiu pereis proksimume 8000 bosniaj viroj. Klare ĉiuj flankoj plenu-mis gravajn militkrimojn kaj portis parton de la respondeco kaj kulpo. La milito en Bosnio-Hercegovino povis esti finita per la „Interkonsento de Dayton“ de decembro 1995, kiu estis aranĝita de Usono (Clinton) kaj Eŭropa Unio kaj kreis el Bosnion komplikan laŭetnan federa-ĵon.[61] La milito en Bosnio-Hercegovino kaŭzis verŝajne ĉirkaŭ 100 mil mortviktimojn kaj 2,2 milio-nojn da rifuĝintoj kaj forpelitoj. La bosniaj islamanoj parolas pri genocido kontraŭ tiu etno.[62]

Kiel dirite, la diversaj militoj en eksa Jugoslavio kaj ĝiaj sekvoj daŭris dum la tuta jardeko. Kiam NATO sub usona gvido bombadis en majo 1999 la jugoslavian ĉefurbon Belgrado kadre de la **milito en Kosovo**, aperis laŭtaj protestoj kaj duboj pri la legitimeco de la operaco, al kiu mankis mandato de UN. NATO, kiu efektivigis ĝin kiel reprezentanto de UN-ŝtatoj, pravigis la operacon kiel humanecan intervenon.

La monda komunumo serioze reagis al tiuj militkrimoj kaj decidis instali tribunalojn por persekuti kaj puni krimulojn, kiuj kulpis pri la lezado de la homaj rajtoj kaj respondecis por la genocidoj de Ruando kaj eksa Jugoslavio. La koncernaj tribunaloj komencis sian laboron en 2002 en Hago, Nederlando. La ĉefaj akuzitaj de la militkrimoj en eksa Jugoslavio, Milošević, Karadžić, Mladić kaj aliaj, povis unu post la alia esti akuzitaj, kondamnitaj kaj senditaj al la malliberejo, je la granda ĉagreno de multaj (naciismaj) serboj, kiuj protestis kontraŭ tia maljusta traktado de siaj herooj. Ankaŭ iuj albanaj gvidantoj de Kosovo, precipe ilia armea organizaĵo UÇK, estis akuzitaj pro tio, ke ili plenumis milit-krimojn.[63]

* * *

En 2001 la Monda Banko, IMF kaj la Komitato por Evoluiga Asisto de OECD postulis la tiel nomatan „Jarmilon de la evoluigaj celoj“, kiuj devis esti atingitaj ĝis 2015. La 12an de oktobro 2001 *Kofi Annan*, kiu venis el Ganao kaj oficis kiel ĝenerala sekretario de UN inter 1997 kaj 2006, ricevis kune kun la Unuiĝintaj Nacioj la Nobelan pacpremion pro la eksterordinara „engaĝiĝo por pli bone organizata kaj pli paca mondo“.

Per la komenco de la sendependeco de **Orienta Timoro** en 2002 komenciĝis la pacmisio de UNMISET. En 2003 komenciĝis pacigaj misioj en **Ebur-Bordo** (MINUCI) kaj en **Liberio** (UNMIL). Dank´ al popola voĉdono en **Svislando**, kiu havis pozitivan rezulton, ĉi tiu lando povis aliĝi al UN. 12 jarojn antaŭe la princlando **Liĥtenŝtejno** aliĝis al la mondorganizo. Dum longa tempo la civitanoj de tiuj landoj opiniis, ke aliĝo al UN ne vere havas sencon, ĉar oni estas tro malgranda kiel ŝtato por influi tiun mondorganizon, kaj krome la membreco estas tro multekosta.

La **11an de septembro 2001 Usono** estis atakita de arabaj teroristoj, kiuj flugis per aviadiloj kontraŭ la ĝemelaj turoj de la „Monda Komerca Centro“ en Novjorko, kiuj disfalis kiel karta domo. Samtempe, alian aviadilon la teroristoj stiris kontraŭ la Pentagono kaj probable planis fari la samon ankaŭ kontraŭ la Blanka Domo en Vaŝingtono. En ĉi tiu katastrofo pereis kelkmil homoj en la flamoj

[61] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Interkonsento_de_Dayton.
[62] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Jugoslavaj_Militoj.
[63] La liston de akuzitaj ĉe la Tribunalo por eksa Jugoslavio vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Internationaler_Strafgerichtshof_für_das_ehemalige_Jugoslawien#Angeklagte.

kaj ruinoj de la detruitaj konstruaĵoj. La 12-an de septembro, unu tagon post la terorismaj atakoj en Usono, la Sekureca Konsilio de UN klasifikis la agojn kiel minacon de la monda paco kaj referencis al la rajto de la individua kaj kolektiva sindefendo (rezolucio 1368 de UN). La 28-an de septembro la UN-ŝtataro perrezolucie enkondukis ampleksajn rimedojn kontraŭ la terorismo kaj ĝiaj apogantoj.

Responde al la terorismaj atakoj de „nine eleven“, la respublikana usona prezidento George Bush (filo) proklamis la mondan **„militon kontraŭ la terorismo“**, al kiu aliĝis pluraj ŝtatoj, kaj lanĉis internacie kontestatajn **militojn kontraŭ Afganio (2001) kaj Irako (2003)**. Kadre de tiu milito Usono komencis limigi la homajn kaj civitanajn rajtojn surbaze de la PATRIOT-leĝo, kiu estis tutmonde kritikata. Lige kun la „milito kontraŭ la terorismo“ Bush deklaris kelkajn landojn „kanajlaj ŝtatoj“ (anglalingve „rogue states“), kiujn li identigis kiel parton de la „akso de la malbono“, kontraŭ kiu Usono kiel hegemonia monda potenco prenis al si la rajton enkonduki specialajn rimedojn kaj sankcion ĝis inkluzive de armeaj intervenoj (doktrino Bush). Kiel „kanajlaj ŝtatoj“ estis klasifikitaj tiuj ŝtatoj, kiuj laŭ Usono apogas la terorismon kaj strebas al la posedo kaj apliko de amasdetruaj armiloj, precipe nukleaj: sur la listo de Usono kaj kelkaj aliancanoj aperis Afganio, Irako, Libio, Sudjemeno, Sudano kaj (rest-)Jugoslavio. Poste tiuj ŝtatoj esis forstrekitaj de la listo, sed la listo restis konservata. Inter la aktualaj „kanaj-laj ŝtatoj“ ankoraŭ troviĝas Kubo, Irano, Sirio, Nordkoreio kaj Venezuelo. La reputacio de Bush konsi-derinde malkreskis post gravaj militaj perdoj kaj aliaj enlandaj incidentoj kaj pro la financa krizo de 2007.

La nova milito kontraŭ Irako, kiu komenciĝis en marto 2003 per bombado de Bagdado kaj aliaj lokoj fare de okcidenta alianco sub usona gvido, certe signifis novan gravan cezuron por la monda paco. La ĉefa celo kaj kulmino de la operaco kontraŭ Irako certe estis la kapto kaj mortigo de Saddam Hussein, eksa diktatoro de Irako, en 2006. Lin oni trovis kaj arestis en sia subtera kaŝejo en iu vilaĝo apud lia hejmurbo Tikrit. La mortpuno estis esprimita de iraka tribu-nalo. La filmo de la ekzekuto estis publikigita en la interreto. Dum la usona prezidento Bush gloris la fizikan likvidon de Hussein kiel „justan punon“, reprezentanto de Eŭropa Unio kondamnis ĝin kiel „barbaran“ agon; eĉ Vatikano akre kritikis ĝin. *Ban Ki-moon*, nova sudkorea ĝenerala sekretario de UN, kaŭzis surprizan skandalon, kiam li deklaris, ke ĉiu lando povas libere decidi pri tiaj ekzekutoj. La iraka milito, kiu eble kaŭzis pli malpli cent mil civilajn mort-viktimojn, kelkmil mortigitajn soldatojn kaj 30 mil vunditajn usonajn soldatojn,[64] profunde ŝanĝis la konstelaciom de la mondaj potencoj kaj sintenon de la cetera mondo al Usono, kies prezidento fariĝis ege malŝatata persono. La rusa prezidento Putin, kiu estis ĉagrenita pri la unuflanka aktivismo de Usono en Irako sen konsulti NATO-partnerojn, utiligis la militon por revizii la sinenon de Ruslando rilate al Usono kaj la Okcidento, kontraŭ kiu estis lanĉita agresema propaganda kaj subfosa kurso, kiu rememorigis sovetiajn praktikojn kaj tiajn de la Malvarma Milito. Historie, Irako estas konsiderata kaj de Britio kaj Usono unuflanke kaj de Ruslando aliflanke kiel propra influa zono. Putin kvazaŭ venĝis la diversajn humiligojn, kiujn li kredis senti pro la unuflankaj decidoj de Usono kaj NATO, kiu larĝigis sian influon al la orient-eŭropaj landoj ĝis la limo de Ruslando. Le rezulto de tiu venĝemo estis ekzemple la rusa interveno en la sirian militon en 2015, ĉar Putin opiniis, ke ankaŭ li povas fari kion li trovas bone kaj utile, laŭ la modelo de Usono kaj NATO. Per tiu sinteno li esence malstabiligis kaj malfaciligis la restarigon de la paco en la mondo.

En 2004 estis decidite sendi 8000 UN-pacsoldatojn al **Haitio**, kaj komenciĝis la pacmisio de UNOCI en **Ebur-Bordo**. 14 el la 15 nunaj membroj de la Sekureca Konsilio de UN aprobis rezolucion por kondamni la agojn de la israela armeo kontraŭ civiluloj en la **Gaza-sektoro**. La rezolucio estis akceptita per sindeteno de Usono.

Provokaj incidentoj ĉe la liban-israela limo kaj raketoj pafitaj de Libano sur israelan teri-torion eksplodigis la **(Duan) Libanan Militon** en julio 2006. Post kiam la rezolucio 1701 de UN estis aprobita, la konfliktantaj partioj konsentis ĉesigi la atakojn. La israelaj trupoj iom post iom retiriĝis de Libano. Samtempe, taĉmentoj de la libana armeo kaj UNIFIL okupis poziciojn en suda Libano. Kvankam ambaŭ flankoj ne povis plene atingi siajn militcelojn, ili postulis la venkon por si mem. La milito, kiu kaŭzis 1500 mortviktimjn, ĉefe libanajn civilulojn, finiĝis la 8-an de septembro.

[64] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Irakkrieg#Getötete_Zivilisten.

La jaro 2008 restas ne tiel kiel „Internacia Jaro de la lingvoj“, sed multe pli kiel jaro de la **milito inter Ruslando kaj Kartvelio** en la memoro. Ĉi tiu armea konflikto sur kartvela teritorio formale okazis inter Kartvelio unuflanke kaj Ruslando kaj la internacie neagnoskitaj respublikoj **Suda Osetio** kaj **Abĥazio**, kiuj estis subtenataj de Moskvo, aliflanke. La pafado inter soldatoj de la kartvela armeo kaj sud-osetaj miliciaj unuoj komenciĝis en julio 2008 kaj atingis sian kulminon en la nokto de la 8-a de aŭgusto, kiam kartvelaj fortoj lanĉis ofensivon por reakiri la kontrolon pri la koncernata regiono. Sekve, rusaj trupoj reagis per atako de la Norda Kaŭkazo por repuŝi la kartvelan armeon el Sudosetio. Ĉe tiu okazo la rusoj avancis ĝis la profundo de la kartvela teritorio. Ĝis la armistico de la 12-a de aŭgusto estis mortigitaj entute 850 homoj kaj vunditaj inter 2500 kaj 3000 personoj. Krome, la militaj agoj kaŭzis ondon de rifuĝintoj el Sudosetio. La 15-an kaj 16-an de aŭgusto 2008 Kartvelio kaj Rusio subskribis pacplanon, kiu estis nomita „Ses-Punktoj-Plano“. La 9-an de septembro Kartvelio turnis sin al la Internacia Kortumo en Hago (ICJ) per plendo, ke Rusio lezis la „Internacian Konvencion de 1965 pri Eli-mino de ĉiuj formoj de rasa diskriminacio“ en Sudosetio kaj Abĥazio. Rusio argumentis, ke ĉiaj perfortoj kaj agresoj estis faritaj nur de kartveloj, abĥazoj kaj osetoj. Krome, ili asertis, ke la konvencio ne validas ekster-teritorie, sed nur en la kazo de persekutoj ene de iu lando.

La „Ses-Punktoj-Plano“ por solvi la Kaŭkazan konflikton en 2008 antaŭvidis la daŭrigon de la mandato de UNOMIG. Komence de oktobro 2008 la Sekureca Konsilio de UN longigis la mandaton de la observa misio ĝis la 15-a de februaro 2009 kaj por la plej lasta fojo je la 13-a de februaro 2009 ĝis la 15-an de junio 2009. La 15-an de junio 2009 Rusio renversis la longigon per vetoo. Tiel finiĝis UNOMIG.

Dum jaroj Sudosetio kaj Abĥazio estis rekonitaj nur de la reĝimoj de Transnistrio kaj Nagorni-Karabaĥo. La 25-an de aŭgusto 2008 la Konsilio de la Rusa Federacio kaj la Dumao voĉdonis unuanime favore al la agnosko de la sendependeco de Sudosetio kaj Abĥazio. Por pravigi tiun paŝon Rusio referencis al Kosovo, kiu ekde la proklamo de sia sendependeco en februaro 2008 estis agnoskita de 114 el 1983 ŝtatoj de UN, inkluzive de 22 el 27 membro-ŝtatoj de Eŭropa Unio kaj de 25 el 29 ŝtatoj de NATO, dum Ruslando ne asgnoskis gin.[65]

La 27-an de aŭgusto 2008 la G-7-ŝtatoj kondamnis la unuflankan diplomatian agnoskon de la konflik-taj regionoj en Kaŭkazo fare de Rusio kaj deklaris, ke Rusio „metis sian devontigon por paco kaj sekureco en Kaŭkazo en dubon“. Kartvelio rompis la diplomatiajn rilatojn kun la norda najbaro la 29-an de aŭgusto kaj retiris sian ambasadan personaron el Moskvo. En speciala pintkunveno en Bruselo de la 1-a de septembro ankaŭ la ŝtatestroj kaj registaroj de Eŭropa Unio kondamnis la rusan agnoskon de Sudosetio kaj Abĥazio. EU alvokis ankaŭ aliajn ŝtatojn rifuzi la rekonon de ĉi tiuj kartveliaj teritorioj kiel apartaj entoj. En kunveno de la Valdai-Klubo de la 11-a de septembro 2008, la sudosetia prezidento Eduard Kokoity deklaris, ke lia lando ne restos sendependa, sed prefere aliĝos al la Rusa Federacio. Tia aliĝo aŭ la formala anekso de tiuj du teritorioj fare de Rusio ĝis nun tamen ne okazis. Aldone al Rusio kaj Nikaragvo, Abĥazio kaj Sud-Osetio estis poste rekonitaj de Venezuelo kaj Nauro, dum Sirio anoncis la starigon de diplomatiaj rilatoj en 2018. En 2011 Abĥazio estis rekonita komence ankaŭ de Tuvalo kaj Vanuatuo, kiuj tamen retiris sian agnoskon en 2013 kaj 2014.[66] Bizara ludo ĉirkaŭ la hegemonio pri malgrandaj teritorioj, kiu servis al Rusio ĉefe por disbati kaj malsatbiligi la ŝtatan unuecon de Kartvelio kaj puni ĝian malamegatan prezidenton Miĥeil Saakaŝvili, kiu preferis transiri al la eŭropanoj kaj usonanoj! Temas pri strategio, kiu estis aplikita de Moskvo ankaŭ en la kazoj de Moldavio kaj Transnistrio kaj en 2014 en Ukrainio.

Lige kun la politika evoluo en **Ukrainio**, kiu tute ne plaĉis al Putin en Ruslando, en marto 2014 li sendis armean personaron al **Krimeo**, kiun li ruze aneksis pere de pseŭda „popola referendumo“, kiu kondukis al la proklamo de la sendependiĝo de la krimea duoninsulo kaj ĝia anekso fare de Ruslando, en kiun ĝi estis integrita kiel parto de la ruslanda federacio. La plej gravaj internaciaj organizaĵoj kaj la Okcidento ne agnoskis la anekson de Krimeo, kiun ili daŭre konsideras kiel parton de Ukrainio, kaj komencis enkonduki sankciojn kontraŭ Ruslando kaj kontraŭ personoj, kiuj helpis organizi tiun anekson. La posta enfiltrado de soldatoj el Ruslando en orientan Ukrainon (**Donbaso**) havis la celon malstabiligi Ukrainion, kiu volis aliĝi al la okcidentaj strukturoj inkluzive de NATO, kion Mos-

[65] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Internationale_Anerkennung_des_Kosovo.
[66] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Kaukasuskrieg_2008.

kvo celis eviti. Per siaj agoj Ruslando krude lezis validajn traktatojn el la tempo de la komenco de la 90aj jaroj kaj malrespektis principojn de la internacia juro. La rilatoj inter Ruslando kaj la Okcidento malboniĝis pli kaj pli kaj hodiaŭ eble estas eĉ pli malbonaj ol en la tempo de la ekzisto de Sovetunio, kaj solvo de la krizoj ne estas antaŭvideblaj, tiel longe ke Putin regas Ruslandon, kiel oni kredas.

La Sekureca Konsilio de UN traktis la krimean konflikton en pluraj tagoj dum marto 2014, sed kiel la membroj traktis ĝin, montras la sekva absurda sceno. La 15-an de marto 2014 Ruslando vetois kiel atendeble kontraŭ la rezolucio de la Sekureca Konsilio, kiu devis nuligi la validecon de la referendumon pri la sendependiĝo de Krimeo de la 16-a de marto. Ĉinio sindetenis, dum la ceteraj membroj voĉdonis por, sed tio ne multe helpis ilin, kvankam la franca reprezentanto klasifikis la vetoon kiel rusan malvenkon.

Post la pafado kaj kraŝo de malajzia civila aviadilo super la ukraina teritorio, kiu plej verŝajne estis ŝuldita al la manipulo fare de separismaj milicoj apogitaj de Moskvo, kiuj erare aŭ intence lanĉis raketon kontraŭ tiu aviadilo kun 298 pasaĝeroj, kiuj tragike pereis, Rusio vetois en 2015 kontraŭ la starigo de UN-tribunalo por esplori la katastrofon kaj klarigi la demandon de la kulpo, kiun ĝi nete rifuzis.[67]

* * *

De alia terura diktatoro de la araba mondo, **Muammar al-Gaddafi**, la homaro liberiĝis en 2011 en **Libio**, post kiam li estis serĉata de Interpol kaj trovita de ribeluloj en kaŝejo en betona tubo de seka kanalo en la dezerto, de kiuj li estis mistraktita. La cirkonstancoj de lia pereo restis malklaraj, sed li verŝajne mortis pro vundoj ricevitaj dum pafado survoje al la transportado al la malsanulejo. La situacio en Libio, kiu praktike dividiĝis laŭ tri politikaj regionoj, tute ne trankviliĝis post lia forpaso. Male, la interna milito inter diversaj rivalantaj grupoj pliakriĝis pro la interveno de diversaj eksteraj potencoj. Libio fariĝis ankaŭ granda problemo por Eŭropo pro tio, ke de tie multaj afrikaj rifuĝintoj provis kaj daŭre provas atingi la italan marbordon per ŝipoj, por trovi pli feliĉan vivon en pli bona mondo. Miloj da ili dronis en la Mediteranea maro.

En la nokto de la 2-a de majo 2011 usonaj soldatoj mortigis en speciala operaco, kiu estis ordonita de la usona prezidanto Barack Obama, en sia kaŝejo en Pakistano la saŭdaraban teroriston **Osama bin Laden**, kiu estis konsiderata kiel ĉefo de la islamisma terorisma organizaĵo Al-Kajda, kiun oni akuzis pro la planado de la terorismaj atakoj kontraŭ Novjorko de la 11-a de septembro 2001.

Saŭdarabio estas drasta absolutisma islamisma monarkio, en kiu la bazaj homaj rajtoj estas krude ignorataj kaj sisteme lezataj, kio ofte kaŭzas polemikajn diskutojn eksterlande. 2012 *The* Economist donis al Saŭdarabio rangon 163 de 167 sur la internacia demokratia indekso. Alimaniere pritaksite, Saŭdarabio estas vidata inter la 10 plej aŭtoritatismaj ŝtatoj en la mondo. La jura sistemo de Saŭdarabio baziĝas sur la severa interpreto de la vahabismo (aŭ ŭahabismo), kiu estas aparte konservativa, arkaika, radikala, maltolerema kaj fanatika versio de la Ŝario. Inter la praktikataj lezoj de la homaj rajtoj en Saŭdarabio homrajtaj asocioj regule mencias: malliberigon de neperfortaj politikaj kontraŭuloj, uzadon de la korpa puno por viroj, subpremadon de la libereco de la esprimo kaj religio, arestadon sen akuzo aŭ proceso, elpelon de eksterlandanoj, kiujn minacas la mortopuno en sia patrujo, kaj de politike persekutitaj homoj, aplikon de la mortpuno bazita sur la ŭahabisma interpreto de la Ŝario juro (t.e. publika ekzekuto, senkapigo k.s.), k.a. Mortpunoj estas prononcitaj pro religiaj ofendoj, kiuj povas inkluzivi kritikon de la ŝtata ordo, de la reĝo kaj de la Korano, aŭ koncerni blasfemion, konvertiĝon al aliaj kredoj, k.s. Tiaj krimoj estas punitaj per mortigo de viroj kaj dumviva malliberigo de virinoj. La importado de naturaj kaj artefaritaj drogoj ĉiuspecaj estas submetitaj al severaj punoj; eĉ malgrandaj kvantoj povas esti punitaj per mortpuno. La samo validas por ĉiuj specoj de pornografia materialo. La vendo aŭ posedo de alkoholo kaj aliaj drogoj ankaŭ estas strikte malpermesata. Publikaj manifestacioj estas malpermesataj, ĉar ekzistas ĝenerala malpermeso de la publika kunvenado. Politikaj partioj, opozicio, strikoj kaj sindikatoj estas oficiale malpermesataj de la reĝo. Malgraŭ tio ekzistas kelkaj partioj, kiuj agadas subtere kaj estas jure persekutataj de la reĝimo. Ĉar Saŭdarabio estas absolutisma monarkio, ĝiaj civitanoj ne rajtas voĉdoni.

[67] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Flugo_17_de_Malaysia_Airlines.

En Saŭdarabio la rajtoj de virinoj estas strikte limigitaj. La lando ratifis la Konvencion pri Virinaj Rajtoj de UN la 7an de septembro 2000 kun rezervoj. En la „Gender Gap-raporto“ de 2018 la lando troviĝis sur la 141-a el 149 rangoj rilate seksan egalecon. Intertempe la virinaj rajtoj estis iomete liberaligitaj: Ekde februaro 2018 virinoj rajtas uzi registarajn retajn servojn kaj fariĝi entreprenistoj sen la konsento de sia edzo, patro aŭ frato. La rajto de virinoj stiri aŭtombobilon estis enkondukita antaŭ nelonge. Oni tamen ankoraŭ rifuzas al ili la rajton studi aŭ vojaĝi sen la konsento de vira familiano. Samseksemaj agoj estas punitaj. Laŭ oficialaj indikoj, ĝis nun kvar viroj estis ekzekutitaj pro geja sekskuniĝo. Pli malpli la samaj limigoj kaj reguloj validas ankaŭ por eksterlandanoj troviĝantaj en Saŭdarabio. Saŭdarabio plejparte malakceptas la Universalan Deklaron de Homaj Rajtoj adoptitan de la Unuiĝintaj Nacioj en 1948, ĉar ĝi konsideras ĝin nekongrua kun la islamo. En sia Ĉiujara Raporto de 2007 „Amnestio Internacia“ atentigis, ke la internacia juro estis plurfoje malrespektata, precipe en la „milito kontraŭ terorismo“. Kvankam pruveble ankaŭ Saŭdarabio subtenas la internacian terorismon, Saŭdarabio neniam estis klasifikita de Usono kiel „kanajla ŝtato“, kiel ekzemple Irano, ĉar ĝi estas intima partnero de Vaŝingtono. Tamen, multaj personoj, kiuj estis suspektataj pri kontaktoj kun la terorisma organizajo al-Kaida, estis arestitaj.

En kontestata konferenco de la membroŝtatoj de la Organizo de la Islama Konferenco en 1990 en Kairo estis adoptita la t.n. „Deklaro de la Homaj Rajtoj en la islamo“ estis adoptita. La Konsilio de la Ligo de Arabaj Ŝtatoj aparte adoptis „Araban Leteron de Homaj Rajtoj“ en septembro 1994, kaj en januaro 2004 en reviziita versio.[68]

Aliflanke, la tiel nomata **Islama Ŝtato**, kiu estabiĝis ekde 2003, estis novtipa radikala terorisma ĝihadisma organizaĵo kun miloj da fundamentismaj salafismaj membroj, kiuj aktivis precipe en Irako kaj Sirio. La 29-an de junio 2014 ĝiaj milicoj anoncis la starigon de kaliflando kun **Abu Bakr al-Baghdadi** kiel ĉefo. Ne nur pro la manko de agnosko la t.n. Islama Ŝtato (ISIS) ne estis konsiderata kiel ŝtato en la klasika senco de la internacia juro. La organizaĵo, kiu vaste terurigis la lokan popolon per radikalaj islamaj leĝoj kaj praktikoj, ekzemple publika senkapigo de kaptitaj ostaĝoj, kontrolis partojn de Irako ĝis decembro 2017 kaj partojn de Sirio ĝis marto 2019. Tiel pri la Islama Ŝtato ekestis en Okcidento la imago pri klasika modelo de horora ŝtato en si mem. La ŝokita publiko en la okcidenta mondo miregis, kiam ĝi konstatis, ke ´normalaj´ junaj viroj kaj virinoj, kiuj estis varbitaj en Eŭropo, aliĝis al tiu „ŝtato“ por batali je ĝia flanko kadre de la ĝihado kontraŭ „nekredantoj“, kiuj devis esti neniigitaj. En marto 2015 la Alta Komisaro de UN pri Homaj Rajtoj publikigis raporton, kiu enhavis la pritakson, ke la perforto plenumita de la Islama Ŝtato atingis la dimension de kultura genocido, precipe en la kazo de la etna kaj religia minoritato de la jezidoj, kiuj estis persekutataj, forpelataj kaj sklavigataj de la salafistoj. La Islama Ŝtato estis akuzita ankaŭ pro la detruo de la homa kultura heredaĵo kaj aliaj militkrimoj kaj finfine forpelita el la koncernaj regionoj fare de usonaj, rusaj, siriaj kaj aliaj lokaj ribelaj armeaj fortoj. La ĉefo de la Islama Ŝtato, Abu Bakr al-Baghdadi mem estis akuzita pro plenumo de krimoj kontraŭ la homeco, pro etnaj purigoj kaj punoj kiel senkapigo, krucumo, akvodronigo kaj bruligo de vivantaj homoj kaj postĉasata de siaj malamikoj. Por la havigo de indikoj pri lia restado, kiuj povas konduki al lia arestado, la usona registaro promesis honorarion de 25 milionoj da dolaroj. La kalifo estis finfine trovita en Bariŝa, Sirio, pro perfido de siaj edzinoj, kie li pereis kadre de la usona operaco „Kayla Mueller“ en oktobro 2019 en subtera tunelo sen eliro pro la eksplodo de sia bomba vesto, kiun li havis kun si. La Islama Ŝtato konfirmis lian morton kelkajn tagojn poste kaj nomis Abi Ibrahim al-Haŝimi al-Kuraŝi (lia vera nomo estas alia) kiel lian posteulon.[69]

Lige kun la Islama Ŝtato kaj la islama terororganizaĵo Al-Kajda devas esti nomita la terorisma islamisma organizaĵo „Taliban“, kiu kontrolis de 1996 ĝis 2001 vastan terenon de la lando kaj depost 2015 denove provas konkeri diversajn regionojn de Afganio. En tio Ruslando, Ĉinio kaj Pakistano subtenas la grupon per „konsiloj“, dum Usono pli kaj pli distanciĝis de ĝi.[70]

La speciala sendito de Unuiĝintaj Nacioj por **Sirio**, Staffan de Mistura, taksis en aprilo 2016, ke 400 mil homoj estis mortigitaj ekde la komenco de la milito en 2011, en aprilo 2018 spertuloj taksis 500 mil, ĉar la ciferoj de UN por 2016 baziĝis parte sur datumoj de 2014. Ĉirkaŭ 11,6 milionoj da

[68] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Menschenrechte_in_Saudi-Arabien.
[69] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Islama_Ŝtato, https://de.wikipedia.org/wiki/Abu_Bakr_al-Baghdadi.
[70] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Talibano.

sirianoj fuĝis en 2015, 6,3 milionoj da ili ene de Sirio. Almenaŭ kvin milionoj da homoj forlasis Sirion. La Sekureca Konsilio de UN kaj la internacia komunumo ne restis pasivaj rilate la militon en Sirio. La 3an de aŭgusto 2011 la Sekureca Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj, prezidita de Barato (Hinda Unio), publikigis *deklaraĵon*, kiu kondamnis la malrespek-tadon de la homaj rajtoj kaj la uzadon de perforto kontraŭ civiluloj en Sirio kaj „alvokis ĉiujn flankojn fini la perforton tuj kaj postuli kiel plej multe bremsi kaj distanciĝi de reprezalioj, inklu-zive de atakoj kontraŭ ŝtataj institucioj". En antaŭaj debatoj Ĉinio, Rusio kaj 10 aliaj ŝtatoj en la Ĝenerala Asembleo de UN (Kubo, Irano, Nord-Koreio, Mjanmaro, Belorusio, Zimbabvo, Vene-zuelo, Nikaragvo kaj Sirio) esprimis sin kontraŭi pli drastaj formuloj en la rezolucio. Sed deklaroj de la Sekureca Konsilio havas malpli gravan signifon ol rezo-lucioj. Rezolucio de la 4a de februaro 2012 proponita de Maroko al la Sekureca Konsilio de UN malsukcesis pro la vetoo de Rusio kaj Ĉinio. Laŭ konata eksperto de rusa ekstera politiko, Dmitrij Trenin, Rusio timas reĝimŝanĝon sub ekstera premo, militan intervenon de aliaj, unuflankan kon-damnon de la gvidanto en Damasko. En junio 2012 la estro de la UN-pactrupoj, Hervé Ladsous, ofi-ciale karakterizis la konflikton unuafoje kiel internan (civilan) militon. De la 21a de aprilo ĝis la 19a de aŭgusto 2012, UN-misio de observantoj en Sirio (UNSMIS) estis realigita surbaze de la rezolucioj 2042 (14 aprilo), 2043 (21 aprilo) kaj 2059 (20 julio) de la Sekureca Konsilio. La tasko de UNSMIS estis „kontroli la ĉesigon de la armita perforto en ĉiuj ĝiaj formoj fare de ĉiuj partioj kaj kontroli kaj subteni, kun 300 senarmaj armeaj observantoj de UN, la plenan efektivigon de la ses-punkta propono de la sendito". La mandato de por pacmisio finiĝis la 19an de aŭgusto 2012 tagmeze. La 15-an de majo 2013 la Ĝenerala Asembleo de UN aprobis nedevigan rezolucion, proponitan de Kataro, kiu akre kondamnis la malrespektadon de homaj rajtoj fare de registaraj fortoj en Sirio. Kontraŭaj voĉoj estis 12, sindetenoj 55 (kompare kun 33 por la pasinta rezolucio), kio estis interpretita per la pli forta rifuzo de la siria opozicio. Ankaŭ Eŭropa Unio kaj la Eŭropa Parlamento adoptis rezolu-ciojn kontraŭ la perforto en Sirio kaj enkondukis embargon kontraŭ personoj, kiuj estas respondecaj por la perfortaj reprezalioj kontraŭ la civila popolo. La 18-an de decembro 2015 la Sekureca Konsilio unuanime aprobis la rezolucion 2258, kiu postulis la ĉesi-gon de la pafado por iniciati pacprocezon kaj elekti estontan nereligian registaron en la lando, sub la kontrolo de la UN, ene de 18 monatoj. La sorto de prezidento Assad kaj la partopreno de diversaj grupoj de ribelantoj, kiuj ankaŭ estas konsideritaj kiel teroristoj, estis ekskluditaj de la rezolucia teksto. Ĝenerala sekretario Ban Ki-moon devis prezenti planon por armistico kaj ĝia kontrolado ene de unu monato. En speciala kunveno de la konsilio oka-zinta la 25-an de sep-tembro 2016, la reprezentantoj de Usono, Britio kaj Francio klopodis trakti la suferojn de la homoj en la sieĝita parto de Alepo kaj premi la konsilianon Rusio. En la verva kunveno la usona reprezentanto Power akuzis Rusion pri „barbareco" kaj, same kiel la britaj kaj francaj repre-zentantoj, demonstrae forlasis la salonon, kiam la siria registara reprezentanto estis komenconta sian prelegon. La rusa reprezentanto Ĉurkin aludis la kreskantan kompleksecon de la konflikto kaŭzita de terorismaj grupoj subtenataj de Usono en la tuta regiono kaj laŭdis la registaron de Assad pro ĝia „modereco". En la siria milito estis uzata ankaŭ venena gaso, nome unue klorgaso, kiu ne estas sub-metita al la Konvencio pri kemiaj armiloj kaj ankoraŭ estis uzata en 2018, due iperito (t.n. mustarda gaso), kiu iam estis uzata de la Islama Ŝtato kaj kiu estas submetita al la konvencio, kaj trie la nerva gaso sarino. Post la kompleta detruo de la kemiaj militaj armiloj de la siriaj armeo en 2014, ĉirkaŭ 50 atakoj per kemiaj armiloj fariĝis konataj en Sirio ĝis printempo 2018.[71] Kiam Usono bombis celojn en Sirio en 2018, Guterres, ĝenerala sekretario de UN plendis, ke la atako ne estis aŭtorizita de la Seku-reca Servo. John Bolton notis en sia libro (2020), ke kelkaj homoj de la Trump-administracio „trovis tion ridinda". Ĉi tiu ekzemplo imprese montras la sintenon de Trump rilate al la Sekureca Konsilio de UN.

Sirio estas elstara ekzemplo de kruda kaj altgrade krima diktatoreco kontrolata de la patro **Hafiz** kaj filo **Baŝar al-Asad**. Hafiz al-Assad, kiu apartenis al la religia malplimulto de la alavidoj, funkciis kiel ĝenerala sekretario de la Baath-partio, ĉefministro (1970-1971) kaj ŝtatprezidanto (1971-2000) de Sirio, kiu regis la landon kiel diktatoro de 1970 ĝis 2000. Li bazis sian potencon sur la armeo kaj la sekreta servo de la aerarmeo. Ideologie li praktikis mikson inter socialismo kaj naciismo kaj estis aliancano de Sovetunio. Kadre de bizara kulto de la persono Asad estis glorigita kiel batalanto de la celoj de la arabaj popoloj. Lia ŝtato servis kiel fronto kontraŭ Israelo, kun kiu Asad ne pretis fari

[71] Pli detale vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Bürgerkrieg_in_Syrien_seit_2011.

kompromisojn. En 1976 siriaj trupoj marŝis en Libanon kaj komence intervenis flanke de la kristana frakcio. Per la Traktato inter Sirio kaj Libano de majo 1991 Sirio povis firmigi sian funkcion kiel ordopotencon en Libano. En la Unua Golfa Milito inter Irako kaj Irano, kiu daŭris de 1980 ĝis 1988, Asad subtenis Iranon, en la Dua Golfa Milito de 1990 ĝis 1991 li partoprenis en la kontraŭ-iraka koalicio. En la 1990-aj jaroj Assad alproksimiĝis al Okcidento kaj samtempe al la konservativaj reĝimoj de la araba mondo. Tamen, la interparoloj pri paco kun Israelo malsukcesis. Koncerne la situacion de la homaj rajtoj en Sirio, la organizaĵo „Human Rights Watch“ akuzis Assad-on, ke sub lia reĝimo miloj da sirianoj estis mortigitaj, enprizonigitaj kaj malaperigitaj en la nomo de la ŝtato.

Kelkajn monatojn post la morto de Hafiz al-Assad en 2000 lia dua filo Baŝar al-Asad, kiun li proponis kiel posteulon, heredis lian tronon en la aĝo de 34 jaroj. La konstitucio estis speciale ŝanĝita por redukti la minimuman aĝlimon por la prezidento de 40 al 34 jaroj. En la unuaj prezidentaj elektoj de 2000 kaj en lia reelekto en 2007 Baŝar al-Asad ricevis pli ol 97 procentojn de la voĉdonoj. Post la internacie kritikita baloto en Sirio en 2014 li estis konfirmita por plia sepjara oficperiodo. Post kiam Assad estis vidata de multaj ŝtatoj kiel ebla reformanto, Usono kaj Eŭropa Unio tamen postulis lian eksiĝon en 2011, ĉar li utiligis la armeon por kontraŭbatali protestantojn en Sirio. Per tio li esence kontribuis al la eksplodo de la interna milito en Sirio, kiu rezultigos en la venontaj jaroj kelkcentmil mortviktimojn, milionojn da vunditoj kaj rifuĝintoj kaj multaj detruitajn urbojn. Ankaŭ la plimulto de la Araba Ligo alvokis lin demisii en 2012, kion li nature ne faris. Homrajtaj organizaĵoj ekstreme negative bilancis la regadotempon de Baŝar al-Asad, en kiu estis sistemece efektivigitaj kidnapoj, murdoj kaj torturoj fare de la siriaj armitaj fortoj kaj la siria sekreta servo, kiuj estas dokumentitaj. En novembro 2015 Amnestio Internacia publikigis raporton, asertante, ke la registaro de Assad sistemece malaperigis politikajn kontraŭulojn. Miloj da homoj mortis aŭ estis mortigitaj precipe en la prizono de Saidnaya. La „Siria Reto por homaj rajtoj“ dokumentis la nomojn de entute 65´116 homoj, plejparte civiluloj, kiuj „malaperis“ inter marto 2011 kaj aŭgusto 2015 kaj kies restado ankoraŭ estas parte nekonata. En decembro 2013 la Alta Komisaro de UN por homaj rajtoj deklaris, ke Assad rajtigis fari militkrimojn. Sed en 2016 Assad rifuzis akuzojn de militkrimoj kaj kritikis la armeajn intervenojn de iuj ŝtatoj en la sirian internan milito, kiuj laŭ li celis provoki ŝanĝon de registaro en Sirio. Do, la espero, ke Asad falos kaj malaperos same kiel Saddam Hussein kaj Muammar Gaddafi, estis seniluziigita. Male, kiam en septembro 2015 la rusa armeo intervenis en la sirian militon por helpi al la siria armeo, tio signifis esencan restabiliĝon de la Asad-reĝimo, kiu per la helpo de la rusoj rekonkeris vastajn terenojn de sia lando, kiun li denove kontrolos.[72]

* * *

La pacmisio MINUSCA, kiu estis enkondukita en Centran Afrikan Respublikon en 2014, rapor-tis ankaŭ pri **seksperfortoj kaj seksa ekspluatado** en la vicoj de la UN-dungitaro. La akuzoj koncernis unuojn de Ekvatora Gvineo, Gabono, Kartvelio, Maroko, Francio, Ĉadio kaj Kongo. En 2016 MONUSCO lanĉis enketon pri soldatoj de la bluaj kaskoj el Tanzanio en Demokratia Respubliko Kongo pri suspekto de seksa misuzo de neplenaĝuloj.

En somero 2019, UN plantis arbon honore al Anne Frank por festi sian 90-an naskiĝ-tagon.

Antaŭ 1960, 91 landoj kaj antaŭ 1990 154 landoj membris en la organizo de la Unuiĝintaj Nacioj. Ekde 2011 UN havis 193 membrojn. Solaj ne-membroj restis Vatikanurbo (kies internacia jura reprezentado, la Sankta Seĝo, tamen havas observan statuson), kaj la landoj, kiuj ne estas agnoskitaj de ĉiuj ŝtatoj, kiel Palestino (ekde la 29-a de novembro 2012 ĝi tamen havas la statuson de observanto), Saharo (Demokratia Araba Respubliko de Saharo) kaj Kosovo same kiel la Turka Respubliko de Norda Kipro (TRNZ), la kaŭkazaj respublikoj Abĥazio kaj Sud-Osetio, la Cook-Insuloj kaj la Ĉina Respubliko (Tajvano). En 2017 UN nombris 17 suborganizaĵojn. De ĉi tiu jaro UN estas gvidata de la naŭa ĝenerala sekretario *António Guterres*, kiu devenas el Portugalio.

[72] Lau https://de.wikipedia.org/wiki/Baschar_al-Assad#Syrischer_Bürgerkrieg, https://de.wikipedia.org/wiki/B%C3%BCrgerkrieg_in_Syrien_seit_2011#Opferzahlen.

En 2020 UN celebris sian 75-jaran ekziston.[73] En ĉi tiu jaro oni memoris ankaŭ pri la liberigo de la judoj dum la holokaŭsto kaj aliaj militkaptitoj en nazigermanaj koncentrejoj, pri la masakro de Srebrenica kontraŭ islamaj viroj en Bosnio-Hercegovino antaŭ 25 jaroj kaj pri la neniigo de la japanaj urboj Hiroŝimo kaj Nagasaki fare de usonaj atombomboj, por devigi la japanojn ĉesigi la militon laŭ ordono de la usona prezidento Harry S. Truman, posteulo de Franklin D. Roosevelt, kiu forpasis en aprilo 1945. James Riffe, 99-jara usona veterano, kiu batalis kontraŭ Japanio, diris: „La milito instruis al mi aprezi la vivon“.

Nature, la listo de krizoj, iniciatoj, sukcesoj kaj fiaskoj de UN ne estas finita.

Kiel plej lasta diktaturo en Eŭropo estas konsiderata **Belorusio**, kies prezidento **Aleksandr Lukaŝenko** regas la landon kiel aŭtokrato de kvarona jarcento. De lia regado la belorusa popolo klopodas liberiĝi ekde aŭgusto 2020 pere de amasaj protestoj kaj strikoj post supozata falsita reelekto de la diktatoro kiel landa prezidento. Okaze de la kruda polica traktado de manifestaciantoj sur la strato de Minsko kaj post la arestado de miloj da surstrataj protestantoj, kiuj okazis post tiu balota farso, internaciaj observantoj kaj homrajtaj aktivuloj riproĉas al la reĝimo de Lukaŝenko, ke ĝi plenumis gravajn lezojn de la homaj rajtoj en tiu lando, kiuj devas esti esploratataj kaj iliaj kulpuloj punataj. Krome oni suspektas, ke Lukaŝenko, kiu ne volas cedi kiel ŝtatestro, mem estas kunrespondeca por diversaj politikaj murdoj, kiuj okazis dum lia oficperiodo kaj kiuj devus esti same jure esploratataj. La blankrusa opoziciulino Svetlana Ciĥanoŭskaja (Tiĥanovskaja) parolis en septembro 2020 en la Sekureca Konsilio de UN kaj en la Parlamenta Kunveno de la Eŭropa Konsilio pri la situacio en sia lando. La belorusa popolo vere meritus la Nobelan pacpremion!

Jam de monataj okazas protestoj ankaŭ en Israelo kontraŭ la ´eterna´ ĉefministro Benjamn Netanjahu, kiu estas akuzita pro riproĉita korupto kaj aliaj faroj, ekzemple la politiko de la loĝigo de judoj en la okcidenta Jordanlando, kvankam tio estas malpmermesita laŭ la internacian juron, laŭ iu UN-rezolucio. Ĝuste en la sama tempo Netanjahu sukcesis plibonigi la rilatojn kun la Unuiĝintaj Arabaj Emiratoj, kiuj nuligis la bojkoton kontraŭ Israelo kaj intencas starigi diplomatiajn rilatojn kun la juda ŝtato, post Egiptio kaj Jordanio. Rekompense, Israelo promesis haltigi la planitan aneksadon de tereno en la okcidenta Jordanlando.

Fine necesas mencii la eventojn en Usono, kie en diversaj urboj la amasoj jam de monatoj protestas surstrate kontraŭ rasismo, precipe post la mortigo de la afro-usonanoj George Floyd en Minneapolis en majo 2020. En Kenosha, Wisconsin, alia policisto pafis en aŭgusto kontraŭ la dorso de alia afro-usonano, Jacob Blake, kiu grave vundiĝis.[74] La protestoj okazas en malfacila politika, socia kaj ekonomia situacio por Usono. Ekde februaro/marto 2020 Usono estis grave trafita de la pandemio COVID-19, kiu probale eksplodis en Ĉinio, rapide disvastiĝis tra la tuta mondo kaj infektis (ĝis la fino de aŭgusto 2020) preskaŭ ses milinojn da homoj kaj mortigis pli ol 180 mil homojn en Usono. Pro la grava ekonomia krizo, kiun ĉi tiu pandemio estigis, pli ol 40 milionoj da usonanoj registriĝis kiel senlaboruloj. Precipe multaj malriĉuloj kaj koloraj homoj estas koncernataj de la malsano. Komence prezidento Trump tute ignoris la virusson, poste li bagateligis ĝian danĝerecon. Kelkajn monatojn antaŭ la baloto pri nova usona prezidento en Usono la etoso en tiu lando estas ege strecata pro la profunda antagonismo inter la respublika kaj demokratia partioj. Tian usonan prezidenton kiel Donald Trump, kiu per sia popolisma, protektisma, naciisma kaj izolisma programo evidente celas renversi la kutiman ordon de la ´internaciismo´, dezirante revizii la rilaton al enmigrantoj, islamanoj kaj al Ĉinio, NATO, Eŭropo ktp., la homaro ankoraŭ ne vidis antaŭe.[75] Kritikantoj riproĉas al li, ke li mem estas rasisto kaj suspektas lin, ke li estas (aŭ iam estis) proksima al la rusa mafio, eĉ agento de la Kremlo, ĉar lia sinteno al Putin estas senkritika. La aĉa traktado de koloraj homoj fare de la usona polico kaŭzis kritikon kaj protestojn ankaŭ en eksterlando. En multaj kazoj okazis vervaj diskutoj pri kontes-

[73] Lau https://de.wikipedia.org/wiki/Geschichte_der_Vereinten_Nationen, https://de.wikipedia.org/wiki/Vereinte_Nationen, https://unric.org/de/zurueckliegende-internationale-jahre-dekaden.
[74] Vd. https://www.bild.de/news/ausland/news-ausland/kenosha-usa-dieser-cop-schoss-jacob-blake-sieben-mal-in-den-ruecken-72595286.bild.html.
[75] Pli detale pri la politiko de Trump vd. sub https://en.wikipedia.org/wiki/Donald_Trump.

tataj monumentoj, kiu estis starigitaj antaŭ longa tempo honore al historiaj personecoj, kiuj rilatis al sklaveco kaj koloniismo, kaj kies ekziston oni hodiaŭ konsideras maladekvataj.[76]

Fifamaj elpaŝoj de kuriozaj politikistoj

UN ne ĉiam fariĝis atentata kaj aprezata kiel organizo, nur ĉar ĝi efike solvis militajn krizojn aŭ mizere fiaskis en la klopodo solvi ilin. La UN-sidejo en Novjorko ofte fariĝis la scenejo de rimarkindaj elpaŝoj de diversaj kuriozaj ŝtatestroj, kiuj probable ne celis unuavice la mondpacon en si mem, sed faris propagandon en la propraj nomo kaj misio. Parte ni revenos al homoj, kiuj supre estis jam menciitaj en aliaj kuntekstoj.

Unuan tian faman skandalon kaŭzis **Nikita Ĥruŝĉov**, la sovetia gvidanto, en 1960. Okaze de la parolado de la filipina delegito, kiu kritikis Sovetunion, en Ĝenerala Asembleo, la emocia ruso koleriĝis kaj insultis la diplomaton kiel „lakeon de la usona imperiismo“. Tiam ŝajne okazis la fama incidento, kiam Ĥruŝĉov kuris al la podio kaj frapis ĝin per sia ŝuo.

Usono estis konstante atakata ankaŭ de aliaj. En decembro 1964, la fama revoluciulo **Ernesto „Ĉe“ Guevara** en la Ĝenerala Asembleo faris atentatan paroladon en sia funkcio kiel ministro pri Industrio de Kubo kaj akre kritikis la eksterlandan politikon de Usono, traktante la demandon de la nuklea armado de la NATO-landoj, kaj eĉ parolis pri la reunuiĝo de Germanio.

La rilatoj de **Fidel Castro**, ŝtatestro de Kubo, al UN estis tre malfacilaj. Lia parolado antaŭ la Ĝenerala Asembleo de UN en septembro 1960 restis la plej longa parolado en tiu asembleo, ĉar la parolado daŭris 4 horojn kaj 29 minutojn. Kiam li prezentis sian kvin-punktan planon al U Thant, en kiu li postulis, ke Usono finu sian embargon, retiriĝu de la Mararmea Bazo de Guantánamo Bay, ĉesu subteni disidentojn kaj ĉesigu la lezadon de la kuba aerspacon kaj la teritoriaj akvoj, Usono ignoris ilin. Sekve Castro rifuzis al UN fari inspektojn en Kubo.

Kiel unua papo de la katolika eklezio, **Paŭlo VIa** paroladis en 1965 al la delegitoj de la internacia komunumo en UN, kiuj taksis ĝin historia. Li diris „Ne plu milito! Ne plu! La paco, devas gvidi la destinon de la popoloj kaj de la tuta homaro!“ Paŭlo VIa, kiu estis sperta diplomato kun la sento por grandaj gestoj kaj simboloj, prezentis sian prelegon en la franca lingvo, la lingvo de la diplomatio. Li gratulis al la monda organizo pro ties 20-jara ekzisto kaj esprimis la esperon, ke per tiu organizo la mondo fariĝos pli bona kaj ke konfliktoj povos esti solvitaj per interparoloj anstatau peforto de armiloj. Sed post liaj vortoj estis baldaŭ forgesataj kaj la homaro malpacis same kiel antaŭe.[77]

En novembro 1974 **Jasir Arafat**, la ĉefo de la palestina organizaĵo PLO, estis la unua parolanto antaŭ la de UN, kiu ne parolis kiel reprezentanto de ŝtato aŭ registaro. Apartan atenton vekis la tenilo por la pistolo, kiun li portis, sed ŝajnas, ke la tenilo estis tamen malplena.

Kiel prezidanto de la Konferenco de la Blokneŭtrala Movado **Fidel Castro** reaperis en la Ĝenerala Asembleo de UN en oktobro 1979 kaj faris parolon pri la diferenco inter riĉuloj kaj malriĉuloj de la mondo. Lia parolado estis multe aplaŭdata, kvankam lia reputacio en la blokneŭtrala movado estis damaĝita pro la rifuzo de Kubo kondamni la sovetian intervenon en Afganio. Post la kolapso de la sovetia bloko, Usono atingis la plimulton en voĉdonado por rezolucio kondamnanta la lezojn de la homaj rajtoj fare de Kubo en la Komisiono pri Homaj Rajtoj de UN en Ĝenevo, Svislando. Kubo asertis, ke tio estas manifestacio de la usona imperiismo kaj rifuzis permesi enketan delegacion por eniri la landon.

Kiel jam menciite en decembro 1988 **Miĥail Gorbaĉov**, ĝenerala sekretario de la Komunisma Partio de Sovetunio, faris la mondskuan anoncon, ke Sovetunio grandskale senarmiĝos unuflanke kaj sen kontrakta devigo. Kaj je la granda miro de la ceestantoj li diris: „Ni estas tre

[76] https://de.wikipedia.org/wiki/Proteste_infolge_des_Todes_von_George_Floyd#Situation_der_USA.
[77] Vd. https://www.domradio.de/themen/kirche-und-politik/2015-09-25/als-erster-papst-sprach-paul-vi-1965-vor-den-vereinten-nationen.

prksimaj de tio, pretendi posedi la absolutan veron“. Ĝuste tiun ambicion la sovetiaj komunistoj reprezentis dum jardekoj.[78]

En 2006 la mondan publikon mirigis la furioza elpaŝo de la venezuela prezidento **Hugo Chávez** antaŭ la Ĝenerala Asembleo de UN, kiam li nomis la usonan prezidanton George Bush kiel „diablon persone, kiu hieraŭ estis ĉi tie“, dum Usonon li karakterizis kiel „plej grandan danĝeron de la mondo“. Chávez estis konvinkita, ke Bush devas esti akuzita antaŭ iu internacia tribunalo pro genocido, ĉar miloj da soldatoj kaj civiluloj perdis sian vivon en la milito kontraŭ Irako. John Bolton, la usona UN-ambasadoro rifuzis komenti la atakon kontraŭ Bush kaj aldonis, ke ankaŭ Chávez rajtas esprimi sian opinion sur tiu podio, sed estus bone, se la saman rajton recevus ankaŭ la venezuela popolo mem.[79]

Kiam **Maĥmud Aĥmadineĵad** estis prezidento de Irano, li elpasis dufoje en la plenkunsido de UN. En septembro 2005 lia parolado estis tre atendita, ĉar ĝi promesis doni informojn pri la estonta nuklea politiko de la lando, kiu antaŭe estis sub multa premo de Usono, EU kaj IAEA. La ĉeestantoj eble ne miris, kiam AĤmadineĵad emfazis la neforigeblan rajton de sia lando uzi nuklean energion por civilaj celoj. Li defendis ĉiujn paŝojn faritajn de sia lando ĝis nun kaj invitis la mondon kaj la transnaciajn energi-entreprenojn partopreni en la irana civila nuklea programo per teknologia kunlaboro.

En 2009 li tamen cagrenis multajn UN-delegitojn pro sia ataka parolado kontraŭ Israelo, nomante gian batalon kontraŭ la palestinanoj „genocido“ kaj akuzante Israelon pro laŭdira superregado de la internacia politiko. Li riprocis al la israelanoj, ke ili volas krei „novan formon de la sklaveco“, provante utiligi Usonon kaj la eŭropanojn por siaj propraj celoj. Ktp. Israelo bojkotis la kunsidon. Multaj aliaj partoprenantoj, inkluzive la germanan, britan, francan, italan, danan kaj hungaran delegaciojn, forlasis la salonon proteste dum kiam la irana prezidanto parolis. Ankaŭ la delegacioj de Argentino, Kostariko, Aŭstralio kaj Nov-Zelando retiriĝis. Kompae kun la parolado de antau kar jaroj, cifoje AĤmadineĵad tute ne menciis la nuklean programon de Irano.

La irana prezidento jam kaŭzis protestojn antaŭ sia vizito al Novjorko, kiam li denove neis la holokaŭston en kunveno en Teherano. La tutan tagon okazis protestaj manifestacioj de homrajtoj grupoj ĉirkaŭ la hermetike fermita UN-konstruaĵo. La germana UN-delegacio nomis la klarigojn de AĤmadineĵad „neakcpteblaj“.[80]

En 2011 li denove elpa ŝ is en la UN-plenkunveno kaj akuzis la Okcidenton kaj Usonon respondecaj por mondmilitoj, amasmurdado kaj deportado de homoj kaj popoloj. Sed AĤmadineĵad maltrafis la adresatojn de sia parolado, ĉar ili jam proteste forlasis la salonon pli frue. Kelkaj jarojn poste la israela ĉefministro Benjamin Netanjahu reagis per klaraj gestoj, kiuj indikis al Irano, ke Israelo ne permesos al ĝi konstrui nuklean bombon.

En septembro 2009 **Muammar al-Gaddafi**, la gvidanto de Libo, kaŭzis skandalon per sia unua parolado al la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj, nomante la politikon de la vetoaj potencoj neakceptebla, kondamnante la Sekurecan Konsilion kiel „teroristan konsilion“ kaj disŝirante la Ĉarton de UN. En sia longa, 90-minuta alparolo al la ĉefaj politikistoj de la 192 membroŝtatoj Gaddafi akuzis la internacian komunumon, ke ĝi rompis sian propran ĉarton. Li atentigis, ke ĝia preamblo kondiĉigas, ke ĉiuj landoj, sendepende de sia grandeco, havas egalajn rajtojn. Tamen la plej multaj ŝtatoj ne estas reprezentataj en la Sekureca Konsilio de la dek kvin membroj kaj la kvin vetoaj potencoj diktas la tonon, Gaddafi kritikis kaj diris, ke „ni ne akceptas tion kaj ni ne agnoskas tion,“ la rajto de vetoo estu forigita, kaj ekscitite li disŝiris kelkajn paĝojn de la UN-Ĉarto. Pluraj delegitoj forlasis la salonon. Nu, Gaddafi aludis gravan esencon de la strukturo de la UN-organizo, kiu jam apartenis al la sferoj de la reformoj, kaj iusence li ja pravis. Certe, la membroj de la SK ne toleris kritikon de gangstro kiel Gaddafi, kiu respondecis pri

[78] Vd. https://www.c-span.org/video/?5292-1/gorbachev-united-nations.
[79] Vd. https://www.spiegel.de/politik/ausland/uno-sitzung-chavez-beschimpft-bush-als-teufel-a-438247.html.
[80] Vd. https://www.spiegel.de/politik/ausland/uno-vollversammlung-ahmadinedschad-sorgt-mit-israel-hassrede-fuer-eklat-a-650920.html.

gravaj krimoj kaj lezoj de la homaj rajtoj en la propra lando. En 2006 li asertis, ke Libio havis sian propran nuklean programon por konstrui atombombon, pri kiu ĝi rezignis en 2003.

Kiel ni vidas, ne nur honorindaj figuroj, sed ankaŭ diversaj aŭtokratoj, grandaj kaj malgrandaj politikaj friponoj kaj kanajloj kun malicaj intencoj misuzis la scenejon de UN por esprimi sian opinion kaj rikolti aplaŭdon kaj por poste efektivigi siajn proprajn planojn, kiuj kontraŭas la principojn de la internacia juro, kiun UN klopodas defendi.

Sed ankaŭ diversaj aktivuloj, kiuj ne estis reprezentantoj de ŝtatoj, sed de la civila socio, ricevis okazojn por elpaŝi sine de UN. Tiel, en julio 2013 la aktivulino por infanaj rajtoj **Malala Yousafzai**, kiun islamistoj en Pakistano provis mortigi, alvokis la ŝtatojn por certigi la instruadon por ĉiuj infanoj, dirante: „infano, instruisto, libro kaj plumo povas ŝanĝi la mondon.“ En septembro 2019, la porklimata aktivistino **Greta Thunberg** elverŝis sian koleron ĉe la klimata pintkunveno de UN. La 16-jaraĝa svedino riproĉis al la politikistoj, ke ili ne komprenas la mondajn problemojn. „Vi neglektas kaj forgesas nin“, ŝi diris. Krome ŝi atentigis, ke la konstanta ekonomia kresko estis fabelo.

Ĝuste ankaŭ la estroj de la plej grandaj ŝtatoj de la mondo, Obama (Usono), Putin (Ruslando) kaj Trump (Usono) uzis la podion de UN por verŝi oleon en la fajron kaj por montri, kiu estas la mastro. En 2014 la usona prezidento Barack Obama parolis pri la ebola epidemio, la „ruslanda agreso en Eŭropo“ lige kun la rusa anekso de Krimeo kaj la militaj aktivecoj en Donbaso kaj la „brutaleco de la teroristoj en Sirio kaj Irako“. La akuzoj de Obama estis konsideritaj en Ruslando kiel ofendo, same lia klasifiko de Ruslando kiel „regiona potenco“.

En septembro 2009 Putin, kiu respondis al la parolado de Obama, kiu en ĉi tiu jaro ricevis la Nobelan pacpremion pro siaj „eksterordinaraj klopodoj por plifortigi la internacian diplomation kaj kunlaboron inter la popoloj“, laŭ sia maniero el rusa vidpunkto, esprimis sian zorgon pri la hegemonio de Usono, sen mencii ĝian nomon, kiu ekestis post la fino de la Malvarma Milito. Li timis, ke la subfosado de UN fare de tiu hegemono povus konduki al la kolapso de la arkitekturo de la internaciaj rilatoj. „Ni tiam havus mondon, kiu estis regata de la egoismo kaj la dikto de la pli forta potenco“. Sekvis grava atako kontraŭ la „eksporto de la demokratio en formo de revolucioj“, kiun Putin konsideris enmiksiĝo en la internajn aferojn de aliaj ŝtatoj, kiuj havas alian politikan kulturon. „Anstataŭ la triumfo de la demokratio kaj progreso, ni travivas perforton, malriĉecon kaj sociajn katastrofojn kaj neniu interesiĝas pri homaj rajtoj, inkluzive la rajton je vivado.“ La kulpon li klare donis al tiuj, kiuj kaŭzis tiujn mizerojn, nome la Okcidento. Ĝin Putin rekte kulipigis ankaŭ pri la ekesto de la Islama Ŝtato, ĉar „unue oni armigis la t.n. moderan opozicion, kiu poste transiris al la Islama Ŝtato“. Li trovis hipokrite paroli pri la internacia terorismo, prisilentante la financadon de la terorisma reto, inkluzive la kontrabandadon de drogoj kaj armiloj“. Putin proponis la adopton de rezolucio, kiu permesas efke kontraŭbatali la Islaman Ŝtaton kaj ĉiujn aliajn terorismajn organizaĵojn, surbaze de la UN-Ĉarto. Per tia strategio la tendaroj por rifuĝintoj ne plu estus necesaj kaj ondoj de rifuĝin-toj, kiuj inundas Eŭropon, ne pl okazus. Li kompatis la rifuĝintojn kaj alvokis subteni ilin. La kulpon pri la „interna milito“ en Ukrainio li donis al NATO kaj al la vastigo de ties influa zono en orienta Eŭropo.[81]

Certe, Putin tuŝis diversajn vundajn punktojn de Usono kaj de la Okcidento, kie okazas diversaj lezoj de la homaj rajtoj kaj de la internacia juro sub la kondiĉoj de la memproklamita ´sankta´ „jureca ŝtato“, pro kio la Okcidento multe perdis de siaj iamaj brilo kaj modelkaraktero, ĉar intertempe ŝtatoj kiel Ruslando aŭ Ĉinio fariĝis novaj modeloj aŭ surbaze de formala aŭ pseŭda demokratio aŭ eĉ de kruda diktaturo, kiuj estas konsideritaj de granda parto de la homaro kiel pli efikaj sistemoj ol la peza demokratio, kiu kaŭzas tro malrapidajn procezojn de la decidoj kaj konkretaj agoj. Despli, ke en tiuj ŝtatoj la homoj estas pli malpli liberaj, eĉ sub la kondiĉoj de komunisma reĝimo.

Montriĝis, ke landoj kiel Irako, Libio, Egiptio aŭ Afganio ne fariĝis aŭtomate demokratiaj, kiel oni esperis en Okcidento, post kiam la tieaj diktatoroj estis faligitaj aŭ forigitaj. Putin avertis la ŝtataron, ke li kontraŭas similan klopodon ŝanĝi la reĝimon en Sirio kaj signalis, ke li

[81] Vd. https://russische-botschaft.ru/de/2015/09/29/wladimir-putin-hielt-die-rede-vor-der-un-generalversammlung.

subtenas ties reganton Asad, kies militkrimojn li prisilentis. Certe, la parolado de Putin ne restis sen hipokriteco rilate al UN, kiam kelkajn tagojn post sia elpaŝo en UN li utiligis la vakuan okazon (ĉar Usono estis retiranta siajn trupojn) kaj sendis siajn soldatojn al Sirio, sen peti la mandaton de iu ajn, krom de Asad, kiu ŝajne petis rusan helpon kaj kies regadon li volis savi, ĉar tio utilis al la politiko de la Kremlo. La preteksto estis kontraŭbatali la Islaman Ŝtaton, celo, kiun sendube apogis la plimulto de la UN-ŝtataro. Sed la vera intenco de la rusa interveno en Sirio sendube estis savi kaj stabiligi la Asad-reĝimon, eviti ŝanĝon de la politika reĝimo en Sirio, rekonkeri vastan terenon por li kaj refortigi la rusan influon en tiu lando, kiu estas ĝia tradicia aliancano. En Ruslando mem la milita aktivismo de la Kremlo estis vendita de la oficiala propagando kiel granda sukceso, kvankam ĝi kaŭzis ankaŭ novan nekonatan nombron de (civilaj) viktimoj, pri kiuj oni apenaŭ parolis, ĉar la rusoj agis en Sirio certe sen havi skrupulojn pri ligitaj civilaj damaĝoj.[82]

Donald Trump, prezidento de Usono ekde 2017, renversis kelkajn principojn de la ĝisnuna usona ekstera politiko kaj nomis la usonajn interesojn laŭ la principo "Usono unue" kiel ĉefajn elementojn de sia ekstera kaj sekureca politiko. Ankaŭ li nomis la venkon super la Islama Ŝtato kaj aliaj islamaj terorismaj grupoj kiel plej altan prioritaton. La 7-an de aprilo 2017 Trump lanĉis 60 raketojn en Sirio, sekvante tradicion de konkretaj aeratakoj fare de usonaj prezidantoj, kvankam la usona kongreso ne aprobis tiun decidon. La unua grava vojaĝo de Trump eksterlanden estis al tiu la Proksima Oriento kaj Eŭropo fine de majo 2017, anstataŭ unue viziti la najbarajn landojn, kiel kutime. En tiu okazo li subskribis kelkajn kontraktojn pri livero de armiloj kun la registaro de Saŭdarabio, sen trakti ĝian malrespektadon de la homaj rajtoj, kaj proponis pli profundan sekurecan partnerecon por batali kontraŭ terorismo kaj Irano. Kompare kun liaj antaŭuloj George W. Bush kaj Barack Obama, kiuj ĉiam admonis al demokratiigo kaj konstituciaj reformoj, Trump ne donis tiajn konsilojn al la islamaj ŝtatoj en la golfa regiono, kiuj ĉiuj estas premaj diktaturoj. Dum la kunvenoj kun la eŭropaj aliancanoj Trump montris distancon. En la ĉefsidejo de NATO en Bruselo li ne konfirmis la devon de la reciproka helpo de la NATO-membroj, sed admonis la aliajn ŝtatestrojn pri iliaj pagaj devigoj. Dum la G7-pintkunveno en Taormina, Italio, Trump blokis interkonsentojn pri rifuĝintaj kaj klimata politiko kontraŭ ĉiuj aliaj registarestroj. Per tiuj signaloj Trump klare komprenigis al la partneroj de Usono, kiu estas lia sinteno pri kelkaj gravaj demandoj de la nova usona politiko. Putin verŝajne ĝojis kaj aplaŭdis ĝin je la konsterniĝo kaj ĉagreno de la eŭropanoj, kiujn Trump evidente ne tro ŝatas.

Ankoraŭ antaŭ sia enoficiĝo kiel prezidento Trump kondamnis la Unuiĝintajn Naciojn kiel klubon, „kie homoj renkontiĝas, amuziĝas kaj babilas." La rezulto de ĉi tiu perturbata kulminis en la rezigno de Usono pri la monda klimata interkonsento, la rifuzo de la partopreno en la pakto pri migrado de UN, la limigo de la pagado de la propra financa parto por la pacmisioj de UN kaj eĉ en la forlaso de la eduka kaj kultura organizaĵo Unesko kaj eksiĝo el la Konsilio pri Homaj Rajtoj de UN, kiun la usonaj respublianoj konsideras malbona kaj superflua.

La usona prezidanto lastatempe insultis la Mondan Organizon pri Sano en rilato kun la kriza administrado de la kronvirusa krizo kiel nekompetentan kaj marioneton de Ĉinio kaj ĉesis pagi al ĝi subvenciojn meze de la pandemio en majo 2020, por fine anonci la kompletan finon de la rilatoj kun tiu organizaĵo.

La usona konflikto kun la nordkorea diktatoro Kim Jong-un, dume kulminiĝis kun Trump kiel usona prezidento. Post kiam Norda Koreio eble atingis la kapablon lanĉi nukleajn raketojn kontraŭ usona teritorio, Trump minacis Nordan Koreion dum sia UN-parolado en septembro 2017 per ĝia „totala detruo". Probable tio estis nura blufo kaj esprimo de portempa kolero de kaprica kaj malserioza ŝtatestro, kiu povas ŝanĝi sian opinion de unu tago al la alia. Laŭ la internacia juro ajna perforta minacado de aliaj ŝtatoj estas malpermesata, sed tio evidente ne interesas tiun usonan prezidenton, kiun lia nevino poste identigos kiel ege danĝeran personon. Jam unufoje, dum la Korea Milito (1950-53), la usonanoj totale detruis nordan Koreion, nome je 85%, kun ĉirkaŭ 2 milionoj da mortintoj. Kaj ili eĉ konsideris apliki la atombombon kvin jarojn post Hiroŝimo kaj Nagasaki. Do, la

[82] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Russischer_Militäreinsatz_in_Syrien, https://de.wikipedia.org/wiki/Bürgerkrieg_in_Syrien_seit_2011#Russland.

usonanoj jam posedis la sperton neniigi la infrastrukuron de tiu malbenita lando, kiu estas gvidata de la sola komunisma dinastio en la historio, laŭ la modelo de la familio en la antikva ĉina imperio. La usonanoj do ne miru, se Kim celas defendi sin per nukleaj armiloj. Sed poste la tono moderiĝis kaj Trump eĉ konsentis renkon-ti la nordkorean ŝtatestron, en Singapuro en junio 2018, tiel ke la evidenta iom naiva sudkorea prezi-danto Moon Jae-in sugestis, ke Trump ricevu la Nobelan pacpremion. Dua renkontiĝo inter Trump kaj Kim okazis en Hanojo, Vjetnamio, en februaro 2019, sed la kunsido restis sen konkretaj rezultoj, ĉar la ideoj kaj imagoj de ambaŭ ŝtatestroj estis tro diverĝaj. Fine de junio 2019, dum vizito al Suda Koreio, Trump spontane renkontiĝis kun Kim Jong-un por la tria fojo ĉe la interna korea landlimo kaj do estis la unua oficanta usona prezidanto, kiu surpaŝis nordkorean teritorion.[83] Ŝajnas, ke ĉiuj tri prezentoj de la bona volo signifis ne pli ol blufan spektaklon de infanecaj ludantoj, kiuj sentis sin gravaj sur la monda scenejo, por fari propagandon en la propra nomo. Post kiam la nordkoreoj sentis sin trompitaj de la usonanoj, ili rekomencis lanĉi siajn raketojn, kaj Trump perdis la intereson pri sia juna nordkorea „amiko“,[84] kiun li antaŭe ankoraŭ nomis malestime „raketa homo“, al kiu Trump promesis bonfarton kaj prosperon al lia lando, se Kim respektas liajn nukleajn planojn. Sed Kim ne emas rezigni pri sia nuklea programo, pr kiu oni supozas, ke ĝi servas al la strebado de la landa dinastio konservi kaj sekurigi sian potencon. Sed Norda Koreio estas preskaŭ plene izolita en la mondo. Eĉ Pekino ŝajne estas interesata pri ĝi nur kiel bufra zono inter la ĉina limo kaj Suda Koreio, kie staras usonaj armeanoj pretaj por milito.

Kvankam **Norda Koreio**, kiu estas totalisma komunisma (fakte stalinisma) diktaturo, subskribis la „Internacian Pakton pri civilaj kaj politikaj rajtoj kaj la „Pakton pri ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj Rajtoj“, Unuiĝintaj Nacioj, la Eŭropa Parlamento kaj diversaj homrajtoj organizajoj raportas, ke en tiu ŝtato regule kaj sisteme okazas gravaj malrespektadoj kaj lezoj de la homaj rajtoj. Kritikado de la ŝtata gvidado estas severe punata. La amaskomunikiloj estas plene kontrolataj de la ŝtato, la eksterlanda interreto ne funkcias, la uzado de eksterlandaj moveblaj telefonoj kaj neaŭtorizitaj renkontiĝoj estas malpermesataj. Nordkoreanoj ne rajtas forlasi la landon. La loko de la loĝado en la propra lando ankaŭ estas preskribita de la aŭtoritatoj kaj dependas de la persona politika aparteno. Eksterlandaj ĵurnalistoj kaj turistoj rajtas moviĝi tra la lando nur en akompano de ŝtataj kontrolistoj. Homrajtaj aktivuloj raportis, ke en Norda Koreio ekzistas pluraj teruraj koncentrejoj por reeduki civitanojn, kiuj faris iun krimon aŭ eraron el la vidpunkto de la reĝimo. En tiuj koncentrejoj troviĝas ankaŭ politikaj malliberuloj kaj homoj, kiuj estis arestitaj pro sia religia kredo kaj tie vivas kiel malsataj mizeruloj sen kontakto al la ekstera mondo. Eĉ gravedaj virinoj estas devigitaj labori longe kaj malfacile en ĉi tiuj kruelaj prizonoj, kiuj estas fifamaj pri sia severa ordo. Malliberuloj mizere mortis pro torturo, malsato, rifuzo de nutrado aŭ estis ekzekutitaj pro malgrandaj deliktoj. Laŭ okcidentaj helporganizaĵoj, ĉirkaŭ 200 mil homoj estas internigitaj (ekde 2005), el kiuj ĉirkaŭ 10 ĝis 20 procentoj mortas ĉiujare pro la mizeraj kondiĉoj aŭ ekzekutoj en tiuj koncentrejoj. Pluraj nordkoreaj rifuĝintoj, sed ankaŭ dungitoj de internaciaj organizaĵoj raportis, ke en la koncentrejoj kaj prizonoj de Norda Koreio oni misuzas homojn, i.a. prizonulojn kaj neplenaĝajn handikapulojn, por eksperimenti kaj testi per ili novajn armilojn, inkluzive de kemiaj kaj biologiaj, injekciante al ili gasojn aŭ virusojn. Laŭ ies rakontoj, nordkoreoj, kiuj fuĝis al Ĉinio kaj estis deportitaj reen al Norda Koreio, estis ekzekutitaj, foje publike, por timigi samlandanojn forfuĝi. Komence de 2005, 70 homoj laŭdire estis ekzekutitaj en ĉi tiu kunteksto en nur unu monato. La mortpuno estas esprimita pro multaj deliktoj. Homrajtaj organizaĵoj kolektis kaj dokumentis ateston pri entute 1193 ekzekutoj en Norda Koreio, sed la nombro de ne raportitaj kazoj estas probable multe pli alta. Por la periodo de 2000 ĝis 2013 la ŝtate financita „Korea Instituto por Nacia Unuiĝo“ nombris 1382 publikajn ekzeku-tojn. La jara pinto estis atingita en 2009 per 160 ekzekutoj. La nombro de ĉiujaraj ekzekutoj laŭdire denove pliiĝis en 2014. Norda Koreio mem raportis pri unu ekzekuto en 2009 kaj du ekzekutoj en 2014. Kim Jong-un ne hezitis ekzekuti ankaŭ proksimajn familianojn, kiuj evidente devis esti likviditaj, ekzemple liajn onklon kaj duonfraton. En februaro 2014 esplora komisiono de UN riproĉis al Norda Koreio krimojn kontraŭ la homaro (aŭ homeco). Multaj el tiuj krimoj estis faritaj kontraŭ la malsata loĝantaro. Okazis ankaŭ kidnapoj de homoj el Japanio kaj Suda Koreio. Estis rekomendite, ke la Internacia Punkortumo en Hago okupiĝu pri la demando de la kulpo de Norda Koreio. En novembro 2014 la Speciala Raportisto de UN Marzu-

[83] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Donald_Trump#Außen-_und_Sicherheitspolitik, https://www.welt.de/politik/ausland/article168798190/Trump-droht-mit-totaler-Vernichtung-Nordkoreas.html.
[84] Vd. https://rp-online.de/politik/ausland/gipfel-in-hanoi-donald-trump-nennt-kim-jong-un-freund_aid-37043175.

ki Darusman komparis la lezojn de la homaj rajtoj en Norda Koreio kun krimoj dum la nazia tempo. Laŭ li ekzistas sufiĉe da indicoj por subteni proceson kontraŭ Kim Jong-un ĉe la Internacia Punkortumo. La reprezentanto de Norda Koreio ĉe la Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko nomis la akuzojn senbazaj kaj diris, ke ĝi neniam akceptos ilin. En januaro 2016 Darusman petis UN-on oficiale informi Kim-on, ke laŭ la raporto de novembro 2014 estis komencita esploro proceduro pri la krimoj kontraŭ la homaro (aŭ homeco).[85]

Kvankam Trump ankoraŭ ne kuraĝis minaci Ĉinion per simila totala detruo, ĉar tiu lando estus unu numero tro granda, la Malvarma Milito inter ambaŭ landoj plene eksplodis, alprenante pli kaj pli politikan dimension post kiam ĝi komenciĝis precipe sur ekonomia kampo per reciprokaj komercaj militoj. Ĉinio ne estas kritikata de Trump pro la malrespektado de la homaj rajtoj, sed pro la ekonomia kaj komerca ekvilibri, kiun ĝi kreis. Cetere, ankaŭ en la kazo de Ĉinio la Okcidento esperis, ke per la ekonomia progreso en tiu lando aŭtomate sekvos demokratiiĝo de la politika kaj socia vivo kaj pli bona situacio de la homaj rajtoj. En ĉi tiu kazo la Okcidento grave eraris, ĉar en Ĉinio fakte okazis la malo. La sinteno de Pekino rilate al Tibeto, Sinkiango, Honkongo kaj Tajvano fariĝis pli kaj pli agresema kaj maltolerema.

En septembro 2019 Trump utiligis sian paroladon ĉe UN por alvoki la reprezentatajn ŝtatojn preni pozicion kontraŭ Irano, kiun li nomis „sangavida“. Li volis nuligi la nuklean traktaton kun Irano kaj reenkonduki ĉiujn antaŭajn sankciojn kontraŭ ĝi.

Fine restas aldoninde, ke ankaŭ diversaj ĝeneralaj sekretarioj de UN ne hezitis eldiri sian opinion. Fine de la jaro 2019 ĝenerala sekretario **António Guterres** ankoraŭ vidis esperon por la mondo kaj diris komence de 2020: „Antaŭnelonge mi parolis pri la vento de la espero, sed hodiaŭ la vento de la frenezo blovas super la mondo, car li estis profunde frustrita precipe pro la civila milito en Libio, kie ŝajnas ripetigi simila scenaro kiel en Sirio, kun la enmiksigo de la grandpotencoj.

Jen do kelkaj sensaciaj momentoj, epizodoj kaj ĉefaj skandaloj kadre de Unuiĝintaj Nacioj, kiam iliaj ĉefaj reprezentantoj altiris la atenton de la internacia publiko. Kutime, oni diras, la diplomatia laboro en Novjorko estas teda, enuiga kaj malefika. Sed en gravaj rilatoj ankaŭ ĝi estis pozitiva, eĉ efika: La fakto, ke la Malvarma Milito ne fariĝis tria mondmilito, estas verŝajne ankaŭ dankinda al Unuiĝintaj Nacioj. Certe ekzistas ege malhelaj ĉapitroj en la historio de UN, ekzemple la genocido en Ruando kaj la masakro de Srebrenica en Bosnio meze de la 1990-aj jaroj, kiujn ĉeestantaj UN-soldatoj ne povis malhelpi. Ankaŭ la genocidon kontraŭ la rohinĝoj en Birmo kaj la militon en Sirio UN ne povis eviti. Kelkaj UN-misioj tamen estis pli sukcesaj. Gigantaj humanecaj katastrofoj estis ligitaj kun ĉi tiuj fiaskoj de la diplomatio de UN, kies decidantaj randpotencoj en la Sekureca Konsilio blokas unu la aliajn ĉe la solvado de tiaj krizoj.

Kritiko kaj eblaj (aŭ dezirindaj) reformoj

Kritiko pri la validaj strukturoj kaj problemoj de UN, kiuj limigas la efikecon de tiu mondorganizo, aŭdiĝas jam de multaj jaroj. Esence temas pri jenaj kampoj, kiuj estas kritikataj kaj sur kiuj oni planas reformojn:

La kritikistoj kritikas la konsiston kaj organizitecon de la **Sekureca Konsilio (SK)**. Ĝia ĉefa problemo estas, ke ĝi respegulas la situacion kaj ekvilibron de la mondo en 1945, kiu ne plu konformas al la hodiaŭa realo. La kvin konstantaj membroj de la SK praktikis sian vetorajton en la pasinteco por eviti kondamnojn kaj sankciojn kontraŭ si mem aŭ amikaj ŝtatoj. De 1946 ĝis 1964 Sovetunio kontraŭvetois 103 aliajn unuvoĉajn plimultojn. Usono vetois kontraŭ 69 rezoluciproponoj pri Israelo en 20 kazoj.

La ĉefa kritiko pri la nuna valida ordo de la SK do koncernas la eblon de la reciproka blokado de gravaj proponoj kaj decidoj fare ĝiaj konstantaj (aŭ ĉefaj) membroj, ĉar ĉiu el tiuj membroj havas la rajton de la vetoo. Kaj ĉar la ceteraj neĉefaj membroj ne havas ĉi tiun rajton, ili praktike nenion povas fari por ŝanĝi ĉi tiun situacion. Per aliaj, pli drastaj konkludaj vortoj: Per la valida sistemo la Sekureca

[85] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Nordkorea#Menschenrechte, https://de.wikipedia.org/wiki/Menschenrechtssituation_in_Nordkorea.

Konsilio kaj Unuiĝintaj Nacioj kiel tuto praktike povas bloki sin mem por ŝanĝi la situacion en la mondo en unu maniero aŭ alia direkto okaze de grava krizo, kiel montris multaj ekzemploj en la supra parto pri sukcesoj kaj fiaskoj en milito kaj paco.

Pri reformo de la SK de UN oni debatadas en politiko kaj politikscienco ekde la fruaj 1990-aj jaroj. Rigarede al la aktualaj krizoj en la mondo, precipe Hindio, Brazilo, Japanio kaj Germanio insistas pri reformoj en UN kaj pli da influo en ĝi. Kiam la tiama ĝenerala sekretario de UN Kofi Annan lanĉis procezon por reformi Unuiĝintajn Naciojn en 2003, la reformado de la SK de UN estis parto de ĉi tiu debato. Reformo de la SK de UN laŭ artikolo 108 de la UN-Ĉarto postulas plimulton de du trionoj de la membro-ŝtatoj de UN en la Ĝenerala Asembleo (ĜA) de UN. Por ke tia reformo validiĝu, ĝi devas poste esti ratifita de du trionoj de la membro-ŝtatoj de UN kaj de la kvin konstantaj membroj de la SK. La potenco de la konstantaj membroj de la SK do esence malfaciligas la reformojn. La kvin konstantaj membroj sekurigis sian vetoan rajton ankaŭ en la Ĝenerala Asembleo, kiam la Ĉarto estis fondita, kaze ke iliaj rajtoj estus limigitaj. Provojn reformi la SK malrapidgis, malhelpis kaj evitis tiuj konstantaj mambroj. Oni do povus ŝanĝi tiun misan situacion, se la Ĝenerala Asembleo decidus aboli la vetorajton per du-triona plimulto.

La dua grava temo koncernas la demokratian legitimecon de Unuiĝintaj Nacioj, pli precize dirite, la demokratian legitimecon de ĝia ŝtataro kaj ĝiaj reprezentantoj.

Ĉar UN estas internacia registara organizo, ĝi dividas la **demokratiajn malfortojn** de ĉi tiu organizo. Kiel asocio de ŝtatoj reprezentataj de iliaj registaroj, UN nur nerekte estas demokratie legitimita. Ĝenerale en neniu ŝtato de la mondo okazis referendumo pri UN-membreco, krom en Svislando (kiu membrigis en 2002 post tultanda popola voĉdonado). La membroj de la organoj de UN estas nomitaj de la registaroj de la koncernaj ŝtatoj. La delegitoj de la demokratiaj ŝtatoj povas esti konsiderataj kiel nerekte elektitaj de la popolo, dum la reprezentantoj de la diktaturoj kaj aŭtoritataj ŝtatoj en UN estas same malmulte demokratie legitimitaj kiel la registaroj de tiuj ŝtatoj mem. Pro tio ne estas ĝuste nomi la Ĝeneralan Asembleon de UN (monda) parlamento, ĉar ĝi estas nek demokratie elektita, nek ĝi povas preni devigajn decidojn, kvankam ĝi povas preni tre atingajn decidojn. La ĜA esence estas forumo por diplomatoj de la tuta mondo, kiuj povas interkonsenti pri internaciaj kontraktoj kaj ankaŭ trakti la tutmondajn politikajn eventojn. Ĉar nur reprezentantoj de la respektivaj registaroj partoprenas en la Ĝenerala Asembleo, la vidpunktoj de la opoziciaj partioj ne estas konsiderataj en la sistemo de UN. Tamen organizaĵoj kiel la „Komitato por Demokratia UN“, la Eŭropa Parlamento aŭ la Pan-Afrika Parlamento jam delonge pledas por parlamenta asembleo ĉe Unuiĝintaj Nacioj, kiu meritus tiun nomon kaj kiu konsistu el demokratie elektitaj membroj. La „Interparlamenta Unio“ jam ekzistas, kvankam ĝi estas sen iuj ajn politikaj kompetencoj.

Kritikata estas ankaŭ la **disdono de la voĉoj en la organoj de UN**, precipe en la Ĝenerala Asembleo de UN kaj en la SK de UN. La voĉdonado en la ĜA de UN sekvas la principon de la internacia juro „unu lando – unu voĉdono“. Ĉi tiu principo tamen konfliktas kun la demokratia principo „unu homo – unu voĉdono“. Tiel, ekzemple Nauro kun 10 mil loĝantoj havas ekzakte tiom da voĉoj kiel Ĉinio kun 1,358 miliardoj da civitanoj, nome unu. En la plej potenca organo de UN, la SK, kvin ŝtatoj rajtas ankaŭ konstante membriĝi, dum la ceteraj membro-ŝtatoj povas nur nerekte elekti reprezentantojn al ĉi tiu organo dum du jaroj. Ĉi tio plifortigas la fakton, ke tiuj ŝtatoj povas bloki ajnan plimultan decidon per sia vetorajto.

Alia centra problemo de Unuiĝintaj Nacioj estas kaj restas la **manko de la kompetencoj**. Kvankam UN sukcesis kunigi preskaŭ ĉiujn landojn de la mondo sub unu tegmento, ĉefe ĉar la Ĉarto estas flekse interpretebla ĉe pluraj esencaj temoj, ke ĝi povas esti utiligata praktike de ĉiuj kulturaj kredoj kaj politikaj ideologioj, eĉ se ili malsamas au kontraŭdiras unu la aliajn, ĉar ĝi povas esti interpretata kaj aplikata en la senco kaj je la favoro de tiuj konvinkoj kaj ideologioj laŭ la situacio. Por ke la koncepto de universala organizo povu komplete funkcii, necesus cedo de naciaj kompetencoj al tiu organizo en ĉiuj tri juraj sferoj de la ŝtata potenco: ekzekutiva, leĝdona kaj juĝa. Sed apenaŭ iu ŝtato pretas tion fari nuntempe.

Finfine, egoismaj naciaj vojoj malhelpas kaj evitas la plej multajn provojn atingi pli da **deviga harmonio** ene de la UN-sistemo. Tio validas precipe por la kvin konstantaj membroj de la Sekureca Konsilio (precipe por Usono en la lastatempa pasinteco, kvankam en la okcidenta mondo ŝajnas, ke

precipe Ruslando kaj Ĉinio blokas ĉiujn komunajn decidojn), kiuj ofte ne emas submetiĝi al la internacijura monopolo de la SK kaj preferas mem defendi siajn proprajn interesojn, ofte kun koalicio sub ilia gvido, ekzemple se temas pri lanĉo de milito. Samtempe montriĝis, ke UN apenaŭ aŭ tute ne kapablas efektivigi proprajn politikojn, kiuj kontraŭas la interesojn de la grandpotencoj, kiuj kontraŭdiras ekzemple la interesojn de Usono, ĉar ili estas intime interligataj kun ili finance, rilate al la dungitaro kaj historie.

Organizaĵoj pri homaj rajtoj kritikas la **kreskantan ekspluatadon kaj devigan prostituadon de virinoj** dume UN-pacmisioj en diversaj landoj. Ekzemple dum la misio de UN en Kamboĝo en 1992/93 la nombro de prostituitinoj altiĝis de 6000 al 25 mil. Kosovo fariĝis la ĉefa celo por la kontrabandado de virinoj kaj knabinoj post la disfalo de la internaciaj pacaj fortoj (KFOR) kaj la starigo de la Interna Administra Misio de UN en Kosovo (UNMIK). En 2002, enketa raporto de la Alta Komisaro de UN pri eifuĝintoj (UNHCR) trovis, ke iu UNHCR-dungitaro sekse misuzis junajn virinojn kaj infanojn en rifuĝejaj tendaroj en Siera-Leono, Liberio kaj Gvineo, kie sekso estis petita kontraŭ manĝaĵo kaj mono. Soldatoj de la bluaj kaskoj ree seksperfortis, fitraktis kaj sekse ekspluatis virinojn kaj infanojn dum sia misio en Haitio. Laŭ studo de 2008 de la organizaĵo pri infanaj rajtoj „Save the Children“, membroj de la Fako de Pacaj Agentejoj de UN (DPKO) en Haitio, Ebura Bordo kaj Sud-Sudano okupiĝis pri seksperfortado, homa kontrabandado, deviga kaj infana prostituado, parola seksa perforto kaj infana pornografio. La misio por paco MINUSCA, kiu komenciĝis en Centrafrika Respubliko en 2014, raportis ankaŭ pri seksperfortoj kaj seksaj ekspluatadoj de UN-dungitoj. Multaj viktimoj estis neplenaĝuloj. La akuzoj koncernis unuojn de Ekvatora Gvineo, Gabono, Kartvelio, Maroko, Francio, Ĉadio kaj Kongo. En 2016 MONUSCO lanĉis enketon pri soldatoj de la bluaj kaskoj el Tanzanio en Demokratia Respubliko Kongo pri suspekto de seksa misuzo de neplenaĝuloj. Malmultaj el la supozitaj krimuloj devas timi jurajn procesojn, ĉar ili estas protektataj de la imuneco tutmonde sub UN-flago. Civilaj dungitoj estas surloke akuzitaj, nur se la UN nuligas ilian imunecon, kvankam tio okazas nur en esceptaj kazoj. En la Kazo de la blukaskuloj la respektivaj originaj landoj respondecas pri akuzado kaj punado de tiaj krimuloj, sed ili malofte interesiĝas pri enketado kaj procesado por puni akuzitojn.

La Asocio de la Societoj por Unuiĝintaj Nacioj (WFUNA) raportis en la lastatempa pasinteco pri 850 dokumentitaj akuzoj kontraŭ UN-dungitoj kaj pri certa kvanto de nekonataj kazoj, kies nombro estas signife pli alta. La politologino Gisela Hirschmann atentigis, ke la oficialaj statistikoj de UN, kiuj montras konstantan malkreskon de la nombro de misuzoj dum pacaj misioj, estas beligitaj kaj parolas pri „kulturo de ignorado“. Aktivuloj de la homaj rajtoj plendas, ke senpuneco kaj silentado pri tiaj problemoj estas la normo.

Alia kritiko koncernas jenajn punktojn:

Multaj komentistoj kritikas la **koncepton pri evoluhelpo** ellaborita en 1960. Oni donis monon al landoj de la „tria mondo“, por ke ili disvolviĝu, sed la starigo de sukcesa komerca sistemo plejparte mankis. En multaj kazoj la kreskanta dependeco de la koncernataj landoj de ŝtataj helpoj kaj servoj al individuoj kaj entreprenoj sen postuli reciprokajn servojn, estas konsiderata kiel sekvo de malegalaj komercaj rilatoj.

Al UN oni riproĉis, ke ili **intervenis nur en tiuj konfliktoj, kiuj rikoltis la plej grandan atenton de la amaskomunikiloj** kaj ke ili estis nur nesufiĉe envolvitaj en konfliktoj en Sudano, Armenio, Bangladeŝo, Mjanmaro, Kolombio, Ruando kaj Peruo, kie efikaj kaj kompetentaj helpo, konsilado kaj perado estis urĝe bezonataj.

Al la industriaj ŝtatoj oni ofte riproĉis **troan mankon de intereso pri ĝeneralaj ekonomiaj kaj sociaj agadoj** de UN. Se aperas veraj problemoj, kiujn oni konsideras serioze, ili estas ofte solvataj lau okazo au lau prisilentata interkonsento ekster la UN-sistemo.

Okazas **misuzo de donacita mono** fare de ribeluloj aŭ armeaj reĝimoj. Enketa grupo de UN malkovris, ke la duono de la nutraĵhelpo de la Monda Nutraĵprogramo en la la interna milito en Somalio ricevis militestroj, iliaj komercaj partneroj kaj lokaj kunlaborantoj. Dum la Malvarma Milito ĉiu monda grandpotenco provis tiri aliajn ŝtatojn al sia flanko, logante ilin per malavara ekonomia helpo

kaj koncerna ekipaĵo. Rezulte de tio eksplodis multaj militoj, kiuj tiuj „gajnitaj“ ŝtatoj efektivigis nome de la superaj potencoj.s

En 1946 la plano de Usono meti **nukleajn armilojn** sub UN-kontrolon malsukcesis. Unuflanke, Usono mem ne volis rezigni pri la atombomboj, ĝis kiam ĝi povis esti certa, ke neniu alia lando povos konstrui ilin. Aliflanke, Sovetunio ne volis ĉesigi la propran nuklean programon, tiel longe ke Vaŝingtono disponis pri la nuklea monopolo.

Alia kritika punkto estas, ke UN **misproporcie kondamnis Israelon**. Per la voĉdonoj de la arabaj ŝtatoj, per tiom da rezolucioj kontraŭ Israelo kaj tiom da specialaj kunvenoj pri la konflikto en la Proksima Oriento oni multe pli ofte kunsidis en ĝeneralaj asembleoj pri Israelo ol pri iu ajn alia temo. Sed en la SK la koncernaj rezolucioj kutime ne estis akceptitaj, ĉar Usono vetois favore al Israelo, kio kauzis, ke tiuj rezolucioj ne iĝis ligitaj al la internacia juro. Male, lezoj de la homaj rajtoj en la araba mondo estis malofte traktataj. Krom tio okazis, ke projekto de rezolucio, kiu devis eksplicite kondamni antisemitismon por la unua fojo en la historio de UN, estis malakceptita per la voĉdonoj de la arabaj ŝtatoj. Tiu afero kulminis dum kongreso organizita de UN en Durbano, Sudafriko, en 1975, kie oni difinis cionismon kiel formon de rasismo. Ĉi tiu rezolucio tamen estis nuligita en decembro 1991 kontraŭ la rezisto de la arabaj ŝtatoj.

UN-membro-ŝtatoj kiel ekzemple Federacia Respubliko Germanio aŭ Japanio ankoraŭ nuntempe estas registritaj en la t.n. **klaŭzo de UN de malamikaj ŝtatoj**, kiel resta ĵo de la dua mondmilio. Artikoloj 53 kaj 107 de la UN-Ĉarto permesas al iu ajn subskribinta ŝtato agi kontraŭ malamika lando, kondiĉe ke tia agado prezentas sin kiel sekvon de la dua mondmilito. Tamen, hodiaŭ tiaj reguloj restis nur teorio kaj estas senefikaj, sed malgraŭ tio ankoraŭ ekzistas.

La Eŭropa Kortumo pri Homaj Rajtoj konstatis en 2013, ke homoj, kiuj troviĝas sur iu **„nigra listo“ de UN-sankcioj aŭ kontraŭ-terorismaj rimedoj**, ne havas la eblon defendi sin kontraŭ la sankcioj ĉe sendependa internacia instanco. Por mildigi tiun jure probleman situacion la Kortumo decidis, ke la koncernata persono havas la rajton postuli kontrolon aŭ reekzamenadon de la leĝa praveco de la sankcioj fare de nacia tribunalo. Ŝtato, kiu efektivigas sankciojn de UN sen ajna kontrolo aŭ reekzamenado, malatentas la rajton je justa proceso kaj tiel lezas la Eŭropan Konvencion pri Homaj Rajtoj.

En marto 2005 Kofi Annan prezentis sian surprize vastan 63-paĝan reforman projekton, kiu portis jenan titolon: *En plej granda libereco: Al la disvolviĝo, sekureco kaj homaj Rajtoj por ĉiuj*.

La ĉefaj sugestoj de Annan koncernis la sekvajn punktojn:

Plivastigo de la Sekureca Konsilio: Annan postulis, ke la membreco en la Sekureca Konsilio plivastiĝu de la nunaj 15 (kvin konstantaj kaj dek nekonstantaj membroj) tiel, ke ĝi „reprezentas la internacian komunumon kiel tuton kaj la hodiaŭan geopolitikan realecon en pli granda mezuro“. La nova nombro de membroj de la reformita SK estu 24 aŭ 25 ŝtatoj. Por atingi tion, Annan proponis du modelojn, kiuj adoptas la sugestojn de la t.n. „Altnivelo panelo“. Ĉi tiu punkto estas aparte kontestata kaj tial estis malkombinita kun la ĝenerala diskuto pri reformoj en UN.

Nova Konsilio pri Homaj Rajtoj: La Ĝeneva Komisiono pri Homaj Rajtoj anstataŭiĝu per nova Konsilio pri Homaj Rajtoj kun pligrandigitaj kompetencoj kiel sepa ĉefa organo. Ĉi tiu nova konsilio rajtu decidi per dutriona plimulto por sendi observantojn por kontroli la observadon de la situacio de la homaj rajtaj en iu ajn membro-ŝtato, kie oni suspektas lezon de tiuj rajtoj. La 15an de marto 2006 la Ĝenerala Asembleo de UN fakte decidis fondi tian novan Konsilion pri Homaj Rajtoj de UN kiel posteulon de la Komisiono pri Homaj Rajtoj de UN per 170 aproboj, 4 kontraŭaj voĉoj kaj 3 sindetenoj, cetere kontraŭ la volo de Usono. La nova Konsilio pri Homaj Rajtoj kunvenis la unuan fojon en junio 2006 en sia inaŭgura kunveno. Germanio estis elektita al la Konsilio el la grupo de okcidentaj membro-ŝtatoj kun la plej multaj voĉoj.

Fakte, en la 1990aj jaroj la Konsilio pri Homaj Rajtoj de UN iĝis pli forte kritikata. Kreskata de 18 al 53 reprezentantoj, la Komisiono montriĝis malkapabla reagi al la maltespektado kaj lezado de la homaj rajtoj kaj estis akuzita, ke ĝi denuncas unuflanke certajn landojn, dum ĝi samtempe elektis reprezentantojn de aŭtoritataj ŝtatoj en siajn gvidstrukturojn.

La jaro 1993 markis mejloŝtonon en la historio de la homrajta sistemo de UN per la dua Monda Konferenco pri Homaj Rajtoj (UNHCHR) de junio 1993 en Vieno. En la fina deklaraĵo la membroŝtatoj rekonfirmis la universalan validecon de ĉiuj homaj rajtoj. En tiu okazo estis rekomendita la starigo de la Alta Komisaro pri Homaj Rajtoj kiel centro de la kontakto kaj kunordigo en la Ĝenerala Sekretariejo de UN. Ĉi tiu organo estis starigita de la 48a Ĝenerala Asembleo de UN surbaze de la rezolucio 48/141 la 20-an de decembro 1993. La oficejo de la Alta Komisaro pri Homaj Rajtoj baziĝas sur artikoloj 1, 13 kaj 55 de la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj. La unua Alta Komisaro pri Homaj Rajtoj fariĝis José Ayala Lasso.[86]

Alia mejloŝtono de la homrajta movado estis la adopto de la **Statuto de Romo** por establi la **Internacian Punkortumon** en 1998 por puni krimojn persekutatojn de la internacia juro, precipe genocidon, krimojn kontraŭ la homeco, militajn krimojn kaj krimojn de la agreso, kiuj estas difinitaj en la artikoloj 6,7 kaj 8 de la Statuto. La Statuto ekvalidis en julio 2002.[87] La Internacia Pukortumo traktis ĝis nun kazojn el Demokratia Konga Respubliko, Ugando, Centrafrika Respubliko, Sudano, Kenjo, Libio, Eburbordo, Malio, Burundo kaj Kartvelio, do precipe afrikaj ŝtatoj estas koncernataj.[88] Krom tio estis establitaj specialaj internaciaj punkortumoj por eksa Jugoslavio (1993-2017)[89] kaj Ruando (1994-2015),[90] kiuj funkciis nur portempe.

En 2006 la Konsilio ĉesis funkcii kaj esti anstataŭigita de nove fondita konsilio, kiu enkondukis kelkajn novaĵojn kaj ricevis pli eminentan pozicion en la UN-sistemo. Eĉ pli grava estis la enkonduko de la Ĝenerala Perioda Revizio, al kiu ĉiu membro-ŝtato devas submeti sin al la kontrolado de aliaj membroŝtatoj, sendepende de sia homrajta situacio. Per tia funkciado la Konsilio pri Homaj Rajtoj de UN povas reagi pli rapide al homrajtaj krizoj per specialaj kunsidoj, kiuj povas esti kunvokitaj de triono de ĝiaj membroj en ĉiu momento kaj starigi plurajn komisionojn, kiuj havas la taskon esplori la homrajtan situacion en konkretaj landoj kiel ekzemple en Sirio kaj Norda Koreio.

Pli da kompetencoj por la ĝenerala sekretario: La ĝenerala sekretario de UN donu pli da decidoj pri personaraj kaj buĝetaj aferoj. Kune kun la streĉiĝo de la UN-administrado tio pliefikigu la mastrumajn strukturojn de la organizo. En la Ĝenerala Asembleo de UN de la 28a de aprilo 2006 la grupo de evoluantaj kaj „sojlaj“ landoj malakceptis ĉi tiun planon per 108 kontraŭ 50 voĉoj, kun tri sindetenoj. Ili timis perdi sian influon, ĉar la potenco en la organizo estus tro centrita. Usono, Eŭropa Unio kaj Japanio subtenos la planon de Annan.

Pli da financoj por la evoluhelpo: Annan petis la membro-ŝtatojn elspezi 0,7% de ilia malneta nacia produkto por la evoluhelpo, pri kio la „pli riĉaj“ ŝtatoj jam konsentis en 1970. Li opiniis, ke tio ankaŭ estas elemento en la batalo kontraŭ terorismo.

Kiel oni vidas, konkretaj reformoj havas grandan problemoj estis realigitaj, ĉar kutime ili fiaskas pro la kontraŭstaro de unuopaj ŝtatoj aŭ de grupo de ŝtatoj. La sola reformo, kiu havis iun ŝancon efektiviĝi, estis la fondo de la Konsilio pri Homaj Rajtoj. Malgraŭ tio, post Annan la situacio de la homaj rajtoj malboniĝis de jaro al jaro en la mondo, post pli bona situacio en la 70-aj jaroj lige kun la **Helsinka procezo**, kiu estis iniciatita de la socialismaj ŝtatoj kiel reago al la „nova orienta politiko“ de la germana kanceliero Willy Brandt kaj kiu kulminis en la adopto de la „Finaj aktoj de Helsinko“ kadre de la „Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo“ (KSKE) la 1an de aŭgusto 1975, en kiuj la subskribintaj ŝtatoj promesis rezigni pri perforto kaj respekti la homajn rajtojn, disvolviĝis ekster la UN-sistemo.[91]

---

[86] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Office_of_the_United_Nations_High_Commissioner_for_Human_Rights.
[87] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_puna_kortumo.
[88] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Internationaler_Strafgerichtshof#Straftaten.
[89] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Internationaler_Strafgerichtshof_für_das_ehemalige_Jugoslawien.
[90] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Internationaler_Strafgerichtshof_f%C3%BCr_Ruanda.
[91] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Vereinte_Nationen#Kritik, https://de.wikipedia.org/wiki/Reform_der_Vereinten_Nationen, https://de.wikipedia.org/wiki/Reform_des_UNO-Sicherheitsrats

Homaj rajtoj en danĝero

Eĉ se la homaj rajtoj nun estas integra parto de la internacia diskurso, multe da kritiko restas malfermata. Ĝi koncernas Unuiĝintajn Naciojn kiel organizon mem: Dum longa tempo ili ne vidis sin rekte ligataj al la normoj, por kiuj ili tamen pledis por plenumi ilin, kaj malakceptis juran respondecon pri la miskonduto de blukaskuloj, ekzemple en Srebrenica aŭ Haitio, kie ili verŝajne eĉ respondecis por la eksplodo de la ĥolero. Aldone al sia blokado fronte al la serioza malrespektado de la homaj rajtoj, la Sekureca Konsilio de UN ankaŭ altiris kritikon el homrajta vidpunkto, ekzemple kiam temis pri la trudado de sankcioj, sen ke la koncernaj individuoj rajtis apelacii kontraŭ ĉi tiuj rimedoj (vd. ĉi-supre). La demando, en kiu grado komercaj kompanioj estas ligitaj al la internaciaj homaj rajtoj, restas unu el la plej kontestataj punktoj de la tagordo.

La aktuala UN-sistemo de la homaj rajtoj alfrontas ankoraŭ alian danĝeron, kiu devas esti konsiderata en pli larĝa kunteksto de la nuntempa krizo de la multrilatismo. La impreso pri ĉi tiu krizo videblas hodiaŭ klare antaŭ ĉio en la sinteno de Usono sub prezidento Donald Trump, kiu, sub la moto „Ameriko unue“, forturniĝas de tiu multrilatismo, kiu forte formis Unuiĝintajn Naciojn depost 1945. Usono forlasis gravajn suborganojn kaj interkonsentojn de UN kiel la Homrajtan Konsilion aŭ la Parizan Klimatan Interkonsenton. Nelonge post sia enoficiĝo, Trump rifuzis pagojn al la Unuiĝintaj Nacioj kune kun klara kritikado de tiu organizo. Sed Usono ne estas la sola ŝtato, kiu devojiĝas de la multrilatismo. Naciismaj tonoj ankaŭ triumfas en aliaj landoj; fariĝis modo malferme pridubi la fundamentojn de la internacia kunlaboro, ekzemple en Brazilo, kiu nuntempe estas regata de dekstrema popolisto. Bolsonaro ne estas sen kialo nomata la brazilaTrump. Laŭ la ĝenerala sekretario de UN, António Guterres, la multrilatismo estas „atakata kiam ni plej urĝe bezonas ĝin.“ Sed ankaŭ la portugala ĝenerala sekretario ne povas fari multon ol senhelpe observi la negativan evoluon en kelkaj landoj. Ankaŭ la anekso de Krimeo en 2014 ne povis esti evitita, ĉar Ruslando ne plu sentas sin ligata al la multrilatismo, kiu estas devigata respekti traktatojn kaj konvenciojn, kiuj estis faritaj antaŭ jardekoj sub aliaj politikaj kaj geostrategiaj kondiĉoj kaj cirkonstancoj. La rezigno pri la multrilatismo kaŭzis ankaŭ, ke la konflikto en Sirio ĝis nun ne povis esti racie solvita sine de la UN-sistemo, ĉar ĝi estas blokita pro la malnova vetorajto, kiu estas rigide aplikata de mondpotencoj, kies ŝtatestroj ne vols „perdi la vizaĝon“. Aliflanke, la ebligo de enketo pri la plej gravaj internaciaj krimoj en Sirio fare de la la Ĝenerala Asembleo signifas malgrandan progreson en tiu blokita situacio.

Alia problemo, kiu jam estis menciita, estas la konstanta manko de mono, kiu endanĝerigas multajn agadojn kaj operacojn en la nomo de UN. En tio grava problemo estas la malbona pagmoralo de la membroj de UN: Multaj ŝtatoj ne pagas siajn kontribuojn plene kaj ĝustatempe, tiel ke UN baldaŭ ne plu povas plenumi siajn taskojn kaj devojn. Ofte mankas mono por salajroj aŭ tradukistoj, tiel ke kunvenoj ne povas okazi.

La krizo de la multrilatismo influas ankaŭ la internacian sistemon de la homaj rajtoj kaj eĉ metas ĝin sub apartan premon. Ne nur la homaj rajtoj kaj la organizaĵoj, kiuj defendas ilin, estas malhelpataj en sia laboro; iuj ŝtatoj ankaŭ pli kaj pli malhelpas en UN la aliron de neregistaraj organi-zajoj (NRO) pri homaj rajtoj por limigi la influon de kritikaj voĉoj, ekzemple se temas pri seksa ega-leco de virinoj. Dekstrema popolismo, kiu nutras la rifuzon de la multflanka kunlaboro, ankaŭ estas karakterizata de la kontraŭ-feminismo. Dekstremaj popolismaj registaroj provas malgravigi la normojn de la seksa egaleca, kiu estis atingita en la 1990aj jaroj. En aprilo de 2019 okazis ĉi-rilata konflikto en la Sekureca Konsilio de UN, kiam Usono malakceptis projekton de rezolucio pri la tagordo por virinoj, paco kaj sekureco, kiu celis rekonfirmi la rajtojn de postvivantoj de viktimoj de la seksa perforto. Nur kiam la prezidanta Germanio forigis la alineon pri seksaj kaj reproduktaj rajtoj, Usono konsentis apogi la rezolciproponon.

Kvankam la internacia homrajta sistemo ĉiam estis atakita de diversaj flankoj, la agoj de kelkaj gravaj ŝtatoj estas aparte zorgiga, ĉar ili havas la ekonomian kaj politikan pezon por fortigi aŭ malfortigi la homajn rajtojn en UN. Ĉi tio ne nur inkluzivas Usonon, kiu ĝis nun estis rigardata kiel ĉampiono de la homaj rajtoj en multaj rilatoj. Ankaŭ Ĉinio, la dua plej grava ekonomia potenco en la mondo, disvolvis siajn proprajn strategiojn por malfortigi la homajn rajtojn en la sistemo de UN. En la Konsilio pri Homaj Rajtoj de UN Ĉinio financas rezoluciojn, kiuj konsideras la kritikon pri la homraj-

ta situacio en la propra lando kontraŭleĝa enmiksiĝo en la internajn aferojn. Krom tio ĝi aplikas propran terminologion por nebuligi la originan komprenon pri la homaj rajtoj.

Kaj post kiam Ruslando en 1991 definitive liberiĝis de la stalinismo, la eksa KGB-oficiro Putin kreis, en la esperoplena 21a jarcento, maltransparentan mafiecan ŝtaton, kontrolatan de cinikaj kleptokratoj, oligarkoj, entreprenistoj kaj sekretservoj, kiuj estas sen ajna demokratia aŭ parlamento legitimeco, kaj establis efikan sistemon por subpremi la kritikan civilsocion, elŝalti la politikan opozicion sen timi malliberigi aŭ fizike likvidi ĉefajn kontraŭulojn, kaj ruze trompi la indiferentajn elektantojn, kiuj pro manko de praktiko ne havas la sperton vivi kaj agi en demokratia kulturo, per manipulitaj kaj falsitaj balotoj por sekurigi la propran potencon, kiu devus daŭri eterne. Samtempe la tuta mono, kiun Ruslando kiel ŝtato perlaboras kaj ricevas el la vendo de gaso kaj nafto, grandparte malaperas en la poŝojn kaj bankkontojn de relative malgranda grupo de amikoj kaj lojaluloj de la Kremlo, kiuj ŝajne vivas lukse, dum la plimulto de la griza anonima amaso vivas rande de la ekzista minimumo, precipe en la vilaĝoj. En tiu ŝtato la homaj rajtoj komplete degeneris kaj povas esti arbitre tretataj per piedoj, dum la dependa justico ricevas instrukciojn de la Kremlo, kie sidas Vladimir Putin, la moderna caro de Ruslando. La negativaj kulminoj de la rusa politiko de la lasta tempo estas la provo mortigi la opoziciulojn Aleksej Navalni kaj la klopodon diskrediti la popolajn protestojn kontraŭ diktatoro Lukaŝenko en Belorusio. En la sekureca Konsilio la rusaj reprezentantoj en UN ne nur kontraŭas, kiel ankaŭ la ĉinoj, iun ajn mencion kaj kondamnon pro lezado de la homaj rajtoj. Rusio eĉ ĉesigis ajnajn diskutojn pri homaj rajtoj en tiu sino, kiel Ĉinio, ĉar tiu ĉi temo tute ne estas dezirinda. Ekzistas tuta aro da ŝtatoj, kiuj apogas la flankon de tiuj potencoj, kiel Venezuelo, Kubo, Filpinoj kaj multaj aliaj aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj ŝtatoj, kiuj estas deklaritaj malamikoj de Usono kaj de la Okcidento.[92]

Laŭ propraj informoj de septembro 2020, enketkomisiono de UN trovis multajn indikojn, ke la aŭtoritatisma reganto de **Venezuelo, Nicolas Maduro**, kaj liaj ministroj planis kaj faris gravajn lezojn de la homaj rajtoj, inter alie ordonis arbitrajn mortigojn kaj la sisteman uzadon de torturo ekde 2014. La komisiono konstatis, ke „ĉi tiuj krimoj kongruis kun la ŝtata politiko, estis faritaj kun la scio aŭ rekta helpo de oficiroj kaj altrangaj registaraj oficialuloj," diris Marta Valinas, estro de la koncerne UN-komisiono. Laŭ UN, Maduro kaj la ministroj pri internaj kaj defendaj aferoj sciis pri la krimoj: „Ili donis ordonojn, kunordigis agojn kaj donis financojn por antaŭenigi la planojn kaj politikojn, laŭ kiuj la krimoj estis faritaj," dum la registaro de Venezuelo ignoris ĉiujn petojn de la Komisiono, diris Valinas. La organo kreita de la Konsilio pri Homaj Rajtoj de UN en 2019 ekzamenis 223 kazojn, el kiuj 48 estas detale priskribitaj en la pli ol 400-paĝa raporto. Krome, la raporto analizis preskaŭ 2900 kazojn de similaj modeloj de perforto kaj krimoj. La Internacia Punkortumo en Hago devas trakti la akuzojn senprokraste en la intereso de la viktimoj. Ses usonaj ŝtatoj jam provis enketi la suspekton en 2018. Eĉ singardaj taksoj suspektas, ke Venezuelo estas unu el la landoj en Sudameriko kun la plej granda nombro da mortigoj fare de sekurecaj taĉmentoj, diris UN. Miloj el ili estis dokumentitaj, eĉ se la proceduro ne estis ĉiam arbitra. UN plu konstatis, ke operacoj, kiuj devis esti lanĉitaj por kontraŭbatali krimojn, rezultigis arbitrajn arestojn kaj eksterkortumajn ekzekutojn en 2015-17. La komisiono esploris aŭ reviziis 140 operacojn, en kiuj estis mortigitaj 413 homoj, kelkfoje pafmortigitaj de la proksimeco. Citante oficialulojn, la komisiono raportis, ke estis vaste praktikate ŝajnigi konfliktan kunpuŝiĝon por pravigi tiajn mortigojn. En trejnaj filmetoj, operacaj taĉmentoj estis alvokitaj mortigi homojn sen kompato. Ankaŭ civiluloj estis mortigitaj. Ekzemple en oktobro 2016 35 viroj estis arbitre arestitaj. Iuj malaperis kaj aliaj estis torturitaj. Dek du viktimoj estis ekzekutitaj sen ia proceso kaj entombigitaj en amastombejo. La plej multaj kulpuloj ne devas timi juran proceson. La raporto konkludis, ke la eksterkortumaj ekzekutoj ne estas simple la rezulto de manko de disciplino fare de la sekurecaj taĉmentoj, sed la agoj repegulas parton de la praktikata politiko celanta elimini nedezirindajn membrojn de la socio.[93] La regimo de Maduro estas aktive apogata de Ruslando, kiu provizas al ĝi armilojn kaj ekonomian helpon. Pro la granda politika kaj humaneca krizo, kiun la politiko de Maduro

[92] Pri la stato de la homaj rajtoj en unuopaj landoj vd. ankaŭ sub http://www.planlingvoj.ch/Homajrajtoj_2016.pdf, http://www.planlingvoj.ch/Homaj_rajtoj_2014-15.pdf,

[93] Laŭ https://www.handelsblatt.com/dpa/politik-un-venezuelas-praesident-fuer-verbrechen-verantwortlich/26192498.html?ticket=ST-1131783-3e2aRDqxzd76efcd1Hfu-ap2. Pri la situacio de la homaj rajtoj en Veneuelo vd. ankaŭ sub https://de.wikipedia.org/wiki/Venezuela#Menschenrechte.

kaŭzis, kelkmilionoj da venezuelanoj forlasis sian patrujon. Ŝajnas, ke la opozicio gvidata de **Juan Guaidó**, kiu estis agnoskita de kelkaj okcidentaj ŝtatoj kiel nova provizora prezidento de Venezuelo, fariĝis tre danĝera al la reganta reĝimo, povis esti dume haltigita de Maduro, ĉar la armeo kaj la sekurecaj fortoj restis sur lia flanko.

* * *

Tamen multo estis atingita sur la kampo de la homaj rajtoj en la pasintaj 75 jaroj, ĉar la plimulto de la membro-ŝtatoj de UN tamen subtenas kaj antaŭenigas la homajn rajtojn eĉ en la hodiaŭa multrilatisma kriza situacio kaj principe ne pridubas ilin. Tamen la krizo de la internacia kunlaboro fariĝas pli kaj pli maltrankviliga kaj danĝera por la kredindeco de la internaciaj homaj rajtoj pro la supre nomitaj kialoj. La progresio de la homaj rajtoj en UN estas malhelpata de la drasta redukto de la buĝetoj por la Alta Komisaro pri Homaj Rajtoj. Homrajtoj organizaĵoj tial atentigas la membro-ŝtatojn pri la konsekvencoj de pliaj reduktoj kaj ankaŭ petas subtenon de la ĝenerala sekretario de UN.

Okaze de la 75a datreveno de la fondiĝo de Unuiĝintaj Nacioj estas grave ĉiuflanke fortigi la atenton pri la homaj rajtoj, vizie al la venontaj 25 aŭ 50 jaroj.

Senprecedenca krizo de popola rifuĝado en la mondo

Ĝis nun estis, pro mankana okazo, apenaŭ traktata la tutmonda problemo de la rifuĝado kaj rifuĝintoj, kiuj amase forlasas siajn patrujojn pro kaŭzoj de milito, malsato, ekonomia mizero, senlaboreco, politika persekutado, mortigado kaj lezado de la homaj rajtoj kaj ĝenerala manko de vivperspektivoj. Laŭ indikoj de UNHCR, fine de 2019 entute 79,5 milionoj da teranoj troviĝis en la fuĝado en la tuta mondo. De tiuj 26 milionoj estis rifuĝintoj sub UNHCR-mandato, 5,6 milionoj estis palestinaj rifuĝintoj sub UNHCR-mandato; 45,7 milionoj da homoj estis enlandaj rifuĝintoj kaj 4,2 milionoj estis azil-petantoj (aŭ -serĉantoj). La politika kaj ekonomia krizo en Venezuelo aparte kaŭzis 3,6 milionojn da rifuĝintoj. En procentoj, 1 procento de la monda loĝantaro konsistis el rifuĝintoj. 80% de la rifuĝintoj vivas en landoj aŭ regionoj, kiuj estas koncernataj de malsato, 73% vivas en najbaraj landoj kaj 68% originas el 5 unuopaj landoj.[94] En 2020 1,8 milionoj da rifuĝintoj vivis en Germanio.

Kiel aparta problemo de la monda rifuĝantaro devas esti konsiderata la Eŭropa krizo de rifuĝado. Ĝi komencis, aŭ pliakriĝis, esence per la alveno de 1-2 milionoj da rifuĝintoj al Eŭropa Unio en 2015/16 kaj estas ligata kun la daŭra migra premo kontraŭ Eŭropo kaj la sekvoj, kiujn tiu migrado havas por la socioj de la eŭropaj landoj. La ĉefaj landoj, de kiuj la rifuĝintoj venis al Eŭropo, estis Sirio, Afganio kaj Irako, kie furoris diversaj militoj aŭ okazis perforta persekutado de homoj kaj lezoj de ties bazaj rajtoj. En tio ankaŭ granda parto de virinoj kaj infanoj estis koncernataj. La nombro de azilpetantoj, kiuj eniris Eŭropon, jam atingis 627 mil en 2014, sed preskaŭ duobliĝis al pli ol 1.3 milionoj en 2015 kaj denove estis 1,26 milionoj en 2016. Post la severigo de la azila juro en la plej gravaj celŝtatoj en aŭtuno 2015, la starigo de landlimaj bariloj sur la t.n. balkana vojo en marto 2016 kaj post la interkonsento inter Eŭropa Unio kaj Turkio de la 18-a de marto 2016, la nombro de novaj azilserĉantoj reduktiĝis rapide kaj en 2017 atingis ĉirkaŭ 650 mil personojn. La vervaj kaj embarasaj kvereloj inter inter la EU-membroj pri la disdivido de rifuĝintoj streĉis la solidarecon inter tiuj landoj. Precipe la orienteŭropaj EU-ŝtatoj malemas kaj rifuzis akcepti rifuĉintojn el arabaj kaj islamaj landoj. La azilpolitiko de Eŭropa Unio, la eŭropa migrada politiko kaj la naciaj politikoj pri enmigrado kaj rifuĝintaj same kiel la pozicio de la islamo en Eŭropo fariĝis aktualaj politikaj temoj. La amasa alveno de rifuĝintoj el arabaj, afrikaj kaj islamaj landoj plifortigis en multaj eŭropaj landoj ankaŭ kontraŭislamajn, ksenofobiajn kaj antisemitismajn sentojn kaj la firmigon de radikaldekstraj politikaj partioj, kiel AfD en Germanio. Tragika kromsekvo de tiu amasfuĝado kaj -migrado, kiu estis kutime organizita de krimaj bandoj en Libio trans la Mediterana Maro, estis kelkaj miloj da mortviktimoj, kiuj dronis en la maro aŭ pereis en alia maniero.[95]

Ni parolis tro malmulte ankaŭ pri **malsato** kaj kreskanta **malriĉeco**. La nombro de homoj suferantaj malsaton kaj subnutradon daŭre kreskas. „Aktualaj taksoj supozas, ke preskaŭ 690 milionoj

[94] Vd. https://www.unhcr.org/dach/ch-de/services/statistiken.
[95] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Europäische_Flüchtlingskrise.

da homoj aŭ 8,9 procentoj de la monda loĝantaro suferas malsaton“, diris pluraj UN-organizajoj en sia plej jara raporto de julio 2020 pri la situacio de la nutrado. Laŭ la raporto, infanoj estas precipe koncernataj. Laŭ tio, en 2019 pli ol 21 procentoj de infanoj sub kvin jaroj estis subevoluintaj pro malekvilibrita nutrado, kaj 6,9 procentoj serioze malfortiĝis. Samtempe, 5,6 procentoj sub kvin jaroj estis tro pezaj, kaj la korpa graseco inter plenkreskuloj kreskas en ĉiuj regionoj de la mondo. Kiel regiono precipe Afriko estas koncernata, sed la situacio mabonigas ankaŭ en Latinameriko kaj Karibio. Laŭ la raporto, pli ol tri miliardoj da homoj tutmonde ne povas pagi ekvilibritan nutrajon konsistantan el fruktoj, legomoj kaj proteinoj.[96]

Kiel UN krome klarigis, pro la kronvirusa pandemio la **malsato** rapide kreskas en la mondo. Laŭ la koncerna studo, UN antaŭvidas pliajn 395 milionojn da homoj kun la risko de ekstrema malriĉeco. La progresoj de la batalo kontraŭ malriĉeco povus esti reĵetitaj je 20 ĝis 30 jaroj. La tuta nombro de homoj tutmonde, kiuj vivas je malpli ol 1,90 dolaroj (1,67 eŭroj) ĉiutage, povus altiĝi al pli ol miliardo, atentigas la studo publikigita de UN en junio 2020.[97]

Ĝenerala bilanco

Legante la historion de la organizo de la Unuiĝintaj Nacioj, oni ofte ricevas la impreson, ke la ŝtatoj en UN ne laboras kune, sed unu kontraŭ la aliaj, kaj multaj kuiras sian propran supon, kiel ekzemple Ruslando, kiu havas neniujn skrupulojn trompi la mondorganizon per kapricaj kaj fiaj trukoj de la principo kaj ludo de la kontraŭbatalado. Tiel aperas la impreso, ke UN estas senefika kaj superflua sistemo.

Sed ĝuste la internacia kunlaboro estis la fonda celo de Unuiĝintaj Nacioj. Oni volis venki la nacian egoismon favore al la monda paco. Antaŭkondiĉo por tio estis kontrakto de universala graveco: la UN-Ĉarto. Kiam la reprezentantoj el 50 landoj subskribis la fondan kontrakton en San-Francisko la 26-an de junio 1945, ili estis sub la impreso de du mondmilitoj, en kiu okazis senprecedencaj militkrimoj kiel la holokaŭsto kontraŭ la judoj kaj aliaj minoritatoj kun 5,6 ĝis 6,3 milionoj da mortviktimoj kaj aliaj gravaj lezoj de la homaj rajtoj, kiuj koncernis multajn popolojn: polojn, beliurojn, rusojn, ukrainojn, germanojn en orienta Eŭropo ktp. ktp ktp., do civitanojn de multegaj landoj de la mondo.

Ĉi tiu internacia kunlaboro respeguliĝas en la unua kaj plej grava preamblo. Ĝi komenciĝas per la vortoj: „Ni, la popoloj de Unuiĝintaj Nacioj, decidis protekti la venontajn generaciojn kontraŭ la plago de la milito, kiu dufoje dum nia vivotempo alportis neesprimeblan suferon al la homaro.“

La UN-Ĉarto ekvalidis la 24-an de oktobro 1945 kaj UN komencis sian laboron. La malnova homa revo pri tutmonda paco devis fariĝi realaĵo. La venkintaj potencoj de la dua mondmilito – Usono, Britio kaj Sovetunio – sekurigis al si konstantan membrecon en la Sekureca Konsilio. UN naskiĝis laŭ la modelo, kiel tiu tri ŝtatoj projektis ĝin.

Sed la vojo al tiu paco estis plena de obstakloj. Ĉiam denove aŭdiĝis kritiko pri la senefikeco de la monda organizo. Ankaŭ ĉar multege da mono investiĝis en la UN-aparaton aŭ pro la klopodoj de unuopaj ŝtatoj (mis)uzi la UN-sistemon por propraj celoj. En tio la pagado de kontribuoj al la UN-buĝeto povis servi kiel premilo.

La reputacio de la monda organizo komencis suferi pro la fiasko de diversaj pacaj misioj. Ekzemple pro tio, kiam la blukaskuloj de UN forlasis Ruandon en 1994 anstataŭ malhelpi la genocidon kontraŭ la tutsioj, aŭ pro tio ke la pacsoldatoj de UN rigardis senhelpe al la civiluloj en Srebrenica en Bosnio en 1995, kiuj tie estis masakritaj. La protektaj trupoj de UN, kiuj estis senditaj en la koncernitajn militregionojn, ofte ne povis eviti masakrojn nek protekti la civilan popolon. Sed ankaŭ la genocido en Birmo kontraŭ la minoritato de la popolo de la ronhinĝoj ne povis esti evitata de UN. Post tiuj kaj aliaj incidentoj la internacia publiko multe pli kritike prijuĝas la pacoperacojn de UN en la mondo. Pri nesolvitaj konfliktoj kiel en Sudano, Kongo, Irako, Sirio ni tute ne parolu.

[96] Vd. https://www.nau.ch/news/europa/hunger-in-der-welt-nimmt-laut-uno-weiter-zu-65742951.
[97] Vd. https://www.diepresse.com/5825198/uno-coronakrise-droht-armut-auf-der-welt-massiv-zu-verscharfen.

Krom la malnovaj strukturoj aperis sensaciaj raportoj pri seksa perforo fare de UN-personaro kaj blukaskuloj. Alia kialo por malkontento estis, ke landoj, kiuj tute ne respektas la homajn rajtojn, ne nur estis akceptitaj en la Konsilion pri Homaj Rajtoj, sed foje ankaŭ povis prezidi ĝin.

Malgraŭ tiuj problemoj, la internacia komunumo konsideras UN-on plejparte nemalhavebla kiel ordopotenco en ĉiam pli komuna mondo. Apenaŭ iu ajn grava krizo povas esti solvata sen UN-kunlaboro. Sed ĉu UN ankoraŭ povos helpi, kiam la grandpotencoj militos unu kontraŭ la aliaj? UN montras, kiel la mondo, la ŝtataro aŭ la internacia komunumo funkcias, kiam ĝi devus kunlabori, aŭ kiel ĝi malfunkcias. Malgraŭ tio, UN restas sen alternativo. Estas dubinde, ke la internacia solvado de konfliktoj funkcius pli bone sen la perado de UN. Eĉ 75 jarojn post la naskiĝo de Unuiĝintaj Nacioj restas ankoraŭ longa vojo, kiun Willy Brandt iam anoncis: „Estos la venko de la racio, kiam en iu tago ĉiuj ŝtatoj kaj regionoj unuiĝos kiel mondaj najbaroj laŭ la principo de Unuiĝintaj Nacioj kaj vivos kaj laboros kune.“ Hodiaŭ iliaj idealoj alfrontas streĉan teston.

75-jarojn poste en iuj landoj, precipe (okcident)eŭropaj, oni povas sen dubo konstati, ke iuj progresoj de la homaj rajtoj, kiuj devus esti universalaj, estis atingitaj. Sed 75-jarojn poste, kaj jam multe pli frue, okazis refalo en la barbarajn tempojn, en kiuj oni krude malrespektas la homajn rajtojn. Kaj 75 jarojn poste sennombraj ŝtatestroj kondutas kiel sovaĝaj diktatoroj, ridindigas, ignoras kaj lezas la homajn rajtojn, kiujn ili konsideras kiel okcidentan propagandon kaj rifuzas submetiĝi al ili. Hom-rajtaj organizaĵoj kiel Amnestio Internacio, Human Right Watch kaj Societo por minacataj popoloj blovis alarmon por atentigi, ke la homaj rajtoj estas en danĝero en la plimulto de la landoj de la tero. Ekzemple en Popola Ĉinio, kie oni subpremas la homajn rajtojn simile kiel en la tempoj de Mao Ze-dong, la situacio malboniĝas ĉiujare, ĉar la agresemo de la tieaj naciismaj komunistoj plifortiĝis. La sinteno de Pekino rilate al Tibeto, Sinkiango, Honkongo kaj Tajvano fariĝis pli kaj pli maltolerema kaj en tiu formo ne estas akceptebla. Sed ankaŭ la diversaj militoj de Putin kontraŭ siaj najbaraoj kaj lia gradskala subpremad de la civila socio kaj de la politika opozicio trovigas sub la sama listo, kiu estas longega. La plimulto de tiuj krimoj restas nepersekutataj kaj senpunaj. La grandpote-ncoj devus ludi modelan rolon koncerne la respektadon de la homaj rajtoj, sed bedaŭrinde ili ne ludas ĝin kaj respon-decas por io, ke la monda paco estas konstanta danĝero. Pri kritiko ili reagas alergie kaj kutime rifuzas ĝin.

Esperanto kaj UN kaj en la kunteksto de la monda komunismo[98]

En ĉiuj supre rakontitaj historioj Esperanto, esperantistoj kaj la Esperanto-movado ludis neniun rolon. Eble kun iuj pli malpli signifaj esceptoj, ĝi traktis kaj priskribis neniun tian historion en sia gazetaro aŭ literaturo. La solan esencan (politikan) kontribuon, kiun ĝi faris, estis helpi la disvastigon de la propa-gandado de la komunisma ideologio, partoprenante la apogon de la komunismaj ŝtatoj kaj reĝimoj kiel komplico de la komunismaj partioj en la t.n. socialismaj landoj. De la politikaj cirkonstancoj de la Malvarma Milito la Esperanto-movado do sendube profitis en neatendeble sufiĉe granda mezuro, pre-cipe en orienta Eŭropo. La Esperanto-organizaĵoj en la komunisme regataj landoj prosperis nur dank´ al tio, ke ili ĝuis la apogon de la ŝtatoj, en kiuj ili funkciis, sed nur sub la kondiĉo, ke ili submetiĝis sub la dikton de la komunismaj partioj sen kritiko, plendo aŭ kompromiso pri la stalinisma sistemo, por eviti persekuton, likvidon kaj malpermeson fare de la komunismaj reĝimoj, kaj do anstataŭ opozi-cii do plene integriĝis en la ŝtatan sistemon de tiuj komunismaj landoj. Tio estis logika paŝo, ĉar mul-taj gvidaj Esperanto-aktivuloj estis malnovaj komunistoj, ekzemple en Bulgario, kie post la „venko de la socia-lismo” ili havis la facilan ŝancon kunludi kun la regantaj partioj, kies aktivaj membroj ili mem estis. Al la Esperanto-movado do ree okazis sub la komunistoj politika egalŝaltado kiel sub la nazioj en Germanio en la 30-aj jaroj. Precipe en GDR tio aspektis kiel ironio de la sorto. Nature neniu publi-ke parolis pri tiu tragika situacio, kiu estis temo severe tabuita en la Esperanto-movado, precipe en la orientaj landoj mem. Tiu ŝtata apogo, kiu ebligis kelkajn avantaĝojn por tiuj, kiuj lojale kunludis, natu-re havis altan prezon, nome la totalan perdon de la libereco (sed libereco signifis por la komunistoj liberiĝon de la faŝismo). Ankaŭ pri tiu fakto neniu parolis. La pacisma ideo de Esperanto estis krude uzurpita de la komunismaj reĝimoj por propraj celoj kaj por la komunisma propagando mem. Tiuj

[98] La konsideroj en ĉi tiu ĉapitro pri Esperanto redonas la personan opinion de la aŭtoro.

ekstreme naciismaj reĝimoj ne nur ne interesiĝis pri la enkonduko de Esperanto en siajn lernejojn, sed ilia ĉefa kaj sola celo estis submeti la Esperanto-movadon kaj la esperantistojn sub siajn volon kaj kontrolon kaj utiligi ĝin por sia politika propagando. Markso, Lenin, Stalin, Georgi Dimitrov, Tito, Mao Zedong, Ho Ĉi Minh kaj aliaj korifeoj de la komunisma movado estis aŭ devis esti adorataj de la esperantistoj kaj fariĝis parto de la propagando en Esperanto, kiu tre similis al la stilo de la komunisma propagando mem, kies sola celo estis trompi la publikon. La esperantistoj de Sovetunio, Pollando, GDR, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Bulgario kaj Jugoslavio klopodis pli malpli libervole aranĝi sin kun la regantaj reĝimoj kaj flate lekis la pugon de la komunismaj partiaj funkciuloj por esti bone traktataj, ĉar alian opcion ili ne havis, se iliaj asocioj ne volis havi problemojn kun la ŝtataj instancoj, kiuj totale kontrolis la socian agadon, ĉar certe la sekreta polico de la komunismaj partioj daŭre observadis ilin. Ĉiu „socialisma“ lando havis siajn malgrandajn Esperanto-diktatorojn kaj specialajn agentojn de la landaj sekretaj servoj, kiuj observis, kontrolis kaj limigis la liberecojn de la Esperanto-movadoj kaj prispionis la esperantistojn por raporti pri ili al la ŝtataj kaj partiaj instancoj. Tiel la Esperanto-movadoj en la „socialismaj“ landoj fariĝis plum-paj komplicoj de la (post-)stalinismaj reĝimoj, kvankam en la vivotempo de Stalin ili ankoraŭ estis persekutataj kiel spionoj, eksterlandaj agentoj, sabotuloj kaj malamikoj de la popolo, kiuj devis esti fizike likviditaj kaj mortpafitaj. Ĉar la oficiala literaturo de la orienta bloko ne raportis pri la krimoj de la stalinismo, ankaŭ en ĝiaj Esperanto-movadoj ili restis netraktataj. Malgraŭ tio, en Sovetunio la planlingva demando estis (rande) inkluzivita en la lingvistikan debaton pri estonta mondlingvo sub la kondiĉoj de la komunismo, kun kuriozaj diskutoj, konsideroj kaj rezultoj, kiuj komplete perdis siajn validecon kaj sencon kiam la komunismo kolapsis.

La UEA-movado, kiu subtenis ĉiujn tiujn strebadojn kaj klopodojn de la komunismaj esperantistoj, estis submigrata de maldemokratiaj reĝim-lojalaj aktivuloj el la komunismaj landoj, ĝojante pri la „progresoj“ kaj „sukcesoj“ de Esperanto en tiuj landoj, kie ĝi jam vidis Esperanton „venki“. Oni festis iliajn ĉefajn heroojn kaj netuŝeblajn ´kolonajn sanktulojn´, ĉirkaŭ kiuj praktikiĝis bizara kulto de la persono. Nature neniu kritikis la mizeran homrajtan situacion en la koncernataj landoj. La Esperanto-movado neniam kondamnis la stalinismon kaj la lezadon de la homaj rajtoj en la „socialismaj“ landoj, kaj ankaŭ la ĉefaj gvidantoj kaj protagonistoj de la Esperanto-movado en tiuj landoj, inter kiuj kelkaj funkciis ankaŭ kiel agentoj de la sekretaj servoj, neniam bonvolis senkulpiĝi aŭ pardonpeti ĉe la iamaj asociaj membraroj pro la subprema politiko, por kiu ili kunrespondecis. Male, ili prisilentis aŭ bagateligis la problemojn kaj pravigis sian tiaman sintenon, opiniante, ke ili faris ĉion ĝuste por helpi al la Esperanto-movado, aŭ ili nostalgiis pri la „bonaj tempoj“, kiuj neniam plu revenos.

Post la kolapso de la komunismo la Esperanto-movado perdis siajn aktualecon, signifon, allogon, kvankam en la Esperanto-movado mem oni ne publike diris tion. Eble oni povas ankaŭ paroli pri politika senkreditiĝo de la Esperanto-movado en la koncernaj landoj, ĉar la Esperanto-movado ja estis intime ligata kun la komunismaj reĝimoj, la simpatio kun la komunismo kaj la diktaturaj ŝtatoj, kiuj (laŭdire) apogis Esperanton. Certe, tiu alkroĉiĝo de la Esperanto-movado al la komunismo kaj al tiuj ŝtatoj estis historia eraro, kiu ne estas riparebla. Eĉ se la politika senkreditiĝo de la Esperanto-movado supozeble ludis ian rolon, la fakto estas, ke Esperanto simple eksmodiĝis kaj malaperis kiel aktuala temo el la tagordo de la publika diskuto, eble kun la escepto de Pollando, kie Esperanto kaj Zamenhof estas konsideratataj kiel pola heredaĵo kaj do simbole traktata kiel tia. Sed esence nur la polaj maldekstruloj apogis tiun iniciaton, dum la polaj dekstruloj, inter kiuj troviĝas multaj polaj naciistoj kaj antisemitoj, malfavore rilatas al ´judaj aferoj´.

Cetere, necesas ripeti ĉi-okaze la nekontesteblan kaj historie dekomentitan veron, ke Zamenhof ne konsideris sin polo, sed kiel judon, kaj nur kiel judon (ruslandan-litvan). Do, li estis ĉio alia krom polo. Malgraŭ tio, Zamenhof estas daŭre nomata de la Esperanto-propagando kaj ne nur de ĝi, pola kuracisto ktp. La agnosko de EspeWranto kiel monda nemateria heredaĵo fare de Unesko, kiel tio okazis en Pollando kaj Kroatio, ĝis nun ne sukcesis, ĉar ekzistas tro malmultaj ŝtatoj, kiuj volus apogi tian proponon.

Ankaŭ la aserto, aŭ imago, ke la Esperanto-movado, kiu apartenas al la politika maldekstrisma spektro, kio klarigas la (iaman) simpation de multaj esperantistoj kun la marksismo, socialismo kaj komunismo (ĉiuj ´oficialaj´ historiistoj de la Esperanto-movado pensas kaj verkas sub tiuj premisoj), subtenis la homajn rajtojn, estas falsaĵo, same kiel la politika neŭtraleco de la Esperanto-movado, kiu dum la tuta 20a jarcento parte estis intime ligata kun la komunismo, jam en 1917 okaze de la falo de la

carisma reĝimo kaj en la 20-30aj jaroj en Sovetunio, kie la esperantistoj apogis Stalinon (kaj ne liajn rivalojn aŭ kritikantojn), almenaŭ laŭ la impreso, kiun postlasas certaj Esperanto-publicaĵoj de tiu tempo. La simpatio al la sovetia gvidanto, unu el la plej grandaj amasmurdistoj de la historio de la homaro, restis konservata en Esperanto-medioj ĝis nun. La Esperanto-movado neniam praktike apogis la homajn rajtojn, kiuj estis subpremataj de la potenculoj de ĉi tiu mondo kaj kiam ili estis en danĝero, kvankam la standartoj de la homaj rajtoj estis alte tenataj de la statutoj de la Esperanto-organizaĵoj. La Esperanto-movado neniam kritikis la lezojn de la homaj rajtoj en iu ajn lando, ĉar ĝi timis, kiel la diablo la benitan akvon, ke la potenculoj povus persekuti esperantistojn kaj haltigi la apogon de Esperanto. Oni do devas konstati, ke la Esperanto-movado ne nur mizere kapitulacis antaŭ la homaj rajtoj, sed ĝi ankaŭ faris neniun konkretan aŭ substancan kontribuon al la defendado de la homaj rajtoj nek al la monda paco, kvankam la esperantistoj kredis kaj asertis tion, konsiderante sin apostoloj de la „lingvaj rajtoj“ kaj advokatoj de etnaj minoritatoj, kvankam ili povis fari nenion pro ili. Ankaŭ la nuntempe observebla malboniĝo de la stato de la homaj rajtoj en la mondo ne estas kritikata de la Esperanto-movado. Estas evidente, ke tiu movado, kiu estas okupata pri si mem, simple ne interesiĝas pri tiu temo. Male, la UEA-movado ĉiam staris flanke de la regantaj potenculoj, de kiuj oni esperis favoron kaj apogon al Esperanto, montrante netan indiferentecon pri la sorto de persekutataj kaj subpremataj minoritatoj, kvankam oni multe palavris pri la neceso de la subteno de lingvaj minoritatoj aŭ indiĝenaj popoloj, por kiuj la Esperanto-movado en la praktiko povis fari nenion. Estas malfacile diri kial la Esperanto-movado ne ricevis la Nobelan pacpremion; povas esti, ke la troa simpatio kaj kompliceco kun la komunismaj reĝimoj kaj aliaj diktaturoj malhelpis ĝin. Sed ĉu la koncerne komisiono, kiu devus decidi pri la aljuĝo de la premio al la Esperanto-movado, estus sciinta tion? Ekzistas dubo. Cetere, pri la aljuĝo de la Nobela pacpremio al Esperanto oni ĉiukaze povus paroli nur lige kun la vivotempo de Zamenhof.

Post la dua mondmilito, precipe post Ivo Lapenna, la UEA-movado estis gvidata de (politikaj) oportunistoj kaj cinikuloj, kiuj poziciiĝis proksime al la marksismo, socialismo kaj komunismo, kvankam ili kutime kaŝis tiun fakton. Kutime ili malŝate rigardis al la Okcidento, kiun ili kulpigis pri „kultura hegemonio“, al kiu oni nete ŝovis la kulpon pri la lingva genocido, altrudo de falsa demokratio per bajonetoj, anglalingva kultura subpremado k.s., dum la ŝtatoj de la „oriento“ kaj de la „tria mondo“, kiuj lezis la homajn rajtojn sistemece kaj en granda stilo, oni ne kuraĝis tuŝi per kritiko. Tiu estis la karakteriza sinteno de tiu maldekstra medio, nature ankaŭ kaj precipe ekster la Esperanto-movado. Neniam en la literaturo de la Esperanto-movado oni povis legi pri la pozitivaj trajtoj de la okcidenttipa demokratio, de la pozitivaj efikoj de la socia merkatekonomio en la landoj de okcidenta Eŭropo. Kiam en la 70aj jaroj la senegala UNESKO-direktoro Amadou Maĥtar M´Bow, kiu estis konata kiel kontraŭulo de la Okcidento, simpatiis kun la Esperanto-movado, kaptis ĝin granda eŭforio. Simila reago estis observebla en la kazo de lia posteulino Irina Bokova, kiu edukiĝis kaj ekkarieris en la sistemo de la bulgara komunisma partio. Ankaŭ la nuna direktorino de UNESKO, Audrey Azoulay, kiu hejmas en la (radikala) politika maldekstro, estas ŝajna simpatiantino de Esperanto, kion ŝi demonstris en iuj fervoraj salutmesaĝoj, kiujn ŝi subskribis al la adreso de la Esperanto-movado, cetere laŭ peto de aktivuloj de tiu movado mem. Sama entuziasmo regis, kiam oni eksciis, ke la jugoslavia gvidanto Josip Broz Tito lernis Esperanton en la prizono, kiam la bulgaraj gvidantoj Georgi Dimitrov kaj Todor Ĵivkov apogis ĝin kaj kiam la kuba gvidanto Fidel Castro deklaris sin „soldato de Esperanto“. Kiel konate, ĉiuj tiuj politikistoj kulpis pri grandskala lezado de la homaj rajtoj kaj respondecas por diversaj politikaj krimoj, murdoj kaj enprizonigoj de ideologiaj malamikoj aŭ simplaj kritikantoj. Sed la politika propagando faris el ili kvazaŭsanktajn ikonojn de iliaj movadoj, kiuj kulpas pri grandskala ekonomia mizero kaj politika subpremado en iliaj landoj. Neniam oni povis legi en Esperanto-publicaĵoj iun ajn kritikon pri tio.

La marksismo/komunismo, kiu sentis sin supera socia sistemo, kaj Esperanto, kiu sentas sin supera lingvosistemo, estas do iusence ideologij ĝemeloj de la 19a/20a jarcento. Ambaŭ estas ideologioj kun universalisma ambicio kaj totalisma sinteno, strebante al la „fina venko“ por atingi la finan solvon por la homaro, kiun ili celas seeble devige enkonduki pere de la registaroj, kiuj havas la potencon en la ŝtatoj. Kaj la marksismo/komunismo kaj la esperantismo konsideras sian ideologion neerara kaj vidis sin sur la ĝusta flanko de la historio. Kaj la komunisma partio kaj la Esperanto-movado ne toleras kritikon de interne kaj ekstere kaj traktas kritikantojn per ignorado. Ĉar ili estas radikalaj ideologioj, ambaŭ estas netoleremaj ideologioj rilate al siaj kontraŭuloj, kiuj estas konsiderataj kiel mal-

amikoj, dum nur la apogantoj estas amikoj. Kaj la komunisma kaj la esperantista movado estas speco de sektoj kun religiaj trajtoj (kaj eklezio). Ambaŭ utopioj fiaskis, ĉar ili estis utopioj, kiuj malrespektis la naturon de la homo.

Last but not least oni ankaŭ neniam povis legi en la literaturo de la UEA-movado vortojn de konsterno aŭ bedaŭro pri la mortigitaj judoj dum la holokaŭsto, krom se judaj esperantistoj, kiuj estis mem koncernitaj de tiu tragedio, mem skribis pri ĝi. Same kiel la stalinismo ankaŭ ĉi tiu temo devis esti prisilentata aŭ estis kriple prezentata en la literaturo de la komunismaj landoj. La antisemitismo pluvivadis en formo de la anticionismo, kiu estis ŝtata doktrino de la socialismaj landoj. „Judo“ iĝis neprononcebla „vorto non grata“. La sinteno al la judo Zamenhof restis malvarma ankaŭ en la pintaj cirkloj de UEA, kiu estis gvidata de diversaj komunistoj kaj kriptokomunistoj. En jubileaj manifestoj oni nete prisilentis la judecon de Zamenhof kaj alergie reagis al ĝi, kiam aperis biografioj aŭ artikoloj pri tiu ĉi temo. Ke Zamenhof estis judo, estis verŝajne granda problemo por la Esperanto-movado, kiu ne volis esti konsiderata kiel juda afero. Sed oni ne devas forgesi, ke sen la judeco de Zamenhof Esperanto verŝajne tute ne ekzistus.

Nu, oni devas ankaŭ konscii, ke la Esperanto-movado ne estas klasika homrajta aŭ pacisma mova-do kaj ne sentas la bezonon konkrete trakti politikajn temojn en siaj oficialaj paroladoj kaj komunikoj. La Esperanto-movado limigas sian ´politikan´ esprimiĝon al la reproduktado de la formalaj kaj sloganecaj mesaĝoj kaj rezolucioj de UN, UNESKO kaj similaj organizaĵoj, kiujn ĝi adaptas laŭ siaj bezonoj. Laŭ tiu logiko funkcias la diplomatio de la Esperanto-movado, kiu *ne estas neŭtrala, sed profunde oportunisma, hipokrita kaj malsincera (aŭ malhonesta)* movado. Ankaŭ la Esperanto-movado sekvis nur siajn proprajn interesojn, kiel la ŝtatoj de UN. La amaso da belaj vortoj pri humaneco kaj humanismo esprimitaj de la Esperanto-movado estis nura propaganda fasada strategio por plaĉi al la UN-sistemo, de kiu ĝi atendas favoron kaj apogon, kaj por trompi la publikon, kiu sciis nenion pri Esperanto. Morala sincereco, historiografia objektiveco kaj scienca vereco ludas neniun rolon. Propagando kaj rozkolora pentrado estas pli grava. Ankaŭ la *UNESKO-Kuriero* estas nura propaganda organo, en kiu certe neniam aperos kritika analizo pri la katastrofa situacio de la homaj rajtoj en Ĉinio, Kubo aŭ Irano. La rezolucioj, kiujn UNESKO aprobis en 1954 kaj 1985 favore al Esperanto, perdis sian sencon, ĉar hodiaŭ praktike neniu ŝtato plu interesiĝas pri tiuj rezolucioj, kiuj signifis nuran burokratian formalismon kaj kies sukceso baziĝis je la iniciato de unusola Esperanto-aktivulo, kiu jam delonge ne plu vivas. Granda problemo de la Esperanto-movado estas, ke tro multaj fanatikuloj, strangulo j kaj sektemuloj reprezentas kaj propagandas ĝin.

La Esperanto-movado fariĝis kurioza lingvistika sekto, kiu allogas plej diversajn ideajn fanatikulojn kaj alternativulojn kaj parte tre agresemajn politikajn reakciulojn, ĉefe el la maldekstra politika spek-tro, kiuj postulas „lingvan justecon“ kaj volas ŝanĝi la mondon per la enkonduko de la artefarita „neŭ-trala“ lingvo Esperanto, kiun parolas nur malmultaj homoj kaj kiu ĝenerale ne estas konata, ĉar ĝi ne estas instruata en la ŝtataj lernejoj, kun kelkaj malmultaj eksperimentaj kaj libervolaj esceptoj. La pro-pagandistoj de la Esperanto-movado kredas, ke nur per la enkonduko de tia lingvo la mondo fariĝos pli bona, pli paca kaj pli justa. Kompreneble temas pri puraj teoriaj asertoj. Por prediki tiun ideon ili tiris kaj tiras ĉiujn registrojn de la propagando, sed hodiaŭ la citrono estas elpremita. Ĉar la Esperanto-movado ne atingis siajn historiajn celojn, ĝi kantas la cikonian kanton, kaj restas esence nur la tasko reskribi kritike ĝian historion.

Ĉiuj klopodoj de la esperantistoj do evidentiĝis ĝis nun pli malpli vanaj kaj ĥimeraj, ĉar krom la okazigo de rutinaj aranĝoj, kiuj havas ĉefe propagandan karakteron, oni povas atendi neniujn substancajn sukcesojn aŭ progresojn. La Esperanto-movado dume vivtenas sin ĉefe per ekscesa festado de jubileoj, per iuj internaciaj aŭ naciaj kongresoj, fizikaj aŭ virtualaj, kiuj allogas ĉefe (malnovajn kaj maljunajn) asociajn aktivulojn kaj turistojn, al kiuj ofte mankas bonaj, eĉ bazaj lingvokonoj. La ĉefa publiko, partoprenanta la Universalajn Kongresojn de Esperanto, venas el Germanio, Francio, Japanio, suda Koreio, Usono kaj aliaj ´riĉaj´ landoj, kompletigata de ĉinaj turistoj, kiuj havas la monon por pagi la kotizon kaj la vojaĝojn al la multekostaj jarkunvenoj, dum reprezentantoj el la „Tria Mondo“ estas nur malofte videblaj, kaj la publiko el la orienteŭropaj landoj praktike malaperis. La Esperanto-movado havas neniujn kapacitojn kaj resursojn por okupiĝi pri temoj kaj problemoj, pri kiuj la UN-sistemo okupiĝas. Oni ankaŭ povas dubi, ke la Esperanto-movado, kiu estas ĉefe okupata pri si mem, vere interesiĝas pri tiuj temoj kaj problemoj. Sian monon UEA investas en strukturojn kaj agadojn, kiuj ne

kapablas progresigi Esperanton. Mankas inteligentaj, kompetentaj profesiuloj por levi la Esperanto-movadon sur pli altan nivelon. Mono ekzemple por investi en la konstruadon de la Esperanto-movado aŭ instrui la lingvon en Afriko, Azio kaj Latinameriko ne restas. Ĉar UEA ne havas ĝin, la kapitalo por financi la *UNESKO-Kurieron* en Esperanto venas de la ĉina registaro (!!!), kiu tiel povas akiri politikan kontrolon. La ĉefa organo de UEA, *Esperanto,* estas redaktata de rusoj, kiuj evitas ĉian kritikon pri la movado, kiun ili pentras rozkolore. La kronvirusa pandemio de la jaro 2020 nature signifis gravan cezuron ankaŭ por la Esperanto-movado, kiu estas kondamnita daŭrigi sian agadon en la virtuala spaco, kiu nature estas malpli alloga kaj malpli bone palpebla ol la fizika spaco, kiu esence vivigis Esperanton dum pli ol cent jaroj.

Kiam en 1989 la tuta komunisma sistemo kolapsis kaj malaperis en orienta Eŭropo, komencis degeneri ankaŭ la Esperanto-movado, kvankam sub la kondiĉoj de la nova libereco ĝi parte ankoraŭ iom prosperis en la 1990-aj jaroj. La senkritika sinteno de la UEA-movado restis dume neŝanĝita rilate al Ĉinio, Vjetnamio kaj Kubo, kiuj restis komunismaj, malgraŭ grandskala lezado de la homaj rajtoj, subpremado de etnaj minoritatoj, persekutado de kritikaj ĵurnalistoj kaj opoziciuloj kaj drasta cenzuro. Ankaŭ la ruslandaj esperantistoj ŝajne nenion lernis el siaj historiaj eraroj, kiam ili signalis, ke ili apogas la anekson de Krimeo kaj per tio la politikon de la Kremlo. Nuntempe en tiuj landoj ekzistas maksimume (po) kelkcent realaj esperantistoj, kiuj estas aktivaj aŭ partoprenas naciajn kaj internaciajn kongresojn. Sed krom turismo kaj ĝia praktikado kiel hobio, Esperanto donas hodiaŭ neniujn avantaĝojn. La postmilitaj pioniraj generacioj, kiuj esence portis la Esperanto-movadon, estas elmortantaj kaj la novaj generacioj de esperantistoj estas malfortaj kaj kvante kaj kvalite neniel kapablas anstataŭi la malnovajn generaciojn. Kvankam en ĉiuj landoj la oficialaj nombroj de asociaj membroj stagnas aŭ reduktiĝas al kelkdek aŭ kelkcent anoj, la Esperanto-propagando havas neniujn skrupulojn paroli pri la ekzisto de dek- aŭ centmiloj, eĉ milionoj da „esperantistoj“ aŭ Esperanto-lernantoj. Per false deklaritaj ciferoj pri membronombroj iuj Esperanto-organizaĵoj (kiel TEJO) eĉ provis ricevi altajn subvenciojn de eŭropaj instancoj. Ene de la Esperanto-movado kritiko de interne kaj ekstere kontraŭ la „sankta afero“ estas nedezirata, obstine evitata kaj sisteme subpremata, (mem)kritikaj analizoj ne estas verkitaj aŭ publikigitaj en la oficiala Esperanto-gazetaro, kiu nur rozkolore raportas pri „progresoj“, „sukcesoj“ kaj „rekordoj“ en paralela ŝajnmondo de revuloj kaj utopiistoj, en kiu kritika konscio ne ekzistas. Pro tiu manko de (mem)-kritiko kaj la nura prezentado per roza koloro, ornamata per propagandaj troigoj, ŝajnigoj kaj blufoj, la Esperanto-movado devas esti konsiderata kiel *profunde malsincera (aŭ malhonesta)* movado, kiel ludo en la plej bona kazo. Sed la monda gazetaro apenaŭ raportas pri la sukcesoj, progresoj kaj rekordoj de la esperantistoj, kaj se ĝi tamen raportas pri ili, tiam laŭ la kutima primitiva kaj supraĵa maniero sen scii kaj kompreni pri kio vere temas. Nur esperantistoj kredas, ke tion, kion ili pensas, asertas kaj predikas, estas ĝusta kaj prava. Pro tio la malnova Esperanto-propagando restis sufiĉe forta kaj daŭre disvastigas siajn mitojn kaj legendojn, dum la homaro mem definitive rezignis lerni neŭtralan internacian help- aŭ planlingvon, ĉar ĝi solvis la „lingvan problemon“ alimaniere, nome per la multlingvismo kaj la angla lingvo kiel „lingua franca“. En tio necesas konstati, ke la ĉefaj propagandaj asertoj de la Esperanto-movado, ke Esperanto estas pli facile lernebla kaj pli neŭtrala ol etnaj lingvoj, ne efikis grandskale. Verŝajne nur la deviga enkonduko de Esperanto en la lernejojn de la membro-ŝtatoj de UN estus kaŭzinta la „finan venkon“ de Esperanto. Restas do enigmo, kial tio ne okazis, malgraŭ rekomendoj de Unesko. La ĝenerala enkonduko de tia lingvo signifus esence gigantan socipolitikan problemon. Ĉu la konsidero de la popoloj, ke Esperanto estas „artefarita“ (aŭ arteficiala) idiomo, estas la sola, aŭ ĉefa kaŭzo de tiu rezigno ne estas klare. Ĉi-rilataj enketoj neniam estis faritaj kaj aktualaj empiriaj studoj mankas por ricevi respondojn.

La situacio de la Esperanto-movado do estas senperspektiva kaj senespera. Almenaŭ ĝi pruvis, kaj tio estas la pozitiva mesaĝo, ke tia „neŭtrala“, „aretafarita“ lingvo kiel Esperanto en principo plene kaj same bone funkcias kiel ajna etna lingvo, kion multaj teranoj ne scias. La „fina venko“, nocio uzita ankaŭ en la nazia kaj komunisma terminologioj, de Esperanto do probable ne okazos. Sed Esperanto, kiu aspektas kiel gago de la sinamuza, plezuriga kaj distra socio, eble ja trovos sian lokon en la virtuala mondo, post 130 jaroj da relative sukcesa fizika ekzistado.

Fino

www.planlingvoj.ch, aŭgusto 2020

Krom slavistiko kaj orienteŭropa historio, la aŭtoro (nask. 1962) studis ankaŭ internacian juro ĉe la Zurika universitato, 1985-92.

Provizora versio. La teksto estos kontrolcele relegota kaj definitive publikigita en ĉi tiu retujo.